

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: S-ro Mac LeFevre, 231 St. John Street, Launceston, Tas., 7250.
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 221 (301)

MELBOURNE

Jan.-Feb., 1985

A NATIONAL LANGUAGE POLICY FOR AUSTRALIA

Report by the Senate Standing Committee on Education and the Arts.
Esperanto mentioned.

The report of the Committee of the Australian Senate which has been studying since February, 1983, all aspects of the development and implementation of a co-ordinated language policy for Australia completed its work in October and its printed report is now available.

The submission of the Australian Esperanto Association is included in the list of written submissions (without testimony).

The report also mentions the submissions which "contended that the study of a language at primary or secondary level should be viewed largely as an 'apprenticeship' in language learning since it is impossible to predict at this stage which language or languages may be required in adult life". This section concludes: "Some specific languages mentioned were Italian, Spanish, French, German and ESPERANTO."

The Report is largely devoted to the teaching of Australia's national language, English, either as a first or second language, and to the Australian Aboriginal Languages. But it includes chapters on Languages and Australia's International relationships, and on the teaching of languages other than English. Although there is no specific approval of Esperanto it is by no means excluded from the languages suitable for teaching in Australia.

HEPOPETO PRI L.N.M. NEWELL

La konata sudafrika Esperanto-poeto, Edwin de Kock, deziras aranĝi eldonon de kompleta poemaro de L.N.M. Newell. Li kredas, ke eble troviĝas en la manoj de diversaj esperantistoj ankoraŭ ne-

publikigitaj poemoj.

Ĉu vi povas helpi? Se jes, bonvole skribu al:

Edwin de Kock, Posbus 143, BON
ACCORD — 0009, Republic of South
Africa.

REMEMOROJ PRI D-ro CALDERA

Mi renkontis D-ron Caldera en 1923 en la Universitato de Pavia, Italio. Tio okazis post kiam mi alvenis el Rumanio kaj aligis al la Universitato en Pavia. D-ro Caldera ankaŭ alvenis tie kiel elstara gajninto de altvalora konkurso por okupi postenon de profesoro por oreloj, nazo kaj gorĝo. Mi tuj kontaktis lin, kaj li volonte akceptis min kiel asistanton.

De la komenco ĝis lia morto li edukadis min kiel sperta majstro kaj fidela amiko. Li dediĉe instruis al mi la lingvon kaj la fakon, sed devigis min daŭre labori en la fakultato kaj en lia studcambro. Tiutempe mi estis juna kaj sentis la mankon de gaja kompanio de italaj studentoj kaj belulinoj. D-ro Caldera estis tre strikta profesoro kaj malpermesis al mi iujn ajn distraĵojn. Mi diplomiĝis en 1924 kaj verkis sub lia kontrolo multajn medicinajn disertaciojn.

Bedaŭrinde, post du jaroj, li rezignis reĝimo kaj li starigis privatan kabineton de profesoro-kuracisto en Verona. Mi la katedron pro sia opozicio al la faŝista restis en la universitato kaj daŭrigis mian fakan laboron, sed ofte vojaĝis al Verona, kie li kontrolis miajn verkojn.

La faŝistoj senĉese turmentis lin ankaŭ en Verona kaj li tiel koleriĝis, ke li decidis forlasi la patrujon. Li komencis esplori la mondon kie li povus vivi en libera demokrata etoso. Multaj universitatoj en Norda kaj Suda Ameriko ofertis katedron, sed li ne akceptis pro politikaj kialoj. Fine li iris al Brisbano, kie li ricevis allogan proponon Li decidis ankaŭ viziti Perton, pri kiu li aŭdis tre bonajn opiniojn. Kaj fakte, kiam li alvenis en Perto, li tuj decidis establiĝi.

D-ro Caldera principe estis kontraŭ edzeco kaj ofte penadis influvi min kontraŭ geedziĝo. Do, kiam mi edziĝis en Italio mi ne skribis al li pri tio. Sed la plej granda surprizo por mi estis kiam li bonvenigis min je nia alveno en Fremantle-haveno, li prezentis sian edzinon, same kiel mi.

Du semajnojn post mia alveno eksplodis la milito kaj, laŭ lia konsilo, mi forlasis Perton kaj establiĝis kiel kuracisto en kampara vilaĝo Corrigin. Inter-tempe li organizis Esperanto-klubon en Perto kaj devigis min fari same en Corrigin, maleraŭ la fakto, ke mi tute ne sciis la lingvon. Sed mi konvinkiĝis, ke

la plej bona metodo por ellerni la lingvon estas la instruado al aliaj. Post ses monatoj mi sukcesis en elementa ekzameno, post unu jaro en la Pyke-ekzameno kaj post du jaroj en la supera ekzameno kun Pastro Cowling.

Mia amikeco kun D-ro Caldera plifortigis pere de Esperanto kaj daŭris ĝis la lasta momento de lia vivo. Mi ŝatas menciigi epizodon, kiu montras lian moralan integrismon kaj firman karakteron. Kiam la nova kliniko por Oreloj, Nazo kaj Gorĝo estis establita kaj la hospitala estraro instalis monahinon kiel ĉeflegistino, D-ro Caldera, pro sia antireligia sinteno, tuj deklaris, ke, se oni ne anstataŭos ŝin per laika flegistino, li ne plu eniros la klinikon. La hospitala administrantaro penadis eksplicke al li, ke la hospitala stabo ĉiam konsistis nur el monahinoj kaj la universitata personaro estas akceptataj kiel senpagaj volontuloj. Sed D-ro Caldera ne cedis kaj oni anstataŭis la flegistinon. Tiu kazo estis unika en la historio de tiu universitato. Lia vivstilo estis tre ekonomia kaj modesta. Lia honorario por kuracado estis tre modesta kaj li ofte kuracis senpage.

D-ro Caldera estis iom aŭtokrata en iuj situacioj. Li ĉiam abomenis korupton, precipe en politiko kaj tute ne toleris malhonestecon en religiaj kaj aliaj aspektoj de la vivo.

Permesu al mi fini tiujn memoraĵojn dirante, ke mi persone neniam forgesos D-ron Caldera, kiel mian fidelan amikon kaj eternan edukiston.

—T Einihovici.

Mi estas iom sentimental, do mi volas aludi mian amikecon kun D-ro Caldera dum la lastaj 45 jaroj. Estis li kiu venigis min al ĉi tiu belega lando. Estis li, kiu unue tendis sian manon kaj varme akceptis min en 1939 ĉe la haveno en Fremantle. Tiu estis mia unua renkontiĝo kun D-ro Caldera. Kvankam liaj leteroj al ni estis ĉiam kuraĝigaj, tamen mi timis primia estonteco en nova lando, kies lingvon mi ne konis.

D-ro Caldera helpis al ni establiĝi kaj ni fidele obeis liajn saĝajn konsilojn kaj neniam bedaŭris. Li estis la homo, kiu renaskigis Esperanton en mi. Tute neatendite mi konsciis, ke li estas la motoro de la Esperanto-movado en Okcidenta Aŭstralio. Komprenble, mi tuj rekomencis lerni Esperanton kun lia

helpo. Dank' al lia entuziasmo mi progresis. Mi konsultis lin ofte telefone pri gramatiko, vortfarado kaj literaturo. Li ĉiam pacience klarigis al mi kaj forigis miajn dubojn. Al li mi ŝuldas mian gojon pri Esperanto kaj ĝia filozofio.

Li estis elstara homo, imitinda por ĉiuj.
—Idyss Einihovici.

25th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

4-11 Jan., 1986 — Perth, W.A.

This congress will be held at St. Catherine's College, one of the residential colleges adjacent to the beautiful University of W.A.

Members will be accommodated in comfortable rooms. The charge for a single room and all meals will be approximately \$30 per day. People wishing to share may have an extra bed placed in the room, when the cost per person will be about \$23 per day.

Perth's beauty spots include our incomparable Swan River, King's Park, modern shopping arcades, historical villages, picturesque Fremantle, vineyards and the Darling Ranges. All this a mere half-day's drive from our unique timberland, which includes the Valley of the Giants. A post-congress tour of the South West will be conducted, if there is sufficient interest.

During the congress there will be a city tour, a day excursion to Yanchep Park and another to historical York. A feature will be the twilight dinner cruise on the Swan.

The University campus is only 5 minutes by car from the centre of the city and buses leave regularly outside the College. See our new Art Gallery, Alexander Library, China Town.

Early enrolment will secure your accommodation!

Congress Fee: (before 1-7-85): \$30. After 1-7-85: \$35. Pensioners/Full-time students (before 1-7-85): \$25. After 1-7-85: \$30.

Mail your Congress Fee to the Treasurer **Mr. O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.** If you wish to stay at the College add \$10 for Room Deposit. Please make cheques payable to "Australian Esperanto Congress" and add 12 cents for bank charges.

First List of Enrolments:

1. Jack Hawks, Perth
2. Vera Payne, Perth.
3. Chris Dean, Perth.
4. Aileen Mountford, Perth.
5. Herbert Koppel, Melbourne.
6. Fay Koppel, Melbourne.
7. Joyce Turner, Rockhampton.
8. Dorothy Threlfall, Perth.
9. Owen Loneragan, Perth.

State Distribution: W.A. 6; Vic. 2; Q'ld. 1



● **PERTO:** Dudek anoj ĉeestis 5-12-1984 la **Jarkunvenon**, ankaŭ vizitanto el Finnlando, S-ro J. Vilkki. Prezidanto R. Smeets raportis pri klubaferoj dum la pasinta jaro kaj dankis la oficistojn, komitatanojn, instruistojn kaj aliajn helpantojn. Li estis optimisma, ke la Ligo prosperos dum la venonta jaro.

La sekretaria kaj kasista raportoj estis kontentigaj kaj tiu de la reklamanto estis tre kuragiga. S-ino Payne raportis grandan sukceson de kursoj ĉe Mt. Lawley Kolegio.

Kotizoj por 1985 estos \$10 por plenaneco, kaj \$8 por asocioj, studentoj, pensiuloj, kamparaj anoj.

Komitato por 1985: Prezidanto. J. Hawks; Vic-Prez. J. Harvey kaj R. Alvaro; Sekretario: F-ino A. Tully; Kasisto O. Loneragan; "Nigra Cigno"; C. Dean; Reklamanto: S-ino I. Einihovici.

Ĉi tiu jus elektita komitato estas ankaŭ nia kongresa L.K.K. kaj jam komencis pretigi provizoran programon por la kongres-semajno kaj la postkongresa semajno. Ni bonvenigos ideojn — ni jam ricevis iuin — de Orientŝtataj vizitantoj.

Nia **Zamenhofa Festo** okazis je 15-12-1984. Estis festena etoso en la muzikĉambro de la "College of Advanced Education, Nedlands", vespero milda, ĉambro dolĉluma, muziko ĉarma kaj tabloj invitaj, Pli ol 40 Esperantistoj kunvenis por honoro kaj ĝui la 125-an datrevenon de D-ro Zamenhof.

Post brua kaj feliĉa duonhoro de babilado kaj trinkado bonvenigis nin nia nuna prezidanto Jack Hawks Antaŭ ol sidiĝi, ni silente honoris anojn for-

pasintajn en la jaro 1984: S-inon Ramsey (fratino de Otilie Stempel), la estimaton Doktoron Caldera, nian fidelan Olive Hunt, nian gajan muzikiston Gino Gobbo, kaj nian amatan Dolly Dean.

Sekvis la alloga "Smorgasbord-festo". La antaŭa prezidanto Reneé Smeets faris la Zamenhof-Paroladon, kaj Chris Dean tradukis ĝin anglalingve por la malmultnombraj ne-Esperantaj gastoj. Ĉarma vizitanta kantistino, Valerie Melrose, denove regalis nin per belaj kantoj, kiujn ŝi eĉ lernis Esperante. Al ŝi, kaj al May Eatt, kiu akompanis ŝin piane, oni donacis belajn buketojn. Poste deklamis ĉarma natiĵara Rebecca Dixie "Mia Jupo". Kia bela parolmaniero!

S-ino Vera Payne, nia plej elstara instruistino kaj Esperantistino, fiere prezentis "Novajn Anojn", kvin el sia studentaro kaj unu de Reneé. Inter la studentoj de Vera ni gratulas al John Harvey, nuna vicprezidanto de nia Ligo, kaj Aidan Tully, nun sekretariino. El la klasoj de Vera ni fakte nun havas fortan novan sangon de tre entuziasma grupo.

La festhoroj flugis. Post mallonga saluto de vizitanto Johanni Vilkki el Finnlando venis la loterio. Chris Dean, helpita de nia knabineto Rebecca, disdonis multajn amuzajn premiojn. La ridado ĉesis, kiam oni anoncis kantadon. Helpite de la muziko de la Londona Esperanto-floro kaj Ramona van Dalsen, ĉiuj anoj kantis plenvoĉe. Estis taŭga fino al la festo. —S.G.

● **MELBURNO:** Dudek ses esperantistoj kaj amikoj (pasintjare 42) partoprenis la Zamenhof-Feston, kiu okazis je 15-a de decembro, 1984 en la halo de la Skoltoj. La prezentisto de la vespero ĉi-jare estis S-ro Gerald Tumman.

F-ino Isabel Gale malfermis la programon per ĉarma Stilofon-ludado kaj duafoje ravis per ludado de la konata melodio "En Persa Merkato". Membroj de la Oakleigh-Grupo, krom poemoj kaj rakontoj, prezentis skeĉon. La Waverley-Grupo prezentis areton da kantoj kaj ludis skeĉon. S-ro H. Koppel deklamis poemojn kaj la "Revuon por 1984" donis Jack Fallu.

La Festparolado de S-ino Fay Koppel, post cito de la vortoj de UEA-Prezidanto ĉe la Vankuvera Kongreso rilate al KONTINUECO, atentigis, ke la facilanimaj sugestoj por ŝanĝoj far kritikemaj, sed ne laboremaj, proponantoj kaj ŝi ties "malavara" elspezo de kasuja enhavo, pli ofte rezultas en detruo ol en

konstruo de koncerna grupo. Ilustro per rakonto pri la IDO-krizo montris kiel la Zamenhofa rezisto al ŝanĝoj en la lingvo certigis ĝian KONTINUECON.

La vespero finiĝis kiel kutime per abunda vespermanĝeto.

● **LAUNCESTON, Tas.:** Vesperon, la 10-an de decembro, 1984, Zamenhof-festiĝis 15 personoj. La Prezidanto de la klubo, S-ro Clive Bennet proponis la toston. Li emfazis la 'homaranisman' filozofion de nia Majstro, kaj sukcesis instigi la ĉeestantojn profunde pensi pri tiu granda ŝanco montrita de Zamenhof, por la homaro kunvivi harmonie kaj feliĉe.

Ankaŭ la klubanoj rezoluciis ke "La Launceston-klubo urĝu ke AEA kunlaboru kun UNAA por strebi por atingi mondpacon. La Launceston-klubo konsideras, ke la unua paŝo al mondpaco, kaj por la promocio de internacia kompreno kaj simpatio, estas la kuraĝigo de neŭtrala komuna lingvo.

Tiam okazis babilado, kaj estis ankaŭ du gitaristoj, do, ĉiuj ĝuis iomete da muziko kaj kantado. Estis tre feliĉa vespero.

—Mac LeFevre.

● **KANBERO:** 21 membroj kaj amikoj partoprenis en la Zamenhof-Vespero, sabaton la 15-an de decembro en la salonoj de la Aŭstralia Instituto pri Internaciaj Aferoj.

Ekspozicioj prezentis la venkaron de Zamenhof, multaj en originalaj aŭ fruaj eldonoj, kaj kompletan de la Serio Oriento-Okcidento Enkondukan muzikon provizis (per disko) Nikolaj Pairoux de Belgio en sia kanto "Haveno".

Post bonvenigo al la kelkaj vizitantoj far Prezidanto Ralph Harry, Alan Towsey el Tahmoor festparoladis. Lia temo, antaŭvidante la Jaron de Junuloj, 1985, estis "Esperanto, lingvo de la Junulo, Zamenhof".

Marjorie Ellyard raportis pri eventoj en la Esperanto-Movado en Ĉinio kaj aliaj landoj, kaj Ralph Harry rivelis la raporton de la Senata Komitato pri Edukado kaj la Artoj (vidu apartan artikolon). Sekvis sonfilmo pri la Tria Pacifika Kongreso kaj la 69-a Universala.

La kunveno okazis apud la Nacia Biblioteko de A.E.A. kaj Ralph Harry dankis al la donacintoj de libroj, kun speciala mencio de Herta Mueller kaj Ken Linton. Bryan Campbell tiam transdonis librojn kaj dokumentojn de sia patro, Jock Campbell de Dorrigo, NSK.

Noel Gamble ankaŭ donacis librojn.

Gail Tregear legis poemon "La Duelo" de Federico Garcia Lorca. Marj. Ellyard kaj Brenda Birkett prezentis skeĉon. Ralph Harry kaj Petro Hai aktoris kun elĉerpajoj el la nova eldono de "La Eta Princo" Post "Nombroludo" de Marj. Ellyard sekvis "verda" vespermanĝo.

—R.L.H.

● **SIDNEJO:** La Zamenhof-Feston en la Esperanto-Domo prezidis S-ino B. Clemenson, la prezidanto de la Esperanto-Federacio de NSK. Prof-o R. G. Robertson festparolis kaj emfazis la gravecon de la literaturo, invitante S-inon S. Burkitt recenzi la libron "Sur la Bordo" de S-ro K. Linton, kaj S-inon M. Duncan recenzi la libron "Faktoj kaj Fantazioj" de D-rino M. Boulton, por kuragigi libro-aĉetantojn. Poste S-ino Burkitt parolis pri sia renkontiĝo kun Alberta Casey, la konata kantistino, kaj prezentis kasedon ŝian.

Prof-o Robertson mallonge klarigis la ĉinan lukrtaron "Tajĉiĉuan", kaj kun S-ino M. Chaldecott demonstris kelkajn ekzercojn por komencantoj. S-inoj A. Gash kaj M. McLennan dolĉvoĉe kantis duope kaj S-ino M. Duncan gvidis komunan kantadon, laŭ muziko surbendigita dum la kongreso en Kanbero antaŭ 11 monatoj. Tiu etis sukcesa eksperimento. Manĉianoj S-ino E. Graham, S-ro A. Cocking kaj Prof-o R. G. Robertson prezentis skeĉon "En la Televiziejo", originale verkita de D-rino M. Boulton, kaj aktualigita de Prof-o Robertson. S-ino M. Chaldecott, S-ro D. Gould kaj S-ro J. Harwood laŭlegis skeĉon "Per rentgenaj oreloj" pri la sekretaj pensoj de la pasaĝeroj en aŭtobuso.

Finfine la prezidanto de la Sidneja Klubo, S-ino M. Chaldecott, esprimis dankojn al ĉiuj partoprenantoj, kaj precipe al F-ino M. Straker, la organizanto, kaj al S-ino S. Burkitt, kiu respondis pri abunda kaj bongusta vespermanĝo.

—Robi.

● **MANLY:** La 2-an de decembro, 1984, en bela vetero, ĉirkaŭ 40 membroj kaj ge-amikoj ĝuis kristnask-renkontiĝon en la hejmo de Marjorie Duncan. Tiuj kiuj alvenis frue naĝadis aŭ promenis kaj poste ĉiuj festmanĝis kaj babiladis aŭ en la ĝardeno aŭ sur la verando. Je la 2-a horo komenciĝis aferkunveno en kiu oni diskutis kursojn por la venonta jaro kaj kandidatigon de oficistoj por 1985.

—Eunice Graham.

● **BRISBANO:** Okazis la 8-an de decembro, 1984, en la preĝeja halo, St. Albans, Wilston, la Zamenhof-Festo, 1984. Ĉirkaŭ 40 anoj kaj vizitantoj ĉestis kaj tre ĝuis la plejparte neformalan vesperon. La finfinaj klasoj dum 1984, okazis en la klubejo la 10-an de decembro; ni kunvenis denove la 29-an de januaro, 1985.

Dank' al la helpo de Herbert Koppel, ni akiris kasedon, ("Teach Yourself Esperanto") por nia grupo de blinduloj; tio multe helpos pri instruado por tiu grupo. Plensukcesan jaron en 1985 al ĉiuj samideanoj!

—Ray Ross.

LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1984

Antaŭe raportita	\$854
S-ino Winsome Greenhalgh, Brisbane	10
Finna sumo por 1984:	\$864

RESUMO PRI 1984

En 1984 ni ricevis donacojn al nia Subtena Fonduso el	
Nova Sud-Kimrujo	\$290
Kvinslando	180
Viktorio	179
Okcidenta Aŭstralio	110
A.C.T.	35
Tasmanio	30
Suda Aŭstralio	20
Nov-Gvineo	20
	<hr/>
	\$864

LA 5-a A.E.A.-SOMERLERNEJO

Januaron 1985 de la 7-a ĝis la 19-a, okazis la ĉiudujara Somerlernejo ĉe la "Campus Conference Centre" de la Universitato de Nov-Anglio en la pitoreska urbo Armidale, situanta proks. 600 km norde de Sidnejo.

Post-komencantan kurson instruis Marjorie Duncan, precipe konversaciaj lingvaĵoj por ĉiutaga uzo; ankaŭ la klasanoj tralegis la librojn "Virineto en Bluo" de Mason Stuttard, "Amuzaj Dialogoj" de A. Lienhart, kaj la amuzajn skeĉojn de Helen Stone. Ili ankaŭ aŭskultis per sonbendoj la kantojn de O. Tzaut.

Ray Ross instruis progresintan kurson per "Studibro por la Supera" de K. Linton, "Apokrifoj" de Karel Capek, kaj konsultlibroj "Paŝoj al Plena Posedo" de W. Auld kaj "Step by Step" de M. Butler.

Relp Harry gvidis grupon por studi la aplikadon de la lingvo, per diskutado kaj kelkaj praktikaj ekzercoj rilate al propagando, jurnalismo, turismo kaj la funkciado de la delegita reto.

La literatura stud-grupo de Trevor Steele tralegis "La Infana Raso"n de W. Auld, "Kiu semas plorante" de E. Tofalvi kaj O. Knichal, kaj "Kinkas Akvobleko" de J. Amado. Ili tradukis komitate erojn el "Man Shy de F. D. Davison por la estonta Aŭstralia Antologio.

Ĉeestis la somerlernejon 24 el NSK, 10 el Okcidenta Aŭstralio, 9 el Kvinlando, 2 el Kanbero, 1 el Suda Aŭstralio kaj 2 Japanoj, sed bedaŭrinde neniu el Viktorio. Ĉu iu ajn povas klarigi la kialon? Certe ne pro la distanco, ĉar 10 entuziasmoj veturis el Okcidenta Aŭstralio, kaj la kosto de la somerlernejo mem estis ridinde malalta por loĝi en tia bela, eĉ luksa universitato, kaj ricevi altgradan instruon kaj ĝui kortuŝe samideanan etoson dum du neforgeseblaj semajnoj. (Daŭrigota venontnumere)

—Robby Robertson.

Kial Viktorianoj ne partoprenis? La viktoriaj esperantistoj tre fidele subtenas A.E.A. ĉe ties kongresoj kaj pro tio trovas, ke ili ne povas ĉiujare elspezi monsumojn aŭ havi la tempon ankaŭ partopreni somerlernejojn. Kiam oni trastudas la liston de la partoprenintoj de la somerlernejo, oni trovas multajn, kiuj NE ĉeestis la lastan kongreson en Kanbero. (Ekzemple la plejmulto de la Okcident-Aŭstralianoj kaj unu el la instruistoj) —Herbert Koppel.

JUBILEA KONGRESO EN NOV-ZELANDO

La 50-a kongreso de la Nov-Zelanda E-Asocio okazis de la 18-a ĝis la 22-a de januaro, 1985, en la por-knabina "Erskine College", Island Bay, Wellington. Ĉeestis 53 nov-zelandanoj, 5 aŭstralianoj kaj 2 svedoj. La kvin aŭstralianoj estis: F-ino Isabel Gale, Ges-roj Gerald kaj Ruth Tumman, S-ino Margaret Miller (ĉiuj el Melburno), S-ino Berilo Loh (Manly).

Malfermis la kongreson la Vic-urbestro de Wellington, s-ro Gavin Wilson, Prof. John Adcock parolis angle pri la historio de Esperanto en Nov-Zelando. Li estis la unua prezidanto de la nuna NZEA, kaj estris la unuan kongreson en 1930 Estas elstara atingo, ke la unua prezidanto ankaŭ partoprenis la 50-an kongreson.

La plej elstara prelego estis tiu de s-ro Bill Aldridge (la ĉeftradukisto de la Ministerio de Internaj Aferoj), kiu prelegis pri "Esperanto kiel pontlingvo en maŝintradukado". Prof. Adcock prelegis pri "Politiko de lingvo kaj lingvo de politiko". Ambaŭ prelegoj estis tre interesaj.

Drama Konkurso ne okazis, sed kelkaj grupoj prezentis mallongajn skeĉojn. Okazis "Parolarta Konkurso". Tri personoj konkursis: S-ro David Ryan parolis pri la Romia Imperio, s-ino Jeanie Wilson parolis pri la problemoj de malriĉeco, malsateco kaj malsaneco en Afriko. S-ro Don Rogers parolis pri la "Estonteco de Esperanto". La jugantoj decidis favore al Don Rogers.

La kongreso elektis la jenan Estraron: Prezidanto D-ro D. E. Rogers, Vic-Prez s-ro E. R. Dearnley, Helpsekretario s-ro F. A. Adams, Kasisto s-ino M. Richardson, Estraranoj f-ino S. May kaj s-ro D. T. Ryan

Ni konsideris proponon de Jim Dimo inviti D-rinon Marjorie Boulton al Nov-Zelando en 1986, sed decidis, ke ne.

F-ino Isabel Gale aranĝis la Diservon kaj predikis. S-ro Gerald Tumman paroladis pri siaj spertoj rilate al ekspozicioj kaj tiel instigis proponon, ke ankaŭ ni starigu ekspozicion. La kvar aŭstralianoj kantis dum la koncerto kaj f-ino Gale ludis la "Stilofonon".

Je la lasta vespero okazis Bankedo, kiun gvidis s-ro Ross Moore. Post la kutima tosto, s-ro Joe Major (ĉefredaktoro de NZE) paroladis omaĝe al Prof. Adcock. Precize kiam li atingis la kulminon de sia omaĝo, tondro sonigis ekstere.

La 51-a kongreso de NZEA okazos en aŭ apud Palmerston North, en la venonta januaro.

— Donald Rogers.

MORTIS "WIN" ADDIS

La 23-an de decembro, 1984, en hospital en Medindie apud Adelajdo, forpasis esperantistino, kies multjara kontribuo al la laboro por Esperanto en Suda Aŭstralio kaj por A.E.A. ĝenerale meritigas respekton.

WINFRED ELLEN ADDIS naskiĝis la 18-an de aprilo, 1910, en Londono, Anglujo, kaj estis nur 3-jara, kiam la gepatroj migris al Aŭstralio. Triope la familio haltis unue en Melburno (Sandringham), sed poste jam kvinope translokiĝis al Adelajdo por plibonigi la vivrimedojn. Tie, fine sesope, ĝi restis.

La sorto ne tre dorlotis la plej aĝan

infanon, kiu, jam en junago, devis kontraŭbatali pli ol unu gravan malsanon, sed tion ŝi faris kurage. Dum pluraj jaroj ŝi ne povis perlabori la proprajn vivrimedojn, kaj por okupi sin, entreprenis en 1930 la studadon de Esperanto sub la gvidado de S-ro W. L. Waterman, Prezidanto de la loka grupo. Si multe korespondis kun eksterlandaj esperantistoj kaj gastigis multajn kiuj vizitis Sud-Aŭstralion. Jam en 1940, ŝia nomo, kiel Deleĝito por Adelajdo, aperis en la Jarlibro de I.E.L. (poste U.E.A.). Tiun oficon ŝi okupis ĝis 1978, do preskaŭ 40 jarojn.

Estis en la kadro de kunveno de la Esperanto-klubo de Adelajdo, en 1936, kie mi unue konatiĝis kun ŝi, sed post nelonge la kontakto rompiĝis dum mi laboris en la kamparo, kaj, nur post la fino de la dua Mondmilito, ni denove renkontiĝis. Tiam mi konsentis al ŝia peto, ke mi helpu en ŝia instrua laboro, kaj tiel cementiĝis amikeco, kiu daŭris ĝis ŝia morto. Nur iom post mi informiĝis pri ŝia mult-faceta agado.

Kvankam proksimume samtempe kun la eksplodo de la milito ŝi sukcesis rekomenci vivgajnan laboron en la Registara Imposta Departamento, kies multobligan fakon ŝi baldau estris, ŝi daŭre klopodis pri la disvastigo de Esperanto, ĉiam instigis al lernado kaj je gvidis grupeton. La grupanojn ŝi konsilis kaj helpis ankaŭ partopreni korespondajn kursojn. Krome ŝi neniam preterlasis okazon por varbi abonanton al A.E.A. kaj U.E.A.

En 1940, ŝi jam estis Kasisto de AEA, kiun servon ŝi tre kompetente plenumis ĝis junio, 1947. Kiam, post kelkaj manko, oni celis reaperigi tutaŭstralian E-gazeton, ŝi, kaj du koleginoj — F-inoj R. Telfer kaj L. E. Bailey — regule kunvenis en la hejmo de F-ino Bailey en Medindie Gardens, por kunmeti, multoblige kaj ekspede "La Rondo"n Tion ili faris de 1940 ĝis januaro, 1947, en kiu jaro, post ioma atendo, Melbourneanoj sukcesis akiri permesilon por presigi "en fremda lingvo", kaj tion nun ebligis pli bona sanstato de la kasujo.

Kvankam Win ne tute ĉesis labori, ŝi nun pensis pri ferio. En printempo, 1947, okazis nia unua ferio kune, per vizito en Okcidenta Aŭstralio. Sekvis dua en 1948 en Sidnejo kaj Melbourne. Ambaŭfoje ni renkontis multajn esperantistojn, antaŭe konatajn nur kiel nomoj en la korespondantoj de Win, kaj mi ne povis ne observi

la respekton, kun kiu ĉiu ricevis ŝin. Tria ferio konsistis el partopreno, kiel anoj de grupo el Adelajdo, en la A.E.A.-kongreso en Melbourne en januaro, 1950, la unua post multaj jaroj. Antaŭ ol okazis la sekvanta, mi jam loĝis en Viktorio. Estis en ĉi tiu periodo, ke ŝi trovis tempon por ankaŭ diplomigi de Brita Esperanto-Asocio, kaj, inter 1950 kaj 1953 akceptis respondecon pri la Libro-servo de AEA.

Win daŭrigis sian instruan laboron tiom kiom eblis, kaj partoprenis ĉiun AEA-kongreson ĝis 1972, kutime kiel gvidanto de grupeto. Tamen grade ŝiaj energioj elĉerpiĝis. Si rezignis pri la Brisbana en 1974, ĉar ŝi timis la varmecon de la tiea klimato. Si ne plu riskis forveturi el Adelajdo. La finan degeneron de ŝia sanstato akcelis surstrata akcidento, kiam ŝi estis frapita de ekspresveturilo, kaj suferis, i.a., rompitan kokson. Post plusemajna restado en hospitalo, ŝi povis nur malfacile denovi marŝi. En 1979, falo en la hejmo kaj plua rompiĝo de la sama osto pliakrigis ŝiajn malfacilojn, sed ne tute venkis ŝian spiriton. Nur, kiam, en Oktobro, 1984, ŝia kunvivulino (esperantistino Mary Hodge) kolapsis kaj enhospitaliĝis, la fizika ŝarĝo fariĝis tro peza. Post 2 monatoj, ankaŭ ŝi kolapsis. Ŝia forta deziro por sendependeco eĉ en hospitalo rezultis en ankoraŭ unu gambo-rombo — la "bona" — post kiu ŝi mallonge pluvivis.

Ĉeestis ŝian funebbron, je 26-a de decembro, 1984, nur parencoj — gefratoj, gebofratoj, genevoj, kune kun parencaj reprezentantoj de la ankoraŭ nesana Mary Hodge. Korajn kondolencojn al ili ĉiuj! Kun profunda bedaŭro,

—Fay Koppel.

RECENZOJ

HAVENON/DOKTORO ZAMENHOF: Nova disko de Claude Hastir kaj Nikolina (45 r.p.m.) Mendu de AEA Book Service, P.O. Box 230, Matraville, NSW, 2036.

Por la Internacia Jaro de Junuloj jen junulaj voĉoj kaj muziko el Belgio. Claude Hastir de Andenne kaj lia amikino Nikolina verkis ĉarmajn kantojn pri la vivo (Haveno), kaj pri la idealoj

de Doktoro Zamenhof. Claude komponis la plaĉan modernan muzikon kaj Nikolina verkis la freŝajn versojn Grupo da muzikistoj ludis la muzikon, Nikolina kantis, kaj jen disko, kiun certe ĝuos ne nur Esperantistoj, sed pli vasta publiko.

La elparolo estas sufiĉe bona por ke lernantoj profitu de aŭskultado, kaj mi rekomendas, ke kluboj kaj societoj aĉetu ekzempleron kiel amuzilon, propagandilon, kaj helpilon al la instruado. Sed super ĉio oni ĝuu la kantadon.

—Ralph Harry.

FAKTOJ KAJ FANTAZIOJ far Marjorie Boulton, eldonita far UEA, broŝurita kun dukolora eleganta kovrilo, formato A5, kia alproksimiĝas al la eksmoda oktavo, abunde ilustrita, kun 431 paĝoj inklude de glosaro de vortoj, kiuj ne povas troviĝi en PV, sed en PIV, kiun ne ĉiu komencanto posedas. Preseraroj preskaŭ tute mankas. Prezo \$15.95 ĉe Libroservo de AEA.

Ĉi tiu verko estas planita por tiuj, kiuj finis la elementan kurson, sed ne sufiĉe progresis por entrepreni kurson, kia "Paŝoj al Plena Posedo" far W. Auld. Tio precipe aplikiĝas por la memlernanto.

La enhavo estas ege interesa, kaptante la atenton per fabeloj el malmulte konataj landoj, kiaj Ganao, Tibeto, Etiopio kaj Maroko. Ni ĉiuj konas la poezian arton de la plej elstara poetino en la historio de Esperanto, kaj la aŭtorino uzas tiun arton, verkante poemojn, kiuj multe helpas kompreni kaj memori la diversajn gramatikajn punktojn, kiaj korelativoj, transitiveco de verboj, refleksivo, akuzativo, kaj participoj, klarigante la diferencon inter futura tenso kaj kondiĉa modo, inter diversaj sufiksoj, kaj pri tiu utila vorto "je". Ekzemple, Jen estas strofo pri la akuzativo:

Jen papago manĝas fragon;
frago ne manĝas la papagon.
Se fragon manĝas la papago,
temas pri tute sama ago.
Sed se papagon frago manĝos,
Naturo iom misaranĝas.

Aldone al ĉi tiuj bonegaj helpiloj ŝi aldonas proverbojn kaj nekutimajn rakontojn, kiuj jen kortuŝas, jen ridigas.

Estas facile imagi la inspiron efikon sur la lernanto, kiu jam lernis uzi siajnflugilojn, kaj nun pretas fari ne tro malfacilajn flugojn.

—Ken G. Linton.

"KONSULTU LA KONSILANTON"

Opinions expressed are not necessarily those of the Editor.

"When I told a friend that I'd joined an Esperanto class, he commented: "But Esperantists are 'cranks' and 'ratbags'". Was he right? **Newcomer.**

Dear Newcomer: I've just had a good look in the mirror. He could be right!

Aren't the 'cranks' and 'ratbags' the people who have changed the course of history? Very often, for the better!

Who was considered crazier than Columbus who said he could reach the East by sailing west: Who believed Copernicus or Galileo with their "silly" notions of the solar system? What of the dreamer who claimed man could walk on the moon?

A significant number were convinced that Jesus Christ was a dangerous eccentric and that his followers had "turned the earth upside down".

If a man directs millions to their death, he is often remembered as an honoured military genius. If a man talks seriously about disarmament, he's considered a "crank" and a "ratbag".

The world needs so-called "cranks" and "ratbags". The world needs Esperantists!

—Konsilanto.

Si: Imagu, la najbarino aĉetis saman kostumon, kiel la mia!

Li: Decidu do: nova kostumo estos aĉetata, aŭ ni translokiĝos?

—Monon aŭ vivon! — kriis la bandito.

—Prenu mian vivon. La monon mi ŝparas por mia maljunaĝo.

—Mi katastrofis kaj mia edzino min forlasis.

—Ĉu pro la aŭtomobilo?

—Ne, pro la virino en la aŭtomobilo (Bulg-E-isto)

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: S-ro Mac LeFevre, 231 St. John Street, Launceston, Tas., 7250.

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 222 (302)

MELBURNO

Marto, 1985

SALUTOJ KAJ DANKO

Nun mi resaniĝis kaj la unua devo estas danki S-ron Ralph Harry, kiu devis denove ŝultri la estran laboron de la movado — kaj tiel baldaŭ post sia propra estrado. Sed ŝajne la afero estis ne tre malbona por li, ĉar ni ĉiuj scias, ke, kiel Prezidanto, Vicprezidanto aŭ kelktempa Prezidanto, li same ĉiam laboregas por plibonigi la movadon. Kaj due mi ĝoje dankas ankaŭ tiujn, kiuj helpis Ralph agi en tiu laboro.

Ankaŭ mi ege dankas ĉiujn, kiuj sendis resaniĝ-deziroprimojn al mi. Se mi ne jam skr'bis dankon al ĉiu, tion mi baldaŭ faros, tuj post mia atento al urĝaj AEA-aferoj.

Kompreneble, vi jam rimarkis en 'AE' la decidojn de la Estraro, kiu kunsidis en Armidale en januaro. Pri iu ajn el tiuj aferoj, aŭ pri aliaj, ne hezitu skribi al mi. Mi certe helpos kiel eble plej multe.

Korajn salutojn.

Mac LeFevre, Prezidanto.

STIPENDIO-FONDUSO VALORAS

La Stipendio-Fonduso pruvas sian valoran per la vizito de japana belulino, Yuri Sakomoto, kiu gastigis Shaunnagh Dorsett en sia hejmo en 1983. Shaunnagh, kiu estas abiturienta studento, estas ano de la "Launceston"—a klubo, kaj ŝi gajnis "Stipendion" en 1983 por ĉeesti Esperantan Kongreson ĉe Ikeda, kiu estas granda antaŭurbo de la eĉ pli granda urbo Osaka. Necesis, ke Shaunnagh parolu Esperanton dum sia gastigo en Japanio.

Kvankam 'Juri' bone parolas la anglan, ankaŭ aliajn lingvojn, tamen ŝi preferis, kaj eĉ insistis paroli Esperanton dum sia ferio ĉe ni en Launceston.

La "Launceston"—a klubo aranĝis feston por Juri ĉe la Plenaĝula Eduka Centro. Dum la vespero Juri montris belajn diapozitivojn pri Japanio, kaj la ĉeestantoj ankaŭ ĝus kantadon.

Juri forflugis de Launceston je dimanĉo, la 17-a de marto. Ses klubanoj veturis al la flughaveno por adiaŭi ŝin. Estis tre ĝoja kaj valora vizito, kiu rezultis el la Stipendi-helpita vizito de Shaunnagh en Japanio.

—Mac LeFevre.

LA 5-a A.E.A.-SOMERLERNEJO (Daŭrigo)

Kiel kutime la ĉeestantoj en la somerlernejo malstreĉiĝis per distraj vesperoj kaj ekskursoj. Pri distraj programoj ĉefe respondis Arthur Cocking kaj Marjorie Ellyard. Ĵaŭdon la 10an la vespera programo inkludis la sakŝalmon de Roger Springer, kantojn de Ann Gash, ŝerc-ojn de Trevor Steele, teatraĵeton "En la televizejo" originale verkita de Marjorie Boulton, mallongigita kaj aktualigita kun permeso, de Robby Robertson, kiu ludis rolon kun Eunice Graham kaj Arthur Cocking. Sekvis komuna kantado gvidata de Marjorie Duncan, anekdotoj de Ralph Harry, la "Diplomato kiu ridas", kaj skeĉo de Arthur Cocking kun la helpo de Joyce Turner. Finfine la "Krokodila Sesopo" Olive Russell, Kay McCashney, Aron Davey, Betty Cleminson, Eunice Graham kaj Peter Fyfe, deĵoranta universitato, prezentis satirajn kantojn verkitaĵojn de Peter Fyfe.

Vendredon la 11an Ralph Harry prezentis siajn interesplenajn kinofilmojn de la Aŭstralia Kongreso en Kanbero, kaj la Universala Kongreso en Vankuvero, kaj Robby Robertson prezentis sonbendon de BBC-a programo pri Esperanto, kun la voĉo de J. C. Wells.

Dimanĉon la 13an, libera mateno permesis, ke ĉiuj, kiuj volas, ĉeestu diservon, kaj posttagmeze Joan Green organizis ekskurson per aŭtobuso, ĉirkaŭ la urbo kaj la najbara kamparo. Merkredon la 16an, okazis dua distra vespero. Denove Roger Springer ludis la sakŝalmon, Eunice Graham kaj Robby Robertson prezentis skeĉon, "Post la Nuptovojaĝo", Marjorie Duncan gvidis komunan kantadon, Idyss Einihoviĉ, verkinte teatraĵeton, prezentis "La kuracisto" kun Joan Green, Betty Cleminson, Olive Russell, kaj Sylvia Burkitt kiel S-inoj Somero, Aŭtuno, Vintro, kaj Printempo. Gordon Gregson deklamis la poemon "La Albatroso" de Baudelaire, angle kaj Esperante. Teatraĵeton "La hipokondriulo", verkitan de Helen Stone, reĝisoris Peter Ellyard kaj ludis Kitty Gassner kaj Kathy Montefiore, dum Harry Peddie provizis voĉon ekstere. Alian teatraĵeton de Helen Stone, "Goodbye Sara" (Adiaŭ Sara) anoncis Margaret Chandler kaj ludis Bill Clarke kaj Eric Hewitt; en alia skeĉo "Ok vortoj" suliĉis al John Mills, Eric Hart, kaj Kay McCashney.

Informvesperon prezentis jaŭde la estraranoj de AEA. Ralph Harry klarigis la organizon de la kluboj, la federacioj, AEA kaj UEA. Trevor Steele kiel ĉefekzamenisto pridiskutis la ekzamenojn de AEA, kaj Roger Springer informis nin pri la radioelsendoj pretigitaj por propagandi Esperanton. Ralph Harry laŭlegis tradukon de "The Sentimental Bloke" (La Sentimentulo) esperantigitan de la kursanoj, por estonta Aŭstralia Antologio. Bill Leah prezentis interesan aron da diapozitivoj pri la insulo Maŭricio kaj la dido, birdo konata pro la malapero.

Profesoro R. Gates, Vic-Kanceliero de la Universitato de Nov-Anglio, vizitis la somerlernejon, kaj lin impresis la alta nivelo de la kursoj kaj la Esperanta kulturo. Li pridiskutis kun la estraranoj la eblecon starigi feston post du jaroj en Arm'dale por soleni la centjaran jubileon de Esperanto. Du japanaj gejunuloj, Joŝiko Unno kaj Cutomu Suganami, ĉeestis la somerlernejon dum kelkaj tagoj, survoje ĉirkaŭ la tergloblo per bicikloj. Ilin intervjuis "Arm'dale Express", kiu presigis duonpaĝan favoran artikolon kun foto montranta la eksterlandulojn en konversacio kun gejunuloj el Arm'dale kaj Okcidenta Aŭstralio per Esperanto.

Dum la dua semajno de la somerlernejo, la estraro ricevis leteron de UEA pri la 1988a UK; finfine oni decidis ne okazigi la Kongreson en Aŭstralio pro evidentaj malfacilaĵoj, kvankam la LKK jam multe laboris. Espereble tiu sperto estos utila.

Vendredon la 18an vespere, la ĉefekzamenisto Trevor Steele anoncis la sukcesojn en la Elementa Ekzameno (parola parto) de Irina Timonin, Carson Thomas, Olive Russell, Harry Peddie, Merle Packham, Kathleen Montefiore, Joan Green, Kitty Gassner, Ann Gash, Lesley Casey, kaj Sylvia Burkitt, kiu sukcesis ankaŭ en la skriba ekzameno. Sukcesis en la Supera Ekzameno (parola parto) Terry Metherall, Bill Leah, kaj Gordon Gregson. Tiom da sukcesoj rezultis el gratulindaj laboroj de la studentoj, la instruistoj, kaj la du ekzamenistoj Trevor Steele kaj Ralph Harry. Poste la ĉeestantoj ĝuis instruajn ludojn proponitajn kaj prezentitajn de Marjorie Ellyard.

Multaj kursanoj naĝis ĉiutage en la varmeta naĝbaseno de la Universitato. Ĉiu loĝis en unulita dorm-kaj stud-ĉambro, sed ĝuis la kamaradecon de la Esperanta familio en komuna sidĉambro provizita per granda televidaparato, aŭ en la komforta trinkejo dum paŭzoj inter kursoj, hejmtaskoj aŭ distraĵoj. La tri manĝoj ĉiutage estis abundaj kaj bongustaj, kaj dum du tepaŭzoj aŭ kafpaŭzoj, matene kaj posttagmeze, ni manĝis kukojn aŭ platpanojn kun kremo kaj konfitaĵoj. Nekredeble, ni revenis hejmen iom malpli dikaj, pro sanigaj piediroj tra la pitoreska ĉirkaŭaĵo por viziti la belan originalan domon "Boolumbah" por mangigi la cervojn, aŭ nur por malstreĉiĝi. Kelkaj junaj kunmarŝantoj de Idyss raportis, ke ili revenis tute elĉerpitaj kvankam ŝi daŭre restas verve vigla.

La estraro kaj personaro de la kolegio "Duval" estis ĉiam komplezemaj kaj helpemaj, kaj oni devas aparte mencii la deoranton el la universitata stabo, Peter Fyfe, kiu amikeme aranĝis ĉion laŭ niaj deziroj, kaj rapide lernis iom da Esperanto por kunparoli nin kaj eĉ verki kantojn pri nia somerlernejo.

—Robby Robertson.

**Elĉerpaĵoj el letero de Humphrey
Tonkin (Vic-Prezidanto de UEA)
al Ralph Harry (AEA-Vic-Prezidanto)
14 jan., 1985.**

"La "kondiĉoj", kiujn la Estraro prezentis al la organizantoj de la Kongreso, fontis el la objektiva konstato, ke en 1988, tuj post la grandaj streĉoj kunlige kun la Jubileo, la financa stato de UEA estas verŝajne iom malforta. Se oni aldonas al tio, ke multaj unuopaj esperantistoj elspezos sian monon vojaĝante ĉu al Pekino en 1986, ĉu al Varsovio en 1987, oni povas antaŭvidi iom malgrandan kongreson en Aŭstralio — ĝuste tiam kiam UEA bezonos enspezojn por daŭrigi sian laboron.

En nia letero de Vankuvero mi nenion trovas pri senpaga loĝado en Brisbano. Mi ankaŭ neniel antaŭvidas, ke eventualaj senpagaj flugbiletoj estos je la dispono de estraranoj (kiel mi, ekzemple), kiuj kapablas pagi por ĉeesti la kongreson. Sed evidente bonus se ni povus elnegoci senpagajn biletojn por niaj salajrataj oficistoj kaj por esperantistoj el la Tria Mondo, kiel estas nia intenco.

Mi fortege esperas, ke iel ni sukcesos venki tiujn ĉi diversajn problemojn. Unu el viaj problemoj nunmomentaj estas tio, ke UEA postulas \$5000 por la Propaganda Konto de UEA, se la gajno ne sufiĉos por generi tiun sumon. Por montri man propran bonan volon pri tiu ĉi demando, bonvolu konsideri tiun ĉi leteron mia persona promeso, ke **mi mem pagos \$1000 de tiu sumo** aŭ proporcie pli malgrandan sumon se la bezonata sumo estos pli malgranda ol \$5000. Mi esperas, ke tiu mia kontribuo spronos niajn kolegojn en Aŭstralio kolekti promesojn por kovri la ceteran sumon."

En la nomo de AEA nia Vic-Prezidanto (S-ro Ralph Harry) tutkore dankis al Estrarano Tonkin, bedaŭrante, ke ne eblas nun revivigi la proponon.

**25th AUSTRALIAN
ESPERANTO CONGRESS**

4-11 Jan., 1986 — Perth, W.A.

This congress will be held at St. Catherine's College, one of the residential colleges adjacent to the beautiful University of W.A.

Members will be accommodated in comfortable rooms. The charge for a single room and all meals will be approximately \$30 per day. People wishing to share may have an extra bed placed in the room, when the cost per person will be about \$23 per day.

The University campus is only 5 minutes by car from the centre of the city and buses leave regularly outside the College. See our new Art Gallery, Alexander Library, China Town

Early enrolment will secure your accommodation!

Congress Fee: (before 1-7-85): \$30. After 1-7-85: \$35. Pensioners/Full-time students (before 1-7-85): \$25. After 1-7-85: \$30.

Mail your Congress Fee to the Treasurer **Mr. O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.** If you wish to stay at the College add \$10 for Room Deposit. Please make cheques payable to "Australian Esperanto Congress" and add 12 cents for bank charges.

Second List of Enrolments

10. Evon Arthur, Glendale, N.S.W.
11. Marjorie Duncan, Manly, N.S.W.
12. Eunice Graham, Manly, N.S.W.

13. Sheila Leah, Curlewis, N.S.W.
 14. Bill Leah, Curlewis, N.S.W.
 15. Teresa Metherall, Marmong Pt., N.S.W.
 16. Sylvia Burkitt, Sydney
 17. Marjorie Ellyard, Canberra
 18. Ralph Harry, Canberra
 19. Margaret Robertson, Sydney
 20. Prof. R. Robertson, Sydney
 21. Idyss Einihoviĉi, Perth
 22. Dr. T. Einihoviĉi, Perth.
 23. Mrs. Ruth McGrath, Perth
- State Distribution: NSW 9; W.A. 9; Vic. 2; A.C.T. 2; Q'ld 1.

PROVIZORA KONGRES-PROGRAMO

- Vendredon, 3-an: 19.30 Interkona Vespero
- Sabaton, 4-an:
- 9.30 Registrado
 - 10.00 A E.A. Estraranoj kunvenas
 - 14.30 Oficiala Inaŭguro, Fotografado
 - 19.30 Muzika Vespero
- Dimanĉon, 5-an:
- 9.30 Tuttaga Ekskurso al York kaj Northam
 - 19.30 Di-Servo
- Lundon, 6-an:
- 9.00 Klasoj, Afer-Kunvenoj
 - 14.30 Aŭtobusa ekskurso ĉirkaŭ la urbeĝo
 - 19.30 Flor-Konkurso
- Mardon, 7-an:
- 9.00 Klasoj, Afer-Kunvenoj
 - 14.30 Pikniko en 'Kings- Park'
 - 19.30 Dramo-Konkurso
- Merkredon, 8-an:
- 9.00 Klasoj, Afer-Kunvenoj
 - Libera Posttagmezo
 - 17.30 Riverkrozo, kun ĉefmanĝo
- Ĵaŭdon, 9-an:
- 9.00 Klasoj, Afer-Kunvenoj
 - Liberaj Posttagmezo kaj Vespero
- Vendredon, 10-an:
- 9.30 Tuttaga Ekskurso al Yanchep kaj Two Rocks
 - 6.30 Bankedo
- Sabaton, 11-an:
- 9.30 Oficiala Fermo, Transdono de la flago.

NOVAJ MEMBROJ DE A.E.A.

- Suplemento de la Adresaro de 1984**
- BLOOMFIELD S-ro, Box 1014,
P.O. Crows Nest, NSW 2065
- CHANDLER S-ino M., 20 Rivett Way,
Brentwood, WA 6153
- CLARKE S-ro W., 6 Leura Street,
Nedlands, WA 6009
- DAVEY S-ro A., 146 Hensman Street,
South Perth, WA 6151
- FIRTH S-ro W., Box 1814,
Canberra City, ACT 2601
- FOUR S-ro L., 36 Albert Parade,
Ashfield, NSW 2131
- FYFE S-ro P., Duval College,
Armidale, NSW 2350
- GASH S-ino A., P.O. Box 71,
Nimbin, NSW 2480
- GREGSON S-ro G., 25 Doney Street,
Alfred Cove, WA 6154
- HEWITT S-ro E., 10 Money Street,
Attadale, WA 6156
- HOLBOURNE S-ro P., 4/2 Adelaide
Street, Morningson, V. 3931
- HOWE S-ino K., P.O. Box 149,
Yepoon, Q. 4703
- HUNGERFORD S-ro L., 5 Wilde Street,
Potts Point, NSW 2011
- KELLY S-ro S., 9 Foden Street,
West Brunswick, V. 3055
- LAGUARDA S-ro E., 30 William Ave.,
Warilla, NSW 2528
- LARGE S-ino H., 8 Large Street,
Emu Park, Q. 4702
- McCASHNEY S-ino K., 337 West Coast
Highway, Trigg, WA 6020
- McLATCHIE S-ino T., P.O. Box 162,
Peterborough, SA 5422
- MACRIDAKIS F-ino G., 341 Hume
Highway, Cabramatta, 2166
- MASON S-ro D., P.O. Box 131,
Mansfield, Vic. 3722
- MILLS S-ro J., 20 Rivett Way,
Brentwood, WA 6153
- MONTEFIORE S-ino K., 48 Mathew
Flinders Drive, Yepoon, 4702
- NEWTON S-ro S., Lawton Lodge,
Shanns Avenue, Mt. Martha, 3934
- O'Brien S-ro K. J., 6 Medland Court,
Sorrento, WA 6020
- SHAW S-ro A., 13 Dunlop Street,
A-hburton, Vic 3147
- SMITH S-ro M., 38 York Street,
Epping, NSW 2121
- TIMONIN S-ino I., 6/88 Ocean
Beach Road, Manly, NSW 2095
- TOTH S-ino, 32 Montgomery Street,
West Heidelberg, V 3081
- WEARING S-ro M., 30 Westbury Street,
Hackney, SA 5069

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTO:** La unua kunveno en 1985 okazis je 13-a de februaro. Spite de varmega vetero ĉeestis 20 membroj. S-ino V. Payne vigle raportis pri la Somerlernejo en Armidale. S-roj C. Dean kaj J. Hawks raportis pri la preparlaboroj por la venonta AEA-Kongreso.

Dudek kvin membroj kaj amikoj partoprenis piknikon je dimanĉo, 17-a de februaro, en la hejmo de s-ino Pianta en Woodlands. Estis varmega tago. Kelkaj anoj ludi sur la razeno, sed la plimulto preferis ludi en la domo, kie funkciis klimatzilo.

● **ADELAJDO:** Ges-roj Alan kaj June Doig el Napier, Nov-Zelando, vizitis nin je 26-a de novembro, 1984. Ili revenis de longa vojaĝo, dum kiu ili vizitis esperantistojn en Kopenhago, Londono, Krakovo kaj multaj aliaj gravaj eŭropaj urboj. Estis interese por ni aŭskulti al iliaj vojaĝaventuroj.

Nia Zamenhofa Festo okazis je 8-a de decembro, sed kvankam ges-roj R. Felby iris al la kunveno jam en la mateno por prepari ĉion, estis tre seniluziige, ke entute nur sep personoj partoprenis tiun kunvenon.

S-ano Juhani Vilkki el Finnlando vizitis nin je 24-a de decembro, 1984. Estis plezuro paroli kun tiu perfekta esperantisto, kiu rakontis al ni pri siaj vojaĝoj tra multaj mondpartoj.

La jara ĉefkunveno okazis la 5-an de februaro. La multjara sekretario, Bob Felby, decidis ne plu akcepti la postenon de sekretario. Estis decidite, ke George Clarke restu prezidanto kaj kasisto. Zbigniew Wybraniec transprenis la sekretariecon de Bob Felby kaj oni decidis, ke "Tamen Plu" la bulteno de la societo, ne plu aperos.

● **MELBURNO:** La Jarkunveno okazis je 18-a de februaro. Nur 4 membroj ĉeestis. La sekretario raportis, ke en 1984 la societo havis 25 membrojn kaj 4 lernantojn (1983: 32 membrojn kaj 3 lernantojn). La kasisto ne povis ĉeesti, sed s-ro H. Koppel legis ties finanĉan raporton. Laŭ ŝi la jaro finiĝas per pluso de \$276.19, ĉefe pro la fakto ke "Telecom" repagis al ni \$212 pro tro-pago por anoncoj en la telefona libro.

La estraro por 1985 estas: Prez: S-ro Ken Linton; Vic-Prez: Harry Beechey; An:tataŭa Vic-Prez (kiam la prezidanto kaj vic-prezidanto ne ĉeestos): S-ro Gerald Tumman; Bibliotekisto: Fay Koppel; Sekretario: Herbert Koppel; Kasisto: Errol Chick.

● **SIDNEJO:** Je 4-a de februaro ni re-kunvenis post la ferioj. Joan Green rakontis pri la Somerlernejo en Armidale. Ĉiuj ĝuis la tagojn tie, lernis multon en la diversaj klasoj, kaj miris pri la belaj vidindaĵoj de la urbo. Kelkaj partoprenis en ekzamenoj je diversaj niveloj kaj sukcesis. Ni bonvenigis junulon el Perto, kiu ankaŭ ĉeestis la somerlernejon.

La jarkunveno okazis je 11-a de februaro. Nia societo estas en bona financa stato, kaj nia biblioteko kreskas pli kaj pli. Elektigis la la jena estraro: Prezidanto: Tom Elliott; Vic-Prezidantoj: Sylvia Burkitt kaj Jim Harwood; Sekretario kaj AEA-Raportanto: Margaret Chaldecott; Kasisto: David Gould.

Ni decidis ke, kvankam estos regula instruisto por la novuloj, unufoje monate alia instruisto instruos, por ke la komencantoj povos rilati al diversaj personoj.

—M. Chaldecott.

● **MANLY:** La 27-an de januaro klubanoj ĉeestis la jarkunvenon. Elektigis Robby Robertson kiel prezidanto, Arthur Cocking kaj Eunice Graham vic-prezidantoj, Betty Cleminson sekretario, Frank Mangan kasisto kaj Helen Stone libroagento, Roger Springer kaj Harry Peddie estros la komitaton por elsendo el la regiona radio-stacio.

La 5-an de februaro komenciĝis la unua trimestro en la Eduka Centro kun tri grupoj. Bob kaj Alice Colley el Anglio, Juhani Vilkki el Finnlando kaj Aaron Davey kaj Gordon Gregson el Perto estis bonvenaj gastoj de Manlyanoj.

— Eunice Graham.

● **BRISBANO:** Nova jaro komenciĝis la 4-an de februaro kun la kutimaj kvar grupoj: klaso por komencantoj (Annie Spencer) klaso por progresantoj (Ray Ross), diskutgrupon gvidas Tom O'Grady kaj literaturan grupon Trevor Steele.

La "Loka Kongres-Komitato", kiu ege laboris pri la "efemera" Universala Kongreso, nun prizorgas detalojn pri Pacifika Kongreso en Brisbano, septembron, 1988. Fakte, ni jam sukcesis pri la ĉefproblemo, loĝejoj; pluajn detalojn ni sendos poste. Ruth Morrison sukcesis pri ampleksa artikolo, kun paralela traduko en

Esperanto, en la dimanĉ-jurnalo "Sunday Mail". La artikolo bone propagandi pri la Internacia Lingvo. —R.R.

● **TOOWOOMBA:** La Zamenhofa Festo okazis la 15-an de dec., 1985. Sep membroj ĝuis posttagmezon en milda vetero per ludoj, babilado kaj manĝeto. Esperanto-ekspozicio okazis en la loka biblioteko de la 25-a de januaro ĝis la 25-a de februaro. De la 15-a ĝis 17-a de februaro nia grupo de oris ĉe stando kadre de la Hobbies & Crafts Spectacular", organizita de la Rotaria Societo de Suda Toowoomba.

● **S-ino Sylvia Burkitt, Sidnejo** sukcesis pri la Aŭstralia Norma Elementa Diplomo kun Honoro.

● **La Aŭstralian Norman Elementan Diplomon** gajnis ankaŭ S-ino Irina Timonin, Manly kaj S-ino A. Kath Montione, Yeppoon. **La Superan Diplomon** gajnis S-ro William Leah (Curlewis). Ni gratulas.

EL LA FEDERACIOJ

● **KVINSLANDO:** Anoj nun sin preparas por la unua konferenco 1985, ĉe Buderim, je 23-24a de marto. Loĝejo estas Motelo "Mark Anthony"; kunveno, manĝejo kaj distrejo ĉe restoracio de RonnyCoxhell. Dimanĉe ni vizitos allogajn ĉe la Sunbrila Marbordo. R.R.

● **VIKTORIO:** La 14-a Generala Kunveno de la Federacio okazis je 1-a de feb., 1985, en la Esperanto-Domo. Nur sep membroj ĉeestis. Elektiĝis nova estraro: Prezidanto: Jack Fallu; Vic-Prez.: Margaret Miller; Sekretario: Ivy Fallu; Kasiro: Eva Trainor; Redaktoro: Herbert Koppel; Publikaj rilatoj: Gerald Tumman.

Pro altigo de la afranko por "Melbourne Esperanto News" la kunveno decidis altigi la membrokotizon de \$2 al \$3, sed tiuj, kiuj pagos 2 jarojn kune, pagos nur \$5.

Je 23-a de februaro 15 membroj partoprenis en pikniko en la bela "Wattle Park", inkluzive de ges-roj O'Brien el Geelong.

MORTIS S-INO MAC SMITH

Mortis en Orange, NSK., fine de decembro, 1984, S-ino Berta Mac Smith, 92-jara. Ŝi estis treege aktiva en la Asocio de Kamparaj Virinoj, kies prezidanto ŝi estis en 1947. Ŝi estis prezidantino de la Orange-Asocio de Skolitoj, de la distrikta historia societo kaj de multaj aliaj lokaj organizoj.

Ŝi estis grava subtenanto de Esperanto laŭ persvadis, ke la Asocio de Kamparaj Virinoj subtenu Esperanton. Niaj kondolencoj iras al ŝiaj infanoj Lorna, Lance kaj Felicity.

LA "A.E." SUBTEN — FONDUSSO 1985

S-ino T. Metherall, Marmong	
Pt. NSK	\$10
S-ino M. Ellyard, Kanbero	5
S-ro C. Dunstan, Brisbane	5
F-ino A. Curtis, Tamborine, Q'ld	5
S-ino G. Sliwa, Perto	2
S-ro H. Gilbert, Cairns, Q'ld	15
S-ro Herbert Koppel, Melburno	10
S-ino Fay Koppel, Meburno	10
S-ro Chris Dean, Perto	10
Ges-roj T. Einihovici, Perto	20

\$92

La Aŭstralia Esperanto-Asocio deziras danki al Gerald kaj Ruth Tumman pro ilia grandanima donaco de \$1000 (mil dolaroj) al la Stipendia Fonduso. Laŭ la deziroj de Ges-roj Tumman AEA uzu la donacon por ebligi al talentaj junaj esperantistoj partopreni kongresojn aŭ somer-lernejojn en Aŭstralio aŭ en eksterlando.

GAZETOJ EN AŬSTRALIO: La Federacio de la Itala Gazetaro en Eksterlando okazis sian unuan kunvenon en la sidejo de la Itala Kultur-Instituto de Melburno (Aŭstralio).

Kial ĝuste en Aŭstralio? Ĉar en tiu fora lando troviĝas la plej malproksima

kaj malplej konata itala komunajo, tiu kiu havas pli da problemoj por konservi ligiton kun la patrolando

Aŭstralio estas ekzemplo de plurkultura socio. Malgraŭ tio, farigas pli kaj pli problemeca la pluvivo de la itala gazetaro en tiu lando, ne nur pro la kreskantaj lingvaj malfacilaĵoj, sed ankaŭ pro la manko de kultura interligo kun la dua generacio de la italaj migrintoj.

(A De Salvo en la Esperanto-Emisio de Radio Roma).

RECENZOJ

● **SALUTON** — Esperanto Aŭtodidakte: Verkita de Audrey Childs-Me. Eldonita de Stafeto, Antverpeno, 1983, 194 paĝoj + 40 paĝoj de aldonaĵoj. Prezo \$11.95 ĉe AEA-Libro-Servo.

Audrey Childs-Mee estas bone konata kiel instruistino de Esperanto, kiu specialigas en la uzado de la "Rekta Metodo", kiel postvenanto de Andreo Cseh. Ŝi instruas en Roterdamo kaj Gresillon, kaj, en 1979, ŝi vizitis Aŭstralion, por instrui en la Somerlernejo en Toowoomba, kie ŝia lerteco forte impresis la ĉeestantojn.

En ĉi tiu libro ŝi entreprenas la preskaŭ necblan taskon produkti libron, kiu, unue servus por instrui memlernantojn, sen iu ajn vorto de nacia lingvo; kaj, due, taŭgus por grupanoj kun kvidanto La prezentado estas bona, sur bonkvalita papero, kun klara presado kaj vivecaj amuzaj ilustraĵoj de Stano Markovic. Kvankam ŝi komencas en nekutima maniero, per la enkonduko de la akuzativo kaj diversaj vortordoj sur Paĝo 1 ("La viro vidas la virinon — La viron vidas la virino"), tamen la sinsekvo de la materialo estas interesa kaj logika. Sed, ŝajnas al mi, ke la memlernanto sentus la bezonon de gvidanto —almenaŭ de homo kiu povus respondi al liaj demandoj.

La unua mencio pri prononcado kaj la sonoj de Esperanto estas sur paĝoj 175-178. Poste en ŝlosilo, estas "Esperanto-sonoj en kelkaj naciaj lingvoj", sed la uzanto bezonus scii la sonojn je la komenco. Ĉu estus eble aldoni liberfolian

suplementon en la nacia lingvo de la memlernanto kiam li aĉetas la libron? La folio povus direkti lin al la uzado de la ŝlosilo, kaj sugesti metodon gajni la plej bonajn rezultojn en la uzado de la libro. La materialon ŝi prezentas sen ĉapitroj, aŭ iu ajn intertempo por signi la finon de sekcio. Ĉu ne estas oportune por la memlernanto, se estus paŭzo de tempo al tempo, por signi finon de sekcio kaj por prezenti la materialon por reviziado Fakte, estas kelkaj paĝoj de reviziado, sed la libro ne klare indentigas ilin.

Por lernantoj, kiuj havos gvidantojn, la libro tre bone taŭgos; mi mem intencas uzi ĝin. Kaj la gvidanto povus esti el iu ajn lando, kiu ŝatas uzi la "rektaĵo metodon" Do tre utila kaj uniuersala libro.

Bonhumore ni devas sciigi la verkinton, ke Tasmanio estas parto de Aŭstralio, kaj ne sendependa insulo. Mi estas certa, ke ŝi ne volas ofendi la Tasmanianojn, kvankam plaĉas al ni, ke Aŭstralio ricevis mencion en la teksto.

—M. Ellyard.

VORTOJ KUN FLUGILOJ. Citajoj el la tuta mondo. Kompilita de Ralph Harry; eld. de Aŭstralio Esperanto-Asocio. 1984 \$3.40 de AEA-Libro-Servo.

Kiom hezitiga estas recenzi kompilaĵon faritan kun grandega zorgo kaj, sendube, tra longa tempo! Almenaŭ se le recenzisto havas kritikojn, ĉar ĉu la kompilisto ne povus diri: "Kial vi ne mem kompilis ĝin, se vi pensas, ke vi scias tion pli bone; almenaŭ ĝin faris mi, kaj nenion vi". Mi sekve recenzas en honto! I

Oni povas kompili citaĵojn laŭ tri ordigoj: oni povas ordigi la citaĵojn laŭ la aŭtoroj, kun indeksoj de la temoj (kategorioj) kaj de la precipaj vortoj (kiuj kelkfoje samas la temojn), aŭ laŭ la precipaj vortoj (kuj servas ankaŭ kiel rekonvortoj), kun indeksoj de temoj kaj de aŭtoroj, aŭ laŭ la temoj, kun indeksoj de aŭtoroj kaj de vortoj. La lastan metodon oni povas samigi al la "tesaŭro" de Roget. Laŭ mi la plejmulto da homoj ĝenerale bezonas ekscii citaĵojn laŭ la lasta metodo, ĉar ili verkante bezonas subite trafan citaĵon por ideo kiun ili disvolvas en sia menso kaj en sia verkaĵo.

Kaj ĉar la ordo de la kategorioj povas dependi tute de la kompilisto kaj ankaŭ povas nombri centojn (vidu Stevenson!), mi preferas la ordigon de Ruget.

Ralph Harry elektis la unuan ordigon, t.e. laŭ aŭtoroj. Mi tre dubas ĉu tio estas utila en multaj kazoj; ĝenerale oni scias pri kiu temo oni verkas, sed neofte pri la aŭtoro kies citaĵo troviĝas hazarde en la kompila o. Serĉi en la indekso (kiu ĉi tie estas kombinaĵo de vortoj kaj de temoj) ĝenerale estas temporabe, eĉ kolleterite (por "morto" oni devas legi sur 16 diversaj paĝoj, por "ami" sur 20, kaj la nombroj pliiĝas ĉe ĉiu nova eldono). Mi estus konsilinta uzi la trian metodon (laŭ temoj), sed tiu konsilono estas tro malfrua, ĉar la multa laboro jam faritas.

Jen kelkaj kritiketoj. Kial enestas "nur malmultaj proverboj"? Ĉu ne pli bone neniuj, au multaj (ĉar ankaŭ en proverboj "resumiĝas momento de la homa penso (Waringhien-Kalocsay). La Biblio havas nur dek citaĵojn (laŭ Ralph ni povas mem trovi ilin en la Biblio), sed la "Nobla Korano" 14 (el kiuj 11 estas nur religiaj ordonoj, ne "resumiĝoj de momento de la homa penso"). Ĉu ĉiuj Esperantistoj estas Kristanoj? Mi krome ellasusu plurajn citaĵojn kies valoro estas nur aŭ beletra aŭ historia kaj mora.

Mi laŭdas la ideon de citaĵaro en Esperanto. Mi laŭdas la multan laboron faritan de la aŭtoro. Mi laŭdas liajn konduktprincipojn (klarigitajn en la "Enkonduko"): ke la Citaĵaro estu vere internacia; ke ĝi enhavu citaĵojn ankaŭ de Esperantaj verkistoj; ke ili estu jam internacie pruvitaj; ke ili estu tuj troveblaj; ke ili estu fidindaj tradukoj; ke ili estu pri ĉiu temo por ĉiu okazo.

Konklude do: interese ga libreto por tralegi kaj trastudi, sed limigite utila por uzi.

—Marcelo Leereveld.

NOVAJ STRATNOMOJ: Kio povas okazi, se la administrantaro de iu urbo abrupte decidis starigi novajn regulojn por la nomado de la stratoj? Kompreneble, povas estiĝi kunfuza.

Tio okazis en la vilaĝo Chiusa/Klausen, en la norditala provinco Bolzano/Bozen, kie oficale regas trilingvismo

(temas pri la lingvoj germana, itala kaj ladina). La urba administrantaro, konstatinte ke la stratoj ne havas oficialajn nomojn, sed ke ili estas parkere nomataj de la loĝantaro laŭ tradiciaj indikoj, decidis doni nomojn al la stratoj kaj starigi indukajn ŝildojn. Tio kuntrenas, interalie la neceson ŝanĝi ĉiujn personajn dokumentojn kaj rajtigilojn, kun la konekajj kostoĵ kaj tempoperdoj.

(A. De Salvo en la Esperanto-Emisio de Radio Roma).

NOVAJ LIBROJ

(Mallongigoj: B. ilustrita, 1-por infanoj, G-Geografio, N-Romano, S-Teknika, L-Legolibro, b-broŝurita)

Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Teknologio 1982	S 90b	\$5.00
P toreska Pekino G 75b		2.20
Feliĉa Birdo BN 50b		1.05
Vortoj kun Fugiloj, R. Harry M 64b		3.40
Gerda Malaperis, C. Piron 48b		2.05
Albumo pri Cinio BG 100b		4.30
Esperanto's Time Has Come, S. Nisbet 22b		0.80
Kolorigoj Bl 6x 16b		6.25
Bonkora Ŝjaudon, Mej Jing Bl 56b		2.50
Jamborea Lingvo, J. Hammer L 60b		1.40
International Language for Scouts, G. Rust L 68b		2.50
Mi Serĉas M'an Perditan, S. Silvestien BNI 108b		8.10
La Sindonema Arbo, S. Silvestien BNI 60b		5.40
Salato, M. Savir N 160b		12.60
Bakŝis, L.N.M. Newell N 153b		12.50
Esperanta Antologio 1887-1981 P 885B		23.70
Saluton Esperanto Aŭtodidakte, Kasedo		5.70

Rehaveblas post longa manko:

Esperanto for Beginners, M. C. Butler	0.65
Concise EUP Dictionary, J. C. Wells	11.95

Mendu de A.E.A. Book Service
P O. Box 230, Matraville, NSW, 2036

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: S-ro Mac LeFevre, 231 St. John Street, Launceston, Tas., 7250.
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 223 (303)

MELBURNO

Aprilo-Majo, 1985

KUN GRANDA BEDAŬRO

NI DEVAS ANONCI LA MORTON DE

U.E.A. — ĈEFDELEGITO

KENNETH GORDON LINTON, F.A.E.A.

JE LA 9-a DE MAJO, 1985

NEKROLOGO SEKVOS VENONTNUMERE

25th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

4-11 Jan., 1986 — Perth, W.A.

This congress will be held at St. Catherine's College, one of the residential colleges adjacent to the beautiful University of W.A.

Early enrolment will secure your accommodation.

Congress Fee: (before 1-7-85); \$30
After 1-7-85: \$35. Pensioners/Full-time students (before 1-7-85); \$25. After 1-7-85: \$30.

Mail your Congress Fee to the Treasurer, **Mr. O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.** If

you wish to stay at the College add \$10 for Room Deposit. Please make cheques payable to "Australian Esperanto Congress" and add 12 cents for bank charges.

Third List of Enrolments

24. Eva Matasin, Sydney
25. Doris Sinclair, Nambour, Q'ld.
26. Kay Howe, Yeppoon, Q'ld.
27. Malcom Ross, Manly, NSW
28. Dulcie Sawkins, Perth.
29. Ken Linton, Melbourne
30. Hertha Mueller, Sydney.
31. Annie Spencer, Brisbane
32. Isabel Gale, Melbourne
33. Elaine Pianta, Perth
34. Rita Dunbar, Sydney

35. Berilo Loh, Manly, NSW
 36. Jan Nelson, Canberra.
 37. Tom Elliott, Sydney
 38. Mavis Elliott, Sydney
 39. Kay Andersen, Brisbane
 40. Len Eddington, Perth
 41. Galina Sliwa, Perth
 42. Kay Morrison, Manly, NSW
 43. Peggy Ross, Brisbane.
 44. Ray Ross, Brisbane.
 45. Sybil Martin, Brisbane
 46. Gaye Phillips, Brisbane
 47. Shirley Gradussov, Perth
 48. D-ro Ellis, Perth
- State Distribution: N.S.W. 17; W.A. 15; Q'ld. 9; Vic. 4; A.C.T. 3.

DRAMO-KONKURSO: Denove okazos Dramo-Konkurso. La nuna "ten-anto" de la AEA-Dramo-Sildo estas la Okcident-Aŭstralia Esperanto-Ligo de Perto. La Kanbera Esperanto-Klubo jam anoncis, ke ĝi partoprenos en la konkurso. Ĉiuj aliaj grupoj, kiuj deziras partopreni nepre informu la Komisiiton (**Herbert Koppel, 41 Byfield St., Reservoir, 3073**) pri la titolo de la teatraĵo kaj la proksimuma tempodaŭro. Bonvole notu, ke teatraĵoj devas esti almenaŭ dekmintaj kaj se eble ne pli longaj ol 30 minutojn.

D-ro Arthur Baur en SVISA RADIO INTERNACIA

LA FEDERATION INTERNATIONALE DE FOOTBALL ASSOCIATION

Oni legas ofte la esprimon "la reĝo futbalo", kaj efektive tiu titolo estas pravigita, se oni observas la enorman rolon, kiun tiu sporto ludas en la hodiaŭa mondo. La grandaj internaciaj ĉampionadoj movas la homamasojn kaj vekas pli da emocioj ol iu ajn alia evento. Tamen kio hodiaŭ estas potenco, antaŭ cent jaroj ne ekzistis kaj antaŭ okdek jaroj estis modesta planto. Tiam, en la jaro 1904, naskiĝis tio, kion oni nomas hodiaŭ "internacia futbalo", kaj al tio mi dediĉas min en mia hodiaŭa elsendo.

Kial mi elektis tiun temon? La kaŭzoj estas diversaj, unue la aĝo de 80 jaroj signifas certan jubileon, due la jubileo estis festata en Zuerich per kongreso kaj matĉo inter federacia Germanio kaj Italio, inter kiuj ja la lasta monda ĉampionado estis decidita, kaj trie la organizo, kiu direktas la internacian futbalon, havas sian sidejon en Zuerich. Tio donis al mi la eblecon viziti ĝin kaj persone informiĝi. Tiu organizo estis fondita en Parizo kaj tial ricevis francan nomon, kiu restis, nome Federation Internationale de Football Association, do INTERNACIA FEDERACIO DE ASOCIA FUTBALO. La fakuloj tuj komprenis: asocia futbalo estas la nomo de la speco de futbalo, kiu nun internacie estas ludata. Ĝia patrujo estas Anglio, kie oni nomas ĝin ĝuste "association football" aŭ soccer, distingante ĝin de aliaj specoj kiel rugby aŭ baseball. La organizo

havas mallongigitan nomon FIFA, kiun mi nun ankaŭ uzos.

La Fifa do havas sian sidejon en Zuerich kaj posedas tie, en tre bela situo super la urbo kun elvido sur la lagon kaj al la alpoj, grandan kaj elegantan domon, kiu estis finkonstruita antaŭ 9 jaroj. Tie laboras 22 oficistoj sub la direktado de la ĝenerala sekretario Joseph S. Blatter, poliglota valezano, kiu transprenis tiun taskon antaŭ 3 jaroj: sed jam ekde 1975 li estris la teknikan departementon. Kelkaj ciferoj montru la amplekson kaj gravecon de tiu internacia organizo. Ĝi havas 150 membrojn, tio estas la landaj futbalaj asocioj en 150 landoj, kiuj ĉiuj estas samrajtaj en la universalaj kongresoj, okazantaj ĉiun duan jaron. En ili estas organizita 52 milionoj da futbalistoj aŭ piedpilkudantoj por uzi alian vorton. Nombro de landaj asocioj en ŝtatoj antaŭ nelonge fariĉintaj sendependaj atendas antaŭ la pordoj de la Fifa, kiu do kreskas ankoraŭ pli. La jarkotizoj estas malaltaj nur 300 frankoj, sed la Fifa tamen disponas pri konsiderindaj rimedoj, ĉar ĝi ricevas procentaĵon el la gajno de ĉiu interlanda matĉo kaj kompreneble ankaŭ de la mondaj ĉampionadoj, kiuj okazas ĉiun kvaran jaron.

Kiel mi jam diris, la komenco estis modesta. La 21-an de majo, 1904 kunvenis en Parizo en la sidejo de la franca unuigo pri atletismo reprezentantoj de naciaj futbolasocioj el 7 landoj, nome

Francio, Belgio, Danio, Nederlando, Hispanio, Svedio kaj Svislando. Ili decidis fondi la federacion, pri kiu ni okupiĝas hodiaŭ. Strange estas, ke la angloj, kiuj ja inventis la futbalon, ne partoprenis komence kaj unue devis esti persvadataj, ke tio estas bona afero. Ili aliĝis en 1905, krome aliĝis tiam la landaj asocioj de Germanio, Aŭstrio, Italio kaj Hungario. La asocio kreskis kaj jam antaŭ la unua mondmilito havis membrojn en norda kaj suda Ameriko. Nur pene ĝi travegetis la mondiliton kaj poste nur nombris 20 membrojn. Tiam ĝi havis la bonŝancon, ke tre kapabla kaj sindonema franco Jules Rimet transprenis la prezidantecon kaj dum 33 jaroj gvidis ĝin kun granda sukceso. Sub li la Fifa decidis en 1928 unuafoje organizi mondan ĉampionadon, kaj Urugvajo ricevis la taskon organizi ĝin en 1930. Partopreni en monda ĉampionado estas la ambicio de ĉiu landa futbala asocio, sed tiam ankoraŭ tio estis io nova, kaj la plej multaj eŭropaj asocioj timis la tempoperdon kaj la elspezojn, tiel ke nur kvar, nome Francio, Belgio, Jugoslavio kaj Rumanio, kunludis en Montevideo.

La dua monda ĉampionado okazis en Italio, la tria en Francio kaj la kvara fariĝis viktimo de la milito. Nur en 1950 denove okazis monda ĉampionado, kaj transprenis ĝin Brazilio, kaj la kvina estis organizita en Svislando, kaj de post tiam ne plu okazis interrompo. Ĝis 1978 ludis nur 16 ekipoj en la finalo, en 1982 oni altigis la nombron al 24 konforme al la plialtigita nombro de Fifa-membroj.

Estas menciinde, ke la Fifa evitis la disputojn, kiuj damaĝas la laborojn de la internaciaj politikaj organizaĵoj. Membroj estas ambaŭ koreaj ŝtatoj kaj eĉ Popola Ĉinio kaj Taipei same pace kunlaboras kiel Israelo kaj la arabaj ŝtatoj. La Fifa donis al si tre striktajn reglamentojn pri la okazigo de internaciaj matĉoj, kaj ĝi ankaŭ kreis ekzaktajn regulojn por la matĉoj mem kaj la funkciadon de la arbitroj. La Fifa havis la ŝancon esti gvidata longe de tre efika prezidanto, la jam nomita franco Jules Rimet. Depost 10 jaroj ĝi denove havas tre kapablan prezidanton en la persono de la brazilano D-ro Joao Havelange, kiu gvidas la asocion en la maniero de moderna manaĝero. Li ne kontentiĝas daŭrigi nur la bonan funkciadon de la asocio, sed li vastigas ĝian aktivecon

enkondukante la mondajn ĉampionadojn de junuloj, kiuj nun jam kvarfoje okazis, kaj precipe li insistas helpi la landojn de la tria mondo, por ke ankaŭ ĉe ili la futbalo enradikiĝu, ke ili profitu el la instruado de la fakuloj kaj povu kun bonaj ŝancoj partopreni en la internaciaj konkursoj. Tiuj klopodoj jam portis fruktojn.

KONFIDENCAJ ANALOJ DE 1984 (Nepre eldonendaj) de ROLO

"1984" havas specialan signifon por Esperantistoj, ĉar ĝi estas la jaro antaŭvidita de George Orwell (pron. aŭbone) en sia libro unue eldonita en 1949. Dum la pasinta jaro oni oftege menciis kaj mallaŭdis "Newspeak" (novparol'), kiu estis artefarita de Orwell kiel la oficiala lingvo de Oceanio, "elpensita por plenumi la idealogiajn bezonojn de Ingosok, ĵingsok), aŭ angla socialismo". Orwell preskaŭ certe pruntis kelkajn facetojn de Newspeak el alia artefarita lingvo, Esperanto, dum vizitoj en Parizo al sia onklino, la edzino de Lanti, alinome Satano. Ekzemple, Newspeak havis universalan mal-forman antonimon, kiun kelkaj neologismaj poetoj konsideras diabla limigo de iliaj kreivaj pensoj. Sed estis unu esenca malsimilo inter Newspeak kaj Esperanto. Esperanto tute ne estis deviga jargono de iu ajn ŝtato, eĉ de iu burokrataro. Esperanto estis lingvo de liberaj frenezuloj.

1984 estis ankoraŭ la jaro de la arboj. En multaj landoj, precipe en Afriko, oni forhakis la arbarojn por permesi al la vento facilecon de blovado, kaj por liberigi la polvon, kiu kutime estis subpremata de la farmistoj por nutri grenon, herbon kaj fruktarbojn. En landoj, kiaj ekzemple Aŭstralio, kie oni jam detruis preskaŭ ĉiujn arbojn, kelkaj lernejoj plantis arbidojn, por ke oni povu studi tiun specion de la flaŭro. En Hindio, kie, laŭ kutimo, vidvinoj sin bruligas en fajro kune kun la kadavroj de siaj mortintaj edzoj, kutimo kiu uzis multe da ligno, oni klopodis persvadi la virinojn uzi, anstataŭ lignon, sekigitan sterkon, de kiu ŝajne estas senlima stoko, produktajo de la parlamenta sistemo.

Same, 1984 estis jaro de liberecoj de bestoj. Kiel kutime, la movado por la liberigo de bestoj estis tre aktiva por protekti la fokojn kontraŭ la damoj.

kiuj ĉasas peltojn . . . ne senpere, sed per la ĉasado de viroj, kiuj ĉasas la fokojn, kaj ankaŭ vulpojn kaj eĉ tute senpekajn vizonojn. Oni plendis, ke en multaj zoologiaj ĝardenoj oni ne respektas la privatan vivon de la bestoj, sed senkompatate rivelis detalojn de la seksa vivo de, ekzemple, la granda aŭ giganta pando, pro tio nomata "melankolia". En Aŭstralio oni ĉesis la insultadon de koaloj, sed estis tre kruela al la goriloj, kaj insistis, ke ili gravedigu la inojn ne laŭ la kutima metodo, sed per artefarita semo en vitrino. Por tio la Societo Kontraŭ Krueleco al Bestoj (SKKB) insistis, ke oni ne elmontru gorilojn en cirkoj, aŭ eĉ en skvaroĵoj. Tial oni inventis novan specon de cirko, en kiu nur homaj Aŭsanoj saltus tra ringoj, kaj la dresistoj devus preni ĉerizon el la buŝo de feroca femalo de la specio **Homō sapiens**. En Anglio, post naskiĝtaga bankedo de kvinlandaj bananoj, la plej aĝa gorilo en la mondo mortis. En Anglio ankaŭ estis batalo inter la Princo de Marso, kiu insistis, ke simioj manĝu sukeron, kaj la verduloj, kiuj subtenis la rajton de ĉiu besto esti vegetarano. Plej kruela ago estis la ŝtelo de bebo el Pavio (paviano) por provizi orgenon por senkora usonano. La kontraŭkrueleca brigado militis ĝis la finfino de la jaro. Taĉmento en Anglio, en Decembro, prenis la kadavron de Lordo Beaufront, la perfidulo kiu kovaĉis Idon, kaj donis ĝin al vulpoj por kuraĝigi ilin en ilia batalado kontraŭ la anglaj ĉasaĉistoj, ĉefe de la Ruĝa Familio.

Sed super ĉio 1984 estis la Jaro de la Familia Politiko — la baletto internacia de Prezidentoj kaj Princoj, Patroj kaj Filoj.

En Aglio, la lando de la Steloj kaj Strikoj, post la kvazaŭaj militoj de la Olimpiaj Ludoj, alinome la komercaj Ludoj de la Anĝeloj, okazis en novembro la lukto ĝis la morto inter la Elefanto kaj la Azeno. La Elefanton rajdis tiu furora vakulo, Ronaldo Reganto, filmaktoro kaj heroo de la rajdejoj. Li estis 70 jaraĝa sed preparis sin por la konkurso per renaskiĝo por fariĝi Renato. Li pretendis, ke kiel 70-jarulo li havus maljustan avantaĝon kontraŭ siaj rivaloj, la azenuloj. Renato insistis, ke li volonte parolos kun ursuloj pri paco. Por provi tion, li gastigis Ardeon la Gruon komikan, aŭ Komikonulon en la Blanka Domo

La Dementakretna Partio havis pli da malfacilaĵoj elektante la rajdanton de la azeno. La azenanoj (alinome zenananoj aŭ eĉ zenananoj) malakceptis Jesulon, la Filon de Joĉjo, kiu aspiris loĝi en la Nigra Domo. Anstataŭe ili subtenis Freĉjon la Monodelfo (parenco de la posumo!), la monde lamentata plekdanto el la Stato Minehaha (rideto!). Lia kuranta kamaradino, la unua kandida aspirino por vic-prezidento, estis ferulino. Ŝi estis bona debutanto, sed bedaŭrinde devis reveli siajn intimajn aferojn, kaj la aferojn de sia edzo, kiu povus esti fi -nacistoj!

La unuan mardon de Novembro estis terglito en Aglio. Renato refariĝis Reganto kaj estis ŝutita al la Blanka Domo por daŭrigi la ludadon de "Stelomilitoj" sur sia persona komputilo, kaj por fari vizitojn al Unuiĝintaj Nazioj. La Registaro de Nikarago anoncis, ke ĝi antaŭvidis viziton de elefantanoj al ĝia lando, sed la marinitoj (pokitaj marsoldatoj) restis hejme. Ili bezonis ripozon post la vizito al Libano, kie kelkaj liberaj bananoj estis senditaj al la aglia ambasado kaj faris multe da bruoj.

(Daŭrigota)

FRATULOJ DE A.E.A.

A.E.A. havas honorinsignon—"Fratulo de A.E.A."—"por Esperantisto, kiuj elstare laboris por AEA kaj por Esperanto ĝenerale". Rekomendoj estas farataj al la Estraro fare de la aro de Fratuloj (vidu nian Jarlibron, p. 44).

La Fratuloj aktuale interkonsultas pri eventualaj rekomendoj. Oficistoj kaj komisiitoj de A.E.A. (servantaj kaj antaŭaj), estas aŭtomate konsiderataj. Se iu membro opinias, ke persono, kiu neniam havis oficon aŭ komision en A.E.A. tamen meritas konsideron, bonvolu fari sugeston **konfidence** al unu el la Fratuloj.

"KONSULTU LA KONSILANTON"

"Konservu la Regulojn" skribas: "Mi ĵus legis — en verko de fama aŭtorino — fabelon pri Adamo kaj Eva de la Biblio. Kial Eva? Mi lernis, ke ĉiu substantivo estas "O"—voĉo kaj la "A"—vorto estas adjektivaj. Estas nun 'laŭmode'

ŝangi la finan leteron por indiki la sekson de persono."

Kara Konservu: Kelkaj spertuloj nuntempe rekomendas, ke ni uzu nomvortojn kiel Eva, Berila, Elizabeta k.t.p. por eviti sekskonfuzon.

Ni fieras pri la fakto ke ni nepre NE havas esceptojn al niaj reguloj: ni havas regulojn por obei, ne por rompi. Ni devas esti zorgemaj, ke ĉi tiu fanfaronajo ne estos vana. "Konsilanto" (kiu kompreneble neniam pretendis, ke li estas tutsaĝa aŭ tutscia) preferas lingvon, kiu, malsimile al la angla, estas la sama hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ — "kiel ĝi estis je la komenco, estas nun kaj ĉiame restos." Ni bezonas novajn modojn kiel ni bezonas truojn en niaj kapoj.

Sed ĉu "Eva" indikas novan modon? Ĉu ni havas regulon kiu konstatas, ke nomoj de lokoj kaj homoj estas nur substantivoj? Mi dubas. Nomoj prezentas problemojn. Ĉu ni diru "Bondi" aŭ "Bondio", "Charlie Chaplin" aŭ "Karlo Ĉaplino", "Wagga Wagga" aŭ "Vagao Vagao"?

Nun pripensu! En Genezo, kiun Zamenhof tradukis, ni legas "Adam" ne "Adamo" kaj "Eva", ankaŭ "Kain", "Habel", k.t.p.

La Majstro estas parolinta: "Eva", ne "Evo".

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTO:** Okazis io nova ĉe ni: S-ino I Einihovici organizis "Garaĝ-Bazon" per helpi la fonduson por la venonta aŭstralia kongreso. Pluraj membroj donacis varojn, eĉ monon, kaj la rezulto estis \$300.

Je 27-a de februaro D-ro Einihovici parolis pri la Universala Kongreso, kiu okazos en la germana urbo Augsburg kaj S-ro Hawks montris lumbildojn pri vojaĝo tra Nov-Zelando.

La 13-an de marto D-ro Einihovici raportis pri Esperanto-novajoj; S-ino McGrath parolis pri Esperanto-Kongreso kiu okazos en la urbo Llandudno (Kimrujo). S-ro Hawks, kiu iam vizitis tiun urbon, aldonis priskribon pri ĝi.

● **MELBURNO:** Lastatempe anoj de la Melburna E-Societo ĉuis atentokaptajn programojn. Je 11-a de februaro, Harold Beechey parolis pri la "Runoj" multsig-

nifaj alfabetaj ŝtonoj de la praskandinavo. Li ankaŭ montris modelan ŝtonaron kaj invitis al provoj prognozi la sorton per taŭga selekto de ŝtonoj.

Je 25-a de februaro Marcel Leereveld montris siajn belajn kolordiapozitivojn pri Suda Hindio. Semajnon poste, ni bonvenigis nian malnovan membron Cliff Tronerud, kiu nun loĝas en Kvinlando. Li vizitis Melburnon por festi, kun sia familio, la 50-an datrevenon de la geedziĝo.

Marcel Leereveld, 25-an de marto, prelegis pri siaj vagadoj tra Norda Hindio. Li montris lumbildojn pri mirindaj sanktejoj kaj temploj.

La OAKLEIGH-grupo 5/2, elektis la jenan estraron: Prez: Jack Fallu; Vic-Prez: Gladys Burmeister; Sekretario/Kasisto; Ann Hearn; Vic-Sekretario kaj Bibliotekisto: Ivy Fallu.

La Waverley-grupo elektis novan estraron: Sandy Burke, Prezidanto; Isabel Gale, Sekretario/Kasisto; Margaret Young Bibliotekisto kaj Margaret Miller reprezentanto al la Viktoria Federacio. La iarkunveno finiĝis per prelego de Sandy Burke, kiu prelegis kun diapozitivoj, pri siaj spertoj kiel flegistino en Centra Aŭstralio.

La MALVERN-grupo bonvenigis John kaj Nora Moore el Emu Park ĉe sia aprila kunveno. La novelektita estraro estas: Prez: Don Pescod, Sekretario: Val Fotheringham, Kasisto: Beryl Pescod, Grup-Gvidanto: Adrienne Paling.

● **KANBERO:** La Jarkunveno okazis la 4-an de februaro, kaj estraranoj por 1985 estas: Prez: Ralph Harry; Vic-Prez: Patti Anson kaj Brenda Birkett; Sekretario: Marj. Ellyard; Kasisto: Katherine Lewis; Bibliotekisto: Peter Hai.

Je 10-a de februaro okazis radio-intervjuo ĉe Radio-Studio 2XX. Ralph Harry kaj Marj. Ellyard detale raportis pri Esperanto-agado en la Pacifika Regiono pri la Pacifika Kongreso en Seattle kaj la Universala Kongreso en Vankuvero. Marj Ellyard rakontis pri progreso de Esperanto en Ĉinio kaj pri ŝia partopreno en la dustemajna Aŭstralia Somerlernejo en Armidale.

La rezulto de tiu interesa radio-intervjuo estis kelkaj informetoj pri Esperanto kaj 10 novaj komencantoj ĉeestis novan kurson.

● **LAUNCESTON, Tas.:** Estis ĝojo por samideanoj en Launceston, ke Marj.

Ellyard de Kanbero vizitis nin en marto. Ĉe kunveno de nia klubo ŝi partoprenis kaj multe helpis per spertaj kaj valoraj sugestoj. Pat kaj Mac LeFevre gastigis ŝin kaj kompreneble okazis multaj kaj longaj diskutadoj pri la Esperanto-movado. Ni ŝatas pensi, ke ni atingis iom da valoro por pli bone helpi la estradon de nia landa movado. Sed ankaŭ okazis sufiĉe da malstreĉaj okazoj. Kaj unufoje, kiam ni vojaĝis en la kamparo, ni deprenis sufiĉe da rubusoj por kuiru poste tre bongustan konfitajon.

—Mac LeFevre.

● **ADELAJDO:** Krade de vizito de Fay kaj Herbert Koppel al Adelajdo okazis amika renkontiĝo en Nordadelajdo, vendredon la 8-an de marto, 1985.

Mardon, la 19-an de marto okazis kunveno en la infanĝardeno. La nova sekretario ne venis, do ne eblis eĉ eniri, ĉar li devus esti malŝlosinta la pordon por ni. Tial necesis, ke mi devis eliri por alporti ŝlosilon. Ĉeestis nova intereso, do estis iom hontige, ke la sekretario ne havis tempon por ĉeesti.

Estis decidite, ke ni ne plu kunvenos en la infanĝardeno, nur la 7-an de decembro ni havos Zamenhof-Feston tie.

—Bob Felby

● **MANLY:** Por festi la unuan datrevenon de la Manly-Warringah Radio-Studio, Harry Peddie prezentis, 3-an de marto, laŭdindan unu-horan programon de skeĉoj, prelegoj, lecionoj kaj muziko, organizitan de Roger Springer kaj Lesley Casey.

En la Eduka Centro, Robby Robertson (3-3-85) parolis kaj montris lum-bildojn pri interesaj spertoj, eble cenzurita, en sia vivo. Dum februaro li prelegis dufoje pri Esperanto al la Rotaria Klubo en Cammeray kaj al "Uniting Church"-grupo en Gordon. Ambaŭ estis aprobe ricevataj.

Je 12-a de marto ni ĝuis renkonti Karlon kaj Erikan Guenster el Brisbane, kiuj ĉeestis nian diskut-grupon en la Eduka Centro. Lastatempe ni havis la plezuron revidi Majo-n (antaŭe Issobe) kaj renkonti la novan edzon Gen. Ili pasigis semajnon en Manly dum sia aŭstralia nuptovojaĝo.

—Eunice GRAHAM.

● **SIDNEJO:** Je 25-a de februaro kelkaj anoj legis el internaciaj ĵurnaloj; tio

estos, espereble, monata afero. Semajnon poste ni kune solvis krucvortentimon kiu aperis en 'Montato'.

"Bingo" — ĉu ekzistas vorto por tiu ludo, en kiu la ludantoj forstrekas ciferojn sur karto, laŭ la ciferoj tirataj el saketo? Ĉu jes ĉu ne, je 11-a de marto ni "bingadis". Semajnon poste, David Gould kaj aliaj, distris nin per raportoj de siaj ferioj dum la someraj monatoj.

Je 25-a de marto okazis la kutima monatfina programo 'Legado el ĵurnaloj kaj libroj'. Kitty Gassner prezentis proverbojn el la Zamenhofa Proverbaro. Sylvia Burkitt, James Harwood kaj M. Chaldecott elektis poeziojn kaj artikolojn el 'Monato'.

Je 1-a de aprilo ni bonvenigis la UEA-Delegiton el Swasilando, S-ron Zoltan Boglari, kiu ferias en Sidnejo en la domo de sia frato, kiun li ne vidis dum preskaŭ 40 jaroj. Li parolis pri sia amo al nia lingvo kaj la graveco de Esperanto en mondo nepaca. Estis por li granda plezuro renkonti la membrojn en Sidnejo, kaj vidi kiel efike ni prezentas la nomon al tiuj kiuj preterpasas la Esperanto-Domon.

—M. CHALDECOTT.

● **BRISBANO:** Nia societo akceptis inviton de la Bahai-Grupo de Norda Brisbane, starigi budon dum art/metia ekspozicio, en septembro. Tom O'Grady prizorgos la starigon de E-Budo, kompreneble kun la posta helpo de aliaj anoj.

Dek kvar anoj partoprenis la Federacian Konferencon ĉe Buderim je 23/24-a de marto. Ĉiuj tre ĝuis la renkontiĝon en tiu belega loko kaj nun antaŭ-rigardas al la 2-a konferenco ĉe la Ora Marbordo en oktobro. La kantgrupo kaj la dramo-grupo preparas crojn por la venonta A.E.A.-kongreso en Perto, 1986. Ĝis nun cirkaŭ 10 anoj intencas partopreni tiun kongreson.

—RAY ROSS.

● **KAPRIKORNA MARBORDO:** Nia sabata konversacia rondo en ĉies hejmo laŭvice daŭras kun nun 7 partoprenantoj, inkluzive de 3 novulinoj kiuj, post nur 8-monata lernado per korespondaj kursoj (kun suplementaj prononc-praktikaj lecionoj) jam povas paroli. Bedaŭrinde nun mankas nia amata Yvonne Rayner, kiu mortis 26/4. Al ŝia familio ni tre sincere kondolencas.

—JOHN MOORE.

S-ino Yvonne Ellen Rayner, dum 20 jaroj, estis fidela membro de la Aŭstralia Esperanto-Asocio. Ek de 1976 ŝi estis UEA-Vicdelegito kaj Fakdelegito (pri muziko, kantado) por Rockhampton.

EL LA FEDERACIOJ

● **KVINSLANDO:** Okazis la 23/24-an de marto, la unua konferenco por 1985, ĉe Buderim je la Sunbrila Marbordo. Entute ĉeestis 19 anoj ĉi tiun negrandan, sed plensukcesan semajnfinojn, el Toowoomba, Rockhampton, St. Lucia, Nambour kaj Brisbane. Plezurigis nin bonvenigi al Doris Sinclair, post reveno de longa ferio en Viktorio. Ĉiuj konsentis, ke Buderim estas unu el la plej allogaj lokoj por tia kunveno. Agrabla surprizo estis la ĉesto de du samideanoj, kiuj nun loĝas apude kaj, sub la gvidado de Doris Sinclair, strebos restarigi la lokan societon, kiu estis dum kelkaj jaroj, neaktiva.

Dum la ĝenerala kunveno oni decidis aldoni specialan tut-dimanĉan piknikon al la ĵarprogramo; proponita loko estas Digo "Atkinson", apud Lowood. Oni decidis, ke la maja konferenco okazu ĉe Monto Tambourin. La kasista raporto montris kontentigan staton; estas nun 117 membroj en la Federacio. Sekvante peton de instruistino el Elementa Lernejo, Wynnum, pri ebleco gvidi 'Hobio-Klason', estis unuanime decidite subteni tiun proponon per donaco de studlibroj ktp.

Klubraportis iene: Brisbane (Tom O'Grady), St. Lucia (Sybil Martin), Rockhampton (Joyce Turner), Toowoomba (Jean Lehane). Post la kutima vesperfrandaĵo sekvis la distra programo: kantoj de la Brisbane Grupo; prelegetis kaj ŝercis Tom O'Grady kaj Jean Lehane; skĉetis Gaye Phillips kaj Sybil Martin. Komunkantado el "Aŭstralia Kantas Sian Historion". Kay Anderson kiel kutime provis muzikon. Dimanĉmatene estis tutlibera; anoj aŭ vizitis al kelkaj lokaj allogaĵoj, aŭ veturis por denove ĝui la naturon de la kamparo. Anoj renkontiĝis ĉe 'Super Bee' (Mielproduktejo kaj Abel-Demonstraciejo) por lunci, babiloj kaj poste veturi hejmen. — Ray ROSS.

PIKNIKO . . . Dum pasintaj jaroj ĉiam estis la kutimo starigi konferencojn, tamen je la lasta konferenco oni decidis pri dimanĉa pikniko en taŭga

loko. Do, la 16-an de junio, ĉe Digo Atkinson, apud Gatton, okazos pikniko. Estos bona okazo por la novaj anoj en tiu regiono (ĉirkaŭ 35) kunbabiloj kun anoj el Toowoomba kaj Brisbane.

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO

1985

Antaŭe raportita	\$92
S-ro D. Mason, Mansfield, Vik	5
S-ro A. Towsey, Tahmoor, NSK	10
Ges-roj G. & R. Tumman, Melb.	50
F-ino Ann Hearn, Melburno	5
S-ino D. Sinclair, Sundale, Qld.	10
Anonima	10
S-ino J. Lehane, Toowoomba	10
S-ro R. Alvaro, Perto	2
Brig. I. Gale, Melburno	5
F-ino H. Mueller, Sidnejo	10
S-ro D. Mason, Mansfield	10
(2-a donaco)	10
Ges-roj W. & V. Graham, Perto	5
Ges-roj A. & E. Oliver	10
S-ro Les Scott, Manly	10
S-ino M. Duncan, Manly	10
S-ino M. Malcolm, Kardinya, W.A.	10
S-ro L. Eddington, Inglewood, W.A.	10

\$274

RECENZOJ

Sugestoj por kompletigo de la jura/diplomita terminaro, D-ro Ladislao Dubravszky, Budapeŝto, eld. de Int. Esperanto-Asocio de Juristoj, 50 aŭstriaĵaj ŝilingoj, 27 paĝoj.

Ĉi tiu broŝuro estas anoncita kiel la unua kontribuo de I.E.A.J. al la Jubilea Jaro 1987. Certe tia terminaro povus fari utilan kontribuon al la normigo de la terminaro, kiun uzas puristoj kaj diplomatoj. Ĝi povus servi kiel tradukilo por la eventula kolekto, tiel urĝe bezonata de la ĉefaj internaciaj dokumentoj, kiaj la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la Konvencioj pri Homaj Rajtoj, la Traktato de Romo, la Konvencio pri la Juro de Traktatoj, la Konvencio pri la Juro de la Maro, k.t.p. Espereble I.E.A.J.

aŭ U.E.A. eldonos tian kolekton antaŭ aŭ dum la Jubilea Jaro.

La "sugestoj" estas represo kaj revizio de simila listo, kiu aperis en Internacia Jura Revuo en 1979 kaj 1980. Ili konsistas el (A) Novaj vortoj necesaj en la jura, administra kaj diplomacia lingvo, ne troveblaj en P.I.V. (1970) kaj (B) Vastigo de senco ĉe kelkaj vortoj troveblaj en tiu vortaro.

Plejparte la radikoj proponitaj en Parto A estas klare bezonataj de juristoj/diplomatoj, ekzemple Denonci (denounce), Detento (detente), Militara (military). Aliaj estas logikaj kaj povus esti utilaj: Desavui (disavow), Designi (designate), Devolucio (devolution), Domini (dominate) Faŭto (fault), Inĉ-vesto (inquest), Klado (rough draft), Konivi (connive), Konsulato (consulate), Notifiki (notify), Parolnoto (note verbale), Plenrajtigito (plenipotentiary), Preamblo (preamble), Prejudico (prejudice, damage), Recepcio (reception, party), Stipuli (stipulate, formulate precisely). Du radikoj jam troviĝas en P.I.V.: Denominacio, Talvego, sed kun aliaj difinoj. Aliaj estas aŭ neteknikaj aŭ de duba valoro: Desaponti (Mi preferus difinon sen la koncepto 'trompi'), Disdegno (contempt of Court), Inerti (enmeti), Kontravencio (malobservo), Manaĝi (administri), Ministroprezidanto (ĉefministro), Panadro (Konfuzo kun pand-aro!), Portfolio (komisio), Preso (gazetaro), Rikvesti (peti) Soliciti (petegi), Sukuro (helpo).

Kompreneble multaj difinoj estas diskutablaj, kaj estas kelkaj eraretoj en la anglaj ekvivalentoj ("to confer to" devas esti "to confer on" k.t.p.)

Sed la listo estas utila bazo por la eventuala aldono al P.I.V. kaj ĉiu serioza Esperantisto devas posedi ĝin.

—R.L.H.

KELKAJ REAGJOJ AL "VORTOJ KUN FLUGILOJ"

S-ro Ralph Harry ricevis reagojn de kelkaj akademianoj al sia libreto "Vortoj kun Flugiloj".

"Mi tre ĝuis ricevi vian verketon, Jes, tio estas vera bezono . . . Ĵus aperis ankaŭ ĉe ni ampleksega verko "Gefluegelte Worte". Eble el ĝi mi iam ankaŭ povus kontribui por la dua el-

dono." (D-ro Detlev Blanke, Berlin, GDR.)

"Koran dankon pro la alsendo de viaj "Vortoj kun Flugiloj". Jam estas tempo ekhavi ion tian! Gratulon pro ĝi. Generale la citaĵoj ŝajnas al mi bone elektitaj." (Baldur Ragnarsson, Reykjavik, Islando).

"Elkoran dankon pro la sendo de via nova kolekto. Ĝi estas utila servo al la lingvo. Mi esperas povi utiligi ĝin en mia propra verkado. Se mi rimarkos eron enmetendan en postan eldonon, mi certe sendos al vi." (Probal Daŝgupto, Pune, Hinda Unio).

Krome Marjorie Boulton sendis du-dekon da korektoj kaj sugestoj, ĉar ŝi kredas, ke li deziros finaperigi sian libreton en kiel eble plej bona stato.

Ralph tre ŝatus havi konstruajn sugestojn kaj kritikojn de aŭstraliaj Esperantistoj!

LETEROJ AL LA REDAKCIO

Kial ni misinformas U.E.A.? Mi legis en la lasta jarlibro de UEA, paĝo 90, ke A.E.A. konsistas el 5 ŝtataj federacioj. Ne ekzistas ŝtataj federacioj en Sud-aŭstralio, Tasmanio kaj Okcidentaŭstralio. Do kie estas la kvin ŝtataj federacioj? (—Kvinslandano)

LA A.E.A. — ESTRARO: Estas nun 9 Estraranoj: S-ro Mac LeFevre, Prezidanto; S-ro Ralph Harry, AC, CBE, Vic-Prezidanto; S-ro Ray Ross, Vic-Prezidanto; S-ino Marj. Ellyard, Sekretario; S-ro Herbert Koppel, Vic-Sekretario; F-ino Brenda Birkett, Kasisto; S-ro Trevor Steele, Ĉef-Ekzamenisto; S-ino Betty Cleminson, Korespondpetoj; Vera Payne, Instrumentodj.

Parentoj vizitas novnaskiton. Iu ne retenas sin de rimarko:

—Nu, la etulo estas ĉarma, tamen li ŝajnas iomete malforta.

—Ĉu malforta? — rifuzemas la feliĉa patro—, kiel li estus pli fortika post trimonata geedziĝo?

Renkontiĝas du amikinoj. La blonda demandas la rufan:

—Mia kara, kiel sukcesis via nupta vojaĝo,

—Dankon, bonege, kiel ĉiam. (Hungara Vivo)

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Krucoc and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: S-ro Mac LeFevre, 231 St. John Street, Launceston, Tas., 7250.

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 224 (304)

MELBURNO

Junio, 1985



Ankoraŭ unu kripligan baton suferis, ĉi-foje ne nur Aŭstralia Esperanto-Asocio, sed ankaŭ Universala Esperanto-Asocio pro la forfalo el nia rondo de

KENNETH GORDON LINTON F.A.E.A. **U.E.A. ĈEF-DELEGITO**

kiu mortis je la 9-a de majo, 1985, kvin semajnojn post operacio en melburna hospitalo "Alfred". Vere la multifaceta laboro, kiun plenumis tiu-nomita U.E.A. Ĉef-delegito por Aŭstralio, estis tia, kian nur plurope oni daŭrigos.

Ken Linton naskiĝis en Neutral Bay, Nova Sud-Kimrujo, je 27-a de marto, 1906, kaj travivis la infanaĝon parte en la ĉirkaŭajo de Sidnejo, parte en Nov-Zelando, kien la laboro de lia patro kondukis la familion. Ĉi tiu tamen fine transloĝiĝis al Melburno, Viktorio, kie Ken pasigis la jarojn de lernejo kaj matureco, kie li komencis la vinvigajn laboron ĉe firmao pri-elektrika kaj kie li renkontis kaj en 1934 edziĝis al Dorothea. Tie, ankaŭ post dummilita servado kun la Reĝa Aviada Korpuso en Novgvineo, krom denove eklabori, nun en la administra fako de fabriko por etiketoj kaj klišoj, kun kiu li daŭris longe post la kutima aĝo por

emeritiĝi, li fervore aktivis pri du hobiaj — la Framasona Loĝio kaj Esperanto.

Interesiĝo pri lingvoj evidentigis sin jam en junaĝo, kiam li studis la latinan kaj francan. Lia entuziasmo por Esperanto vekigis en majo, 1931, kiam li legis en la "Literatura Suplemento" de melburna ĵurnalo "The Age", artikolon verkitan de Reg. Banham, antaŭa redaktoro de nia gazeto. Sube aperis reklamo pri la librovendejo de Esperantisto Roy Rawson — "Ĉiuj Esperanto-Libroĵ haveblaj". Ken vizitis la butikon kaj, laŭ konsilo de Roy Rawson, komencis sian studon per la lerno-

libro de L. N. Newell "The Concise Course in Esperanto". Poste li aĉetis ankaŭ la libron "Grammar and Commentary" de George Cox, antaŭ ol S-ro Rawson direktis lin al la Melburna Esperanto-Klubo. En la klaso de F-ino Merle Cruickschank li renkontis kaj amikiĝis kun S-ro Alan Turner, kun kiu li ofte promenis kaj ekzercis en Esperanto.

En 1932 ambaŭ gajnis (kun honoro) la elementan diplomon de la melburna "Pyke Memoriga Ekzameno", kaj en 1933, ankaŭ (kun honoro) la diplomon de la Brita Esperanto-Asocio. Baldaŭ la trankvilon de la vivo interrompis la Dua Mondmilito, dum kiu Ken servis kiel serĝento en la Reĝa Aviada Korpuso en Novgvineo, kaj tie li studis ankoraŭ alian lingvon — la piĝinan — pere de kiu li sukcesis interrilati kaj amikiĝi kun pluraj indiĝenoj. Sekve de tio, kiam li revizitis la Melburnan Esperanto-Klubon en Februaro, 1946, ne longe post reveno hejmen en Decembro, 1945, li povis kontribui al klubaj programoj per rakontoj pri siaj aventuroj kun la amikoj postlasitaj en Novgvineo.

Nova projekto en Melburno okazigi por Januaro, 1950, la 7-an tutaŭstralian kongreson, la unuan post multaj jaroj, bezonis lokan komitaton, el kies anoj Ken estis unu. Kiam en 1951 la nova A.E.A. Prezidanto D-ro C. J. Caldera, (post longa traktado kun S-ro J. R. G. Isbrucker) atingis la rajton starigi provizoran aŭstralian ekzamenan komisionon por ekzameni je terciara nivelo, Ken sukcesis fariĝi unu el la 7 komisionanoj. En 1952, ĉe la 8-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, Ken elektitiĝis A.E.A.-Prezidanto kaj samjare fariĝis U.E.A.-Delegito por Melburno. Li ne povis ĉeesti la 9-an Kongreson en 1954, sed reelektiĝis Prezidanto, kaj en 1955 fariĝis UEA-Ĉefdelegito por Aŭstralio. Ĉe la Kongreso en Kanbero en 1956 li nomumis D-ron Fred Williams A.E.A.-Prezidanto kaj mem akceptis la oficon de Kasisto kun la celo plibonigi la financan staton de la preskaŭ bankrota A.E.A. En tiu celo li brile sukcesis kaj tiun oficon li plenumis dum 12 jaroj.

En 1957 li fariĝis Dumviva Membro de A.E.A. kaj por marki la Zamenhof-Jarcenton en 1959 li fariĝis Dumviva

Membro de U.E.A. kaj samjare multe kunlaboris pri la Zamenhof-Jarcenta Fonduso. Krome li fariĝis Kasisto por la novofondita "Esperanto Advancement Co-op. Ltd." En 1960 li fariĝis la unua UEA-Komitatano en Aŭstralio.

Interterpe li esploris novan kampon — la literaturan, kaj en 1960, eldoniĝis lia verko "Kanaĉo el Kananam", rakontoj pri liaj spertoj en Novgvineo, kiun li prezentis kiel tezon por la Klereca Ekzameno. Tiun li sukcese kompletigis en 1961 kaj tiel fariĝis la dua diplomito (post D-ro Caldera en 1955).

Ĉe la Kongreso en Kanbero en 1966, kune kun D-ro Ross Robbins, li lanĉis kampanjon por kolekti monsumon \$1250 por donaci ĉambron en la UEA-Domo en Rotterdam, kiun celon ili atingis post du jaroj Sangiĝis liaj devoj post la Kongreso en Manly, en 1968, kiam li reelektiĝis A.E.A.-Prezidanto, kaj aktive laboris kiel kasisto en la L.K.K. por la 1972-a Kongreso en Melburno. En 1974, post la morto de Reg. Banham, li fariĝis Komisionestro por Ekzamenoj, kaj samtempe denove servis kiel Kasisto por la Pacifika Kongreso en Melburno en 1976. Dum tiu kongreso li estis tre okupata ankaŭ pri ekzamenoj. Estis en la kadro de tiu kongreso, ke li ricevis la Honorinsignon de A.E.A. por elstara servado. Samjare li ĉeestis sian unuan U.E.A.-Kongreson en Ateno.

Krom multaj artikoloj pri gramatikaj kaj recenzoj en "Australian Esperantist" kaj aliaj gazetoj, kaj la menciita "Kanaĉo el Kananam", li verkis la jenajn: "Studlibro por la Supera" kaj "Studlibro Elementa (por helpi studentojn en Aŭstralio) kaj tradukis "Sur la Bordo"n de Nevil Shute (1983), kaj plurajn erojn por la projektita "Aŭstralia Antologio", ankoraŭ ne eldonita.

Funebra Diservo okazis je 14-a de majo en la Anglikana Preĝejo "St. Mary's" en Caulfield, kiun ĉeestis 12 Esperantistoj, kaj kiun sekvis Framasona funebra ceremonio ĉe la Krematorio ĉe Springvale.

Al liaj edzino, Dorothea, filino, June, kaj ties familio, korajn kondolencojn esprimas la tuta aŭstralia esperantistaro. La foresto de Ken estos longe kaj doloriĝe sentata.

—FAY KOPPEL.

**UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO
KONDOLENCAS AL LA
AŬSTRALIA ESPERANTO-
ASOCIO**

Al s-roj Ralph Harry, Mac LeFevre, Trevor Steele, Herbert Koppel.

Estimataj amikoj.

Pere de letero de s-ro Koppel de la 11-a de maio ni jus informigis pri la granda perdo, kiu trafis Aŭstralian Esperanto-Asociacion kaj UEA'n per la morto de s-ro Linton. Mi uzas ĉi tiun leteron por esprimi ankaŭ al AEA plej sincerajn kunsentojn, kion mi faris ankaŭ al la familio Linton per aparta letero.

S-ro Koppel skribas, ke vi jam entreprenas paŝojn por proponi al ni novan ĉefdelegiton en via lando. Dankon pro tiuj klopodoj. Estus efektive tre grave, ke ni plenu tiun vakan postenon kiel eble plej baldaŭ, nepre ĝis la fino de julio, ĉar ni en aŭgusto jam dissendas materialojn al la ĉefdelegitoj por venonta jaro.

Ni ĉi tie ŝatus, se iel eble, ke vi trovu mezaĝan aŭ eĉ junan personon por plenumi tiun gravan taskon. Vi certe konscias, ke tiu persono nepre devus bone koni ne nur la enlandan sed ankaŭ la internacian Esperanto-movadon. Kvankam mi neniam renkontis s-ron Steele, mi sendas al li kopion de ĉi tiu letero, por instigi lin pensi pri eventuala propra preteco transpreni la taskon. Iuj aliaj el niaj kolegoj ĉi tie sugestas la nomon de s-ino Koppel, aliaj diras, ke ankaŭ Adrian Hall (kiu foje vizitis nin ĉi tie) taŭgus . . . Kaj, certe ekzistas ankaŭ aliaj taŭgaj personoj, kiujn ni ĉi tie neniam renkontis. Vi ja scias, ke s-ro Linton estis kvazaŭ aparta institucio en sia rolo kiel ĉefdelegito dum plenaj 30 jaroj. Estas aŭdace esperi, ke ni trovos tiel sindediĉan kaj bone funkciantan ĉefdelegiton kia li estis, sed . . . ni almenaŭ provu.

Tute alia demando estas la vaka posteno en la Komitato de UEA, kiun nun kreis la morto de s-ro Linton. Ni ne dubas, ke vi pensas ankaŭ pri tio kaj baldaŭ komunikos al ni vian novan komitatanon A.

Kun antaŭdanko pro viaj klopodoj, sincere salutas,

Simo Milojeviĉ,
ĝenerala direktoro de UEA

P.S. Post la enhospitaliĝo de s-ro Linton, liajn taskojn provizore transprenis s-no Fallu de Oakleigh, Vic. kiu ĉi-jare unuafoje membriĝis al UEA. Temis ĉefe pri kongresaj mendoj, kiujn ŝi pluisendis, kaj nia KKS diras, ke ŝi faris tion tute kompetente.

**NOTICE TO ALL EXAM
CANDIDATES**

We have all been saddened by the death of Ken Linton, a man who served the cause of Esperanto for so many years in so many roles.

One of the roles Ken fulfilled was that of Chief Examiner; even when he gave up that role he remained very active as the secretary of the Exam Commission, and we others on the Commission are going to miss him sorely.

It may be some time before the remaining examiners, scattered as we are over this vast continent, will succeed in picking up all the threads that have slipped from Ken's fingers. Meantime, we ask for the understanding of all those who have recently sent exam papers, money, question or other correspondence dealing with examinations to Ken. Your needs will be attended to as soon as possible. If you have enquiries, please direct them to me at **7 O'Callaghan St., HOLLAND PARK, 4121.**
—**TREVOR STEELE**
(Komisionestro)

TRIBUTO AL KEN LINTON

Nia Vic-Presidento, S-ro Ralph Harry, diskutis kun A.E.A.-Sekretario, S-ino Marj. Ellyard, la ideon pri taŭga tributo al Ken Linton.

Li proponas fonduseton por ebligi al A.E.A. sendi du ekzemplerojn de la libro "Sur la Bordo", tradukitan de Ken Linton, al ĉiu landa asocio (44) kaj al la gravaj Bibliotekoj en la movado (6). Li proponas englui en ĉiun ekzempleron de

la libro, la nekrologon, kiu aperas en la nuna numero de nia gazeto

S-ro Harry estas preta komenci la fonduson per donaco de \$50. Membroj, kiuj aprobas ĉi tiun planon estas petataj kontakti S-ron Ralph Harry ĉe 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2614.

KONFIDENCAJ ANALOJ DE 1984

(Nepre eldonendaj)
de ROLO
II

En Anĝelio (laŭ la konata papa dekreto ili ne estas angloj sed anĝeloj) la alia ferulino, la plutonia blondulino, havis pli da problemoj. Kiam la karbomisiono deziris fermi kelkajn karbominejojn, la Nacia Sindikato insistis, ke ili restu funkciantaj. Por atingi tiun celon la ministoj strikis, por ke la minoj ne funkcii. Sed la polico protektis laborantojn kiuj deziris funkciigi la minojn. Iom post iom pli da ministadinoj insistis, ke iliaj edzoj ne pigru ĉirkaŭ la domo, kaj la ministoj rekomencis labori. Kiam ĉiuj denove laborados la striko estos rompita, kaj tiam la Registaro povos fermi la minojn. Tiu sistemo estas konata kiel la anĝela malsano aŭ simple unua klasa fuŝado.

Kiam la ĉefministro vizitis plaĝon kun kelkaj kamaradoj por iom da nebulbando (sur la anĝelaj plaĝoj ne estas sablo aŭ suno) patrioto el la Lando de Iro (irlandano) metis bombonon sur la kapkusenon de Manjo en la hotelĉambro. Dum la nokto oni ĝercis en la hotelo por diveni kiu dormis en kies lito. La ĉefministro ne manĝis la venenitan bombonon, ĉar ŝi laboris en alia ĉambro, sed laŭ la jurnalaj la alta komisarino de Aŭstrio (preseraro por Aŭstralio) trovis belan fremdan virinon en sia lito, kaj tiuj, kiuj perfekte posedis la refleksivan sciis kiu dormis kun kiu. Kiam oni demandis al la ĉefministro ŝian opinion pri la internacia lingvo, ŝi respondis, ke ĉiu en la ĉielo parolas per langoj de anĝeloj. Ŝi aldonis, ke pro la fakto, ke UNESKO laŭdis Esperanton en Montevideo antaŭ 30 jaroj, pro la posteuloj de Doktoro Apenaŭ, ŝi sekvas la ekzemplon de Aglio kaj retrigis el la organizo. La ĉefepiskopo de Anĝelio anoncis: "La anĝel-

uso estas internacia — ni ne bezonas fremdajn sonorilojn el la Kontinento".

En Anĝelio ankaŭ la ĉefministro devis riveli la intimajn aferojn de sia familio. Sia filo tamen, ĝis nun, ne eniris la politikon, sed daŭrigas sian sukcesan karieron en komerco en la meza oriento.

La filo de la Reĝino, Karulo, ankaŭ daŭrigis sian aktivan familian vivon. La Princino de Kimrio, kiun multaj Aŭs-anoj konsideras diino, naskis duan filon, kiun oni baptis Harry honore al la Honorpatrono de UEA. Estis oni-diroj ke la Reĝino, Elna, kiu mem naskis kvar geprincojn dum ŝi samtempe reĝinis, preparis sin por emeritiĝo. Tion indikis la fakto, ke ŝi akceptis de Renato la Reganto personan komputilon, per kiu ŝi povas ludi la konatan videoludon: "Elektu virĉevalon por gravedigi vian ŝatatan ĉevalinon". Kompreneble en la anĝela monarkio la principo de nepotismo firme regas, kaj Elnjo certe elektos sian plejaĝan filon, la karulo de la ruĝa familio, por sekvi ŝin.

En azia lando antaŭe juvelo en la krono de la Reĝino de Anĝelio, Ghandilando, la regantino havis malpli feliĉan sorton. Ŝi preparis sian filon nepotisme sekvi ŝiajn paŝojn, sed lia aviadilo kraŝis, kaj li ne jam lernis kiel flugi senmaŝine. Do, ŝi devis rapide prepari duan filon por porti la pantalonon. Sed ŝi akcidente koliziis kun io mortiga en la ĝardeno, eble persiko aŭ sikomoro ĉar certe ŝi ne perfidiĝis per kiso. Ĉar kelkaj ne ŝatis la invadon kaj preferis indan iron. Sed post la morto de la regintino ŝian filan akceptis la inda Esperanto-Kongreso, kaj en la balo-tago li venkis sian bofratinon kaj tiel la principino de nepalismo triumfis denove, kvankam la klas-sikaj bataloj ne ĉesis.

Aliloke en Azio la regantaj familioj strebis daŭrigi siajn dinastiojn. En demokratia kampuso la Eta Princo transdonis multajn taskojn al sia filo, Princo Rana. Ili kunlaboris kun ĉiuj patriotoj, inter ili la famaj potistoj, en la tera koto.

En Ĉinio la Respublikestro en Pekino (Baj Ĝingo) reakiris juvelon por sia krono — la kronan kolonion Honkongo. Kvankam la anĝela ambasadoro tre ŝatis la bankedojn dum la intertraktado,

kaj pro tio ĉiam prokrastis interkonsenton, fine la Ĉefministro aŭdis pri la bankedoj kaj decidis akcepti la proponojn, por ke ŝi havu kialon viziti Pekinon (Baj Gingo). Sed post kelkaj bankedoj ŝi devis subskribi la deklaron. La deklaro en la angla lingvo kaj la deklaro en la ĉina estis du apartaj aferoj, sed la ĝenerala ideo similis: La Bajginganoj rajtos eniri la kolonion, sed ne eniros. Ordinaraĵoj havos neniuajn rajtojn tie, sed la britaj sindikigantoj rajtos striki kiam ajn ili deziras. Tio estas la sindikiga sistemo. Kaj la sindikiguloj rajtos havisian monon en la reĝaj kongaj bankoj. Kompreneble Esperantistoj povos lerni El Popola Ĉinio pri Baj Gingo kaj ankaŭ pri Reĝo Kongo, kiu fariĝos Ruĝa.

En la Filipaj Insuloj la Prezidanto, konata Markosisto, havis problemojn pri siaj janiĉaroj, kiuj protektis lin kontraŭ aŭstraj (aŭ eble aŭs-anai) rajtoj kaj politikistoj oponantaj. Pro tio li konstante havis diplomatan gripion. Sed la Prezidentedzino emajlita, kiu estis tute ne lako, subtenis la parteron. Oni diris ke eble ŝi povas sekvi sian edzon, ĉar ŝi bone guberniestris la metropolitenon de Manilo, kaj estas fidela markosisto. Oni ne povas rezisti ŝian tagalagon kaj eĉ malpli ŝian noktalon!

(Daŭrigota)

"KONSULTU LA KONSILANTON"

Mi interesigis pri via respondo al "Konservu la Regulojn". Mi opinias, ke ni ja bezonas nomindikon pri la sekso de persono — jes Eva, ne Evo. Pri ĉi tiu punkto jen historieto:

Mia amiko Bufo ĉeestis eksterlandan kongreson. Kun 50 aliaj li loĝis en malgranda hotelo. Onikondukis lin al dulita ĉambro. Li malpakis sian valizon, duŝis kaj enlitigis.

Vespere li aŭdis frapon ĉe la pordo. La hotelestro staris antaŭ la pordo. Li pardonpetis kaj demandis ĉu Bufo konsentus iri al alia ĉambro en kiu estas du britoj kaj tri litoj. "Kial", Bufo demandis, "mi jam malpakis mian valizon. Estus problemo translokiĝi".

La hotelestro klarigis: "Mi ĵus eksciis, ke la alvenonta persono por ĉi tiu ĉambro estas Japanino!" La nomo ne indikas ŝian sekson. Ni kredis, ke estas viro. Mi helpos vin translokiĝi viajn vestojn."

En konfuza rapideco Bufo translokiĝis.

Sekvintan matenon Bufo sidis en plenplena manĝejo kiam eniris ĉarma Japanino. Ŝi prezentis al Bufo pijaman pantalonon kaj ĉemizon kaj diris laŭte: "Vi lasis ĉi tiujn vestojn en mia ĉambro hieraŭ nokte."

Ŝi ridetis, Bufo ruĝigis kaj la aŭdantaro laŭte ridegis. La litero "a" ĉe la fino de ŝia nomo evitis tian miskomprenon. — Serculo.

Kara Ĝerulo: Mi ege dankas al vi pro via interesa kaj amuza anekdoto pri la Japanino., la nomo ja ne helpis por eviti konfuzon. Tamen mi ne estas tute konvintika. Mi respondos pli detale venontnumere. **KONSILANTO**

25th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

4-11 Jan., 1986 — Perth, W.A.

This congress will be held at St. Catherine's College, one of the residential colleges adjacent to the beautiful University of W.A.

Early enrolment will secure your accommodation.

Congress Fee: (before 1-7-85): \$30
After 1-7-85: \$35. Pensioner/Full-time students (before 1-7-85): \$25. After 1-7-85: \$30.

Mail your Congress Fee to the Treasurer, **Mr. O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.** If you wish to stay at the College add \$10 for Room Deposit. Please make cheques payable to "Australian Esperanto Congress" and add 12 cents for bank charges.

Fourth List of Enrolments

49. Else Peddie, Manly
50. Henry Peddie, Manly.
51. Bess Scott, Manly.
52. Les Scott, Manly.
53. Roberta Jones, Perth.
54. Alice Longson, Perth.

State Distribution: N.S.W. 21; W.A. 17; Q'ld. 9; Vic. 4; A.C.T. 3.

AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTO:** Ĉe la kunveno de 8-a de majo, D-ro Einihovici legis raportojn de "Heroldo de Esperanto" kaj Jack Hawks klarigis parolmanieron kaj prononcadon de Esperanto. Ni ankaŭ aŭskultis al sonbendoj pri prononcado.

En la Junulgastejo de Mundaring okazis la 11-an kaj 12-an de majo nia 2-a ĉi-jara Esperanto-semajnfino. Dek kvin membroj ĉeestis, inter ili ankaŭ Olive Russell el Sidnejo. Per "forta mano" estris la semajnfino Gordon Gregson kaj ĉiuj ĉeestantoj ĝuis la aranĝojn. Lajunulargastejo tre bone taŭgis por nia celo, ĝi estas situata en bela kampara regiono, kostoj tre modestaj (nur \$6 por nokto). Ni tradukeceris, aŭskultis al interesaj paroladetoj kantis, spektis lumbildojn kaj teatraĵojn kaj ekskursis tra la rava kamparo. Entute tre ĝuinda semajnfino kaj ni ĝojatendas la 3-an semajnfino en baldaŭa estonteco.

Je 22-a de majo Shirley Gradusov rakontis pri la bela semajnfino ĉe Mundaring. D-ro Einihovici kaj John Harvey distris nin per lingvaj problemoj kaj Jack Hawks raportis pri kongresaranĝoj.

● **MELBURNO:** Plej elstara kunveno en majo okazis je la 27-a, kiam Errol Chick prezentis tripartan programon. Vere unikajn diapozitivojn li kaptis pri, i.a., la unujara ĉa gorilo "Mzuri", kiam la Esperanto-Federacio de Viktorio vizitis la Zoologian Gardenon. Klubanoj neniam laciĝas pri lia kolekto de diapozitivoj pri la usonana surluniĝo, kiu sekvis kaj mirigis novajn klubanojn. Por fini la vesperon li montris pluajn diapozitivojn pri la nova akvuĝejo "Thompson".

● **KANBERO:** La klubo kunvenas ĉiun lundon en la salonoj de la Centrejo por Migrantoj, kaj nun disponas bonan vitritan ŝrankon por la kluba biblioteko. Dum du semajnoj ni ankaŭ havis ekspozicion en granda konferencujo.

La 27-an de majo Prezidanto Mac LeFevre vizitis la klubon kaj partoprenis en la kurso por progresintoj "konatiĝo kun Vortoj". Poste li alparolis ankaŭ la komencantojn. Tiun vesperon estis legita poŝtkarto de Brenda Birkett el Heidelberg, kaj invito el la Baha'i-Asembleo al S-ro Harry preligi pri Esperanto. Li ricevis ankaŭ inviton de la Societo de Amikoj (Kvakeroj).

"Canberra Linguist", la organo de la Asocio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj, inkludis en la aprila numero artikolojn pri la Tutpacifika Kongreso en Portlando, kaj la Universala Kongreso en Vankuvero. — Ralph HARRY.

● **MANLY:** Okazis aferkunsido en la hejmo de Marjorie Duncan, kie oni diskutis planojn por la estonteco.

Lastatempe Marjorie Duncan gastigis S-ron Zoltan Bolgari hungaran inĝenieron kaj UEA-Delegiton por Manzini (Svazilando). Li parolis dum la kutima marda kunveno kaj poste Les kaj Bess Scott akceptis nin en sia hejmo. 30 anoj kaj vizitantoj ĉeestis. Sekvis informarta artikolo pri la vizito en la loka ĵurnalo. — Eunice GRAHAM.

SIDNEJO: Je 20-a de majo Kitty Gassner legis priskribon de la nova flughaveno en Pekino. Semajnon poste ni bonvenigis gaston, S-ron E. Jablonski. Li naskiĝis en Bjalistok, kaj krom periodo dum la milito, kiam li deĵoris kiel soldato (kaj atingis la rangon de kolonelo), li estis juristo. Ankaŭ lia edzino estis juristo. Kiam ili translokiĝis al Israelo, ili devis lerni novan lingvon kaj novan leŝistemon. Li komprenas multajn lingvojn kaj estas nun en Aŭstralio por viziti sian filinon kaj ties edzon.

Je 3-a de junio Sylvia Burkitt prezentis vortludon per disŝiritaj paperecoj kaj la ludantoj devis parigi la pecojn.

—M. CHALDECOTT

● **BRISBANO:** Normalaj klasoj okazas ĉiun lundon en la kunvenejo ĉe 22 Qualtrough St., Woollongabba. Bonvena vizitanto estis Don Rogers, Prezidanto de la Nov-Zelanda E-Asocio, kiu nuntempe, kune kun edzino, vizitas parencojn en Kvinlando. Anoj de la kant-

grupo kaj de la dramo-grupo preparas erojn por la Kongreso en Perth, 1986. Dum junio, ni intencas reklamadi pri nova klaso por komencantoj en julio.

NEKROLOGO

Mortis la 8-an de junio, 1985, S-ino H. (Riette) Beck. Kune kun edzo Majoro S. Beck, ŝi aliĝis al la Brisbana Societo en 1954. Ŝi devis forlasi la societon en 1964, por prizorgi sian edzon, kiu tiam ege malsanis. Post multaj jaroj en la familia hejmo, ŝi, blinda, translokiĝis al la Framasonaj Hejmoj ĉe Sandgate. Laŭ la vortoj de ŝiatempa samideano kaj tiama societo-prezidanto, s-ro Carl Guenster, "ŝi estis fidela subtenanto de la E-movado, kaj eĉ dum la lastaj malfeliĉaj jaroj ŝi ĉiam memorigis ge-amikojn pri la E-jaroj 1954-1964 kaj pri estontaj esperoj rilate al la mondmovado."

—Ray ROSS

EL LA FEDERACIOJ

KVINSLANDO: Pli ol 30 anoj kaj amikoj piknikas ĉe Digo Atkinson, apud Lowood, la 16-an de junio. Belega sunbrila tago aldone al la alloga verda parko/akvosportejo certigis sukcesplenan tagon, kiun partoprenis ne nur klubanoj el Toowoomba, Gatton, Lowood kaj Brisbane sed ankaŭ du korespondstudantoj.

Post la neformala subĉiela lunĉo Prezidanto, Ray Ross mallonge parolis pri la celo kaj agado de la Federacio kaj A.E.A. Post komunkantado el "Aŭstralio Kantas Sian Historion", akompanata de Jim Dimo per akordiono, anoj laŭlekte promenis ĉirkaŭ la parko. Membroj nun antaŭrigardas la duan konferencon ĉe Broadbeach, Ormarbordo, en oktobro, kie Cliff kaj Margaret Bailey montros filmojn pri la ĉijara vizito al Ĉinio. Nia membro Joyce Turner (Rockhampton) kun samideanino el Yeppoon, intencas partopreni la Universalan Kongreson en Augsburg —eble alia ero por la konferenco en oktobro, ĉu? — Ray ROSS.

VIKTORIO: Dek kvar membroj de la Federacio partoprenis, 11-an de majo, 1985, ekskurson al "Werribee Park", proksimume 35 km for de Melburno.

Ted O'brien kaj Ges-roj C. Hall de la "Geelong"-grupo gvidis nun de la Werribee-stacidomo al la dek-hektara parko. Post komuna piknika lunĉo en plena aero, ni inspektis la palacan bienan hejmon (60-ĉambran), kiun la fratoj Chirnside konstruis meze de la 19-a jarcento kaj kiu fariĝis centro de eleganta societa vivo. Tiu estas nun konservata de la Viktoria Registaro kiel muzeo pri la historio de la regiono.

Poste ni trinkis kafon en tiea restoracio, inspektis ekspozicion de ceramikajoj kaj spite de komencanta pluvo observis en distanco kelkajn el la bestoj de la apuda "Safari"-regiono.

—Fay KOPPEL

En la hejmo de ges-roj Fallu, anoj de la OAKLEIGH-grupo okazigis, 27/4, "Bazareton" kaj societan posttagmezon. Ĉeestis ankaŭ membroj de la Melburna kaj Waverley-grupoj. Posttagmeza teo konkludis tre agrablan kunvenon, el kiu la kluba kaso gajnis proks. \$30.

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO 1985

Antaŭe raportita	\$274
S-ino M. Sanders	10
Ges-roj Aulsebrook, Forster NSW	5
S-ino E. Maddern, Morwell	10
S-ino Ruth McGrath, Perth	20
Ges-roj R. Ross, Brisbane	10
S-r F. McDonnell, Mt. Hagen, P.N.G.	20
S-ino R. Philp, Brisbane	5
S-ro V. Kosef, Cobar, NSW	10
F-ino Joyce Turner, Rockhampton	10
	<hr/>
	\$374

—Karulino! Ni fartos eminente ĉi-vespere — diris junulo salutante en la pordo de amatino. — Mi kunportis tri teatro-biletojn.

Sed kial por ni trion?

Nenio pli simplas: por via panjo kaj paĉjo du, kaj la tria servos vian fraton! (Hungara Vivo)

RECENZOJ

DISKRIMINACIO: Prelegaro el la 65-a Universala Kongreso de Esperanto. Aranĝita de D-ro Renato Corsetti, eldonita de UEA, 1984. Formato A5, 175 paĝoj. Mendu de AEA BOOK Service, P.O. Box 230, Matraville, NSW, 2036.

La Esperanto-movado kontraŭbatalas la lingvan kaj kulturalan diskriminacion. **DISKRIMINACIO** traktas la radikojn de diskriminacio, diskriminacion kontraŭ etnoj, rasoj, virinoj, pro seksa orientiĝo aŭ religio. Kontribuis elstaraj esperantistoj, inklude de John Wells, Probal Daŝgupto, Werner Bormann, Albert Goodheir, Umeda Yesimi.

La libro invitas al pliaj kontaktoj kaj kunlaboro inter la E-movado kaj organizaĵoj, kiuj aktive kontraŭas tiujn aliajn specojn de diskriminacio. Ĝi estas en broŝura formo, bele presita sur bona papero, kun ruĝa kovrilo, desegnita de Peter Oliver.

● **SALUTOJ EL NUERNBERG:** La plej malnova Esperanto-Klubo de la mondo estas la Esperanto-grupo de la bavaria urbo Nuernberg. Ĝia nuna sekretario, Anny Hartwig, sendas salutojn al la legantoj de nia gazeto. Si avizas, ke bela faldfolio pri Nuernberg estas havebla ĉe "**Verkehrsverein Nuernberg, e. V., Eilgutstr. 5, D-8500 Nuernberg 70** Partoprenontoj de la ĉi-jara Universala Kongreso en Augsburg nepre kontaktu la klubon pere de **S-ino Anny Hartwig, Pirkheimerstr. 11, D-8500 Nuernberg 10 (Tel. 0911/35-96-58).**

● **TRISTA KOINCIDO:** En Francio ĵus mortis, post mallonga malsano, Jean Guillaume, en la aĝo de 80 jaroj. Antaŭ proks. 25 jaroj li vizitis Melburnon, ĉar li estis teknikisto ĉe la franca branĉo de la firmao ASPRO. Tiam li interkonatiĝis kun Ken Linton kaj restis dum longa tempo ties plum-

amiko. Jean Guillaume esperantiĝis en 1927 kaj ekde 1938 li estis UEA-ĉefdelegito por Francio. En 1964 li fondis la Internacian Esperanto-Klubon Aŭtomobilistan, kies aŭstralia peranto Ken Linton estis.

ITALA TELEVIDO EN KANADO:

La itala komunumo en Kanado estos la unua, el inter tiuj transoceaniaj, kiu povos sekvi ĉiutage, per rekta kunligo tra satelito, televidajn programojn venantajn el la patrolando. La elsendoj koincidigos kun la malfermo de nova televida kanalo je kostopago, kiu funkcios per kablo de Toronto, dum entute 8 horoj en itala lingvo kaj 6 en la hispana. La programoj en la itala, pri kiuj oni certigis la neĉeston de komerca reklamo, ampleksos filmojn, varieteon, enketojn, sporton, gazetariajn servojn. La iniciato ŝuldiĝas al la societo "Telelatino", kiu agadas en strika interrilato kun la Itala Radiotelevido (RAI).

Komence, la etna komunajo al kiu adresiĝos la servo estos tiu de Ontario, kiu ampleksiĝas 135.000 italdevenajn familiojn sed, en la daŭro de du aŭ tri jaroj, la servo plivastiĝos unue al Kebekio kaj poste al la tuta lando (330.000 familioj). En baldaŭa estontecco, la sama iniciato koncernos ankaŭ Usonon, en urboj kun alta procentaĵo de italdevenaj homoj kaj kun kablareto.

(D-ro A. De Salvo en la Esperanto-emisio de Radio Roma)

Modernaj tempoj: — Filineto mia! Kiu edziniĝos vin se vi ne lernos munti aŭton?

Moderna knabino rigardas surprizite: — Ej, Karlo — ŝi fine ekparolas —, ĉu vere vi volas kanti al mi per tiu antikviĝinta gitaro sen elektronika ekipaĵo? (Hungara Vivo)

—oO—

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.
Prezidanto: S-ro Mac LeFevre, 231 St. John Street, Launceston, Tas., 7250.
Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
Kasisto: F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036
Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 225 (305)

MELBURNO

Julio-Aŭgusto, 1985

SUKCESPLENA 70-a UNIVERSALA KONGRESO EN DUMILJARA URBO

Augsburgo festas ĉi-jare sian dumiljaran jubileon kaj havis la honoron organizi la 70-an Universalan Kongreson de Esperanto.

Pli ol 2300 Esperantistoj kaj gastoj el 57 landoj ĉeestis la Inaŭguron de la kongreso en la granda sporthalo. Diplomataj reprezentantoj de pluraj landoj salutis la kongresanojn, parte en Esperanto. Interalie la usona konsulo, S-ro Gregory Lynch, alparolis la ĉeestantojn en bonega Esperanto. La ambasadoro de la Ĉina Popola Respubliko, L'a Ekscelenco Guo Fen-min emfazis en sia parolado la apartan gravecon de internaciaj kontaktoj por lia lando kaj la tiurilatan signifon de la venonta Universala Kongreso en Pekino.

Ankaŭ salutis la kongreson aŭstralia vickonsulo, la dana konsulo kaj la itala ĉef-konsulo. D-ro Dieter Rogalla, membro de la Eŭropa Parlamento, kaj S-ro Tom Arbo Hoeg, nome de la norvega registaro alparolis la kongresanojn.

La ĉefurbestro de Augsburg, Hans Breuer, bonvenigis la kongreson kaj certigis al ĝi siajn subtenon kaj simpatian. Aparte impresis lin, ke li "estis la sola, kiu bezonis interpretiston".

Prof. Humphrey Tonkin tre lerte klarigis la kongresan temon "Antikvo kaj Moderno — kion ŝanĝi, kion konservi?", tre taŭgan temon por dumiljar-aĝa urbo kia Augsburg. Pli detalan aspekton de la kongresa temo prezentis poste mag. William Auld. La solena inaŭguro finiĝis per ludado de la "Eŭropa-kanto" kaj "La Espero", fare de la orkestro kaj la "Kolping"-koruso.

La UEA-Estraro sendis telegramon al la fina registaro kaj la aliaj subskribintoj de la Fina Akto de Helsinko kaj atentigis ke ĝiaj celoj koincidu kun la celoj de la Esperanto-movado.

La ok aŭstraliaj esperantistoj, kiuj ĉeestis, tre ĝuis la kongreson. Ili ankaŭ aktive partoprenis en la diversaj aranĝoj. Marj. E7llyard, ĉe la Malfermo, salutis nome de Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj Les Scott partoprenis kelkajn kunvenojn de la UEA-Komitato. La loka ĵurnalo "Augsburger Allgemeine" prezentis bildon de Bettie Hart kune kun multnacia kongresanaro, en kiu ankaŭ troviĝis la konata itala pastro Albino Ciccanti. En la loka gazetaro aperis pluraj bildoj pri la kongreso. Oni speciale montris Prof. Humphrey Ton-

kin kaj emfazis liajn vortojn, ke "Vortoj estas pli fortaj ol armiloj", kaj ke "Esperanto estas unu el la plej geniaj eltrovoj de nia epoko".

(Kompilita laŭ raportoj ricevita de Joyce Turner, Marj Ellyard kaj Les Scott)

La traduko de PROCESSOR en Esperanto

Bernard Golden

Ivan Bujdošo, komputrikisto ĉe Hungara Esperanto-Asocio kaj la sekretario de la Terminologia Sekcio de Scienca Eldona Centro en Budapešto, proponas solvi terminologiajn problemojn en la komputeriko per inĝenia laborprincipo. Se mi bone komprenas la metodon li enmetas anglajn terminojn en komputeron, ŝaltas la aparaton kaj ricevas la ĝustajn Esperantajn ekvivalentojn. Eble la procedo ne estas tiel aŭtomata kaj facila, ĉar li devas ankaŭ enketi ĉe fakuloj pri malfacile solveblaj kaj tiklaj problemoj.

Leginte respondojn al la demando pri la esperantigo de la angla vorto **processor**, mi havis la impreson, ke oni ne sufiĉe profunde pritraktis la problemon. La nura trakribrado de Esperantaj vortaroj, ĉefe **Plena Vortaro** kaj **Plena Ilustrita Vortaro**, por trovi konvenan radikon, ne alportos solvon. Estas necese nun, unu fojon por ĉiam, superrigardi kaj revizii la tutan vortfamilion, al kiu apartenas **processor** kaj la Esperantaj terminoj proponitaj por traduki ĝin, ĉar ili devenas de parencaj etimoj kaj pro tio havas simildajn signifojn. Jen listo, kiu miaopinie estas kompleta, enhavanta ĉiujn vortojn apartenantajn al la vortfamilio devenanta de la latina verbo **procedere**, kies pasiva participo estas **processus**.

A. **procedere**: 1. proced/i,

2. procedur/o

B. **processus**: 1. proces/o, 2. procesi/o,

3. procez/o

La infinitivo **procedere** estas kunmetita el **pro** "antaŭ" kaj **cedere** "iri", "retiriĝi", "cedi". **Cedere** rilatas al L. **cis** "cis", **Helena hodos** "vojo" kaj L. **sedere** "sidi".

N-roj A-1 kaj A-2 havas kiel etimon la latinan infinitivon aŭ etnolingvan vorton, plej probable francan aŭ anglan, derivitan de la latina verbo. La Esperantaj vortoj B-1 kaj B-2 originas el etimoj bazitaj sur la participo, en kiu la "s"-sono anstataŭas la "d". La "z" en B-3 estas arbitra esperantisma ŝanĝo por diferencigi skribforme unu el la

signifoj de la polisemia "proceso".

Pro simileco de formo kaj signifo tiuj vortoj estas paronimoj; ili estas evitendaj, ĉar ili malfaciligas la lernadon kaj uzadon de Esperanto. Daŭre aperantaj eraroj en publikigitaj tekstoj atestas, ke esperantistoj ofte misuzas tro simildajn vortformojn, ĉar ili ne povas elekti la ĝustan vorton bezonatan en la kunteksto. La paro "pesi/pezi" konfuzas eĉ leksikografojn!

La sekvaj Esperantaj terminoj estis proponitaj por traduki **processor**: **procedilo**, **procezilo**, **prilaborilo**, **procesoro**, **prosesilo**. "Procedilo" kaj "procezilo" estas regule pluformitaj surbaze de la jam registritaj radikoj "proced-" kaj "procez-". "Prilaborilo", formita per tri Esperantaj morfemoj, ricevas kiel kunmetaĵo la signifon de **processor**. Neo logismoj estas "procesoro", kies etimo estas **processor**, kaj "prosesilo", kies unua "s" ehas la prononcon de la "c" en la A. **process**. Ne proponita estas "procesilo", plej verŝajne pro la jura kaj anatomia signifoj de la radikoj "proces-".

Komparo de la elektoj kaj objektoj de la fakuloj indikas mankon de akordo; efektive, unu nuligas la proponon de alia. Balazs Wacha, lingvisto, malproponas "procezilo" kaj "procesoro" kaj akceptas "prilaborilo" kaj "procedilo". Ĉi-lastan vorton li difinas kiel "oro gajnita per proceso", kio estas ridindaĵo, ĉar oni kutime ne interpretas Esperantaj vortojn finigantajn per "-oro" tiumaniere. Ĉu "kastoro" estas "oro gajnita de kasto. Ĉu "pastoro" estas "oro preparita el pasto"?

Sajnas, ke la sola termino, kiu rezistas al kritiko, estas la kunmetaĵo "prilaborilo", kies signifo estas tiel ĝenerala, ke ĝi estas facile uzebla en pluraj kunteksto sen kaŭzi konfuzon pro paronimeco aŭ polisemio. Pluformado ne estas problemo, kaj oni povas diri "mikroprilaborilo" anstataŭ "mikroproces-

oro". Mi mem malaprobas la alprenon de novaj radikoj kiel "procesor-" kaj "proses-", ĉar ili nur pligrandigas la nombron de paronimoj.

Mi opinias bizara kaj rifuzenda la proponon de Balazs Wach aŭzi la "abreviaturon" "CoPO" (Centra Procedilo) kaj pluformi kriptajn kiel "cop(um)j", "copado" kaj "encopigi". Tiajn vortformojn oni povas enkonduki en sciencifikciajn sed ne en seriozan sciencon verkon.

KONFIDENCAJ ANALOJ DE 1984 (Nepre eldonendaj) de ROLO III

En Singapuro, la leona aŭ liana urbo, la ĉefministro ĉefo de la Popola Agitopopo (PAP) maljuniĝis sed tamen restis reĝo. Li anoncis, ke li abdikos sian oficon post 5 jaroj, kiam li fariĝos 65 jaraĝa. La filo de Reĝo Harry (kromnomo, kiun li prenis honore al antaŭa aŭstria reprezentanto en la urboŝtato), kiu jam rapide fariĝis generalo en la armeo, fariĝis PAPisto. Verŝajne en 1989 li fariĝos Harry la Dua. En la Urbo de la Granda Kato, leonido certe nepre venkos, ĉar la PAPo estas kato-leka. En la balotado en Decembro la Papistoj gajnis 77 el la 79 foteloj en la Parlamento. La Reĝo plendis, ke tio estas minaco al la demontkretena sistemo. Kiel oni povas daŭrigi sistemon de "unu homo, unu voĉo", se la nombro da kontraŭuloj tiel pliiĝas?

En Aŭstralio Feliĉa daŭris rivaleco inter la Akcipitro kaj la Pavo. La akcipitro, tre amata de la popolo pro sia ĉeesto konstanta ĉe diversaj sportoj, tamen havis problemojn en sia maldekstraflugilo, kaj pro siaj okuloj. En kriceta konkurso li rigardis tro proksime flugantan objekton. Aliajn fojojn li perdis publike kelkajn larmojn ĉar lia filino ne sekvis lin en la politikon. La pavo estis tre fiero pri la lojaleco de sia bela vosto, kaj estis subtenata de Sekretariabirdo. Ambaŭ apris en la plumparado de la Melburna Pokalo en Novembro. En la balotado en Decembro, granda plimulto kredis, ke ili plenigas formulon por loterio, aŭ ĉevalkonkurso, anstataŭ baloton por senatuto. Tamen, tute hazarde, sufiĉe da balotoj estis kor-

ektaj por ebligi la oficistojn deklari la Akcipitron la venkinto. Sed oni ne akceptis la referendumon krei monolitajn aŭ unulitajn ĉambron en la parolejo.

En Akcidenta Germanio evidentiĝis, ke multaj politikistoj estas markistoj, kvankam kompreneble ili akceptis la markojn nur por la bono de la publiko, tio estas por la partio. La Verda Partio trovis sin sen okazo de demonstracio... ne povis okazi pro-testo! Tial ili decidis sendi delegitaron al Israelo, por insisti, ke oni ne verdigu la landon, sed ke ĉi restu dezerto laŭ la intenco de la Arida Fato. Ilin subtenis la marksistoj en knecesejo, alivorte la Parlamenta Domo. En Berlino, la "grandega urbo dividita de murego" (PIV) la unusonanoj, frankoj kaj brutoj ankoraŭ paradis sub la tilioj. En Oriento nenio nova, sed turistoj daŭre vizitis la akcidenton, kaj estis nova difino de kvar-eto: "Orienta orkestro, kiu vizitis la Akcidenton!"

En Ursolando oni lernis, ke la Ministro pri Defendado, Ĉefo de la Reĝa Savarmeo en Afganio, Petro Ustinov, mortis sekrete post longa sano. La Sekretario de la Kulinista Partio, Ĉefministro Ĉerkovenko, bonvenigis multajn gestojn el aliaj kuministaj fratinaĵlandoj por la funebro. Male al la antaŭdiroj de la malicaj aŭ licamaj ĵurnalistoj en kapitalistaj landoj, oni nomis sen prokrasto, la Vic-Ministon, kaj la Savarmeo restis firme Reĝa. La loĝantaro de Ursolando kreskis dum la jaro pro la enmigrado de parenco de Stalago, kiu suferis en Akcidento pro nostalgio. Oni demandis ĉu ŝi celas fariĝi stala reĝino?

En Transalpa Gallio estis problemoj de strikoj, kiuj efikis maltrafike sur la Romiaj Vojoj. La Prezidento, la Mita Rano, spertis, ke oni ne povas ĉiam doni laboron al ĉiu. Mutaj usonaj turistoj, kiuj ŝajnis labori en la Ĉefejo de UNESKO devis reiri al siaj Kolegioj en Americio, kvankam la bonaj amerikanoj reiros al Parizo post la morto. La Anĝeloj restis en Parizo, kun la espero, ke la foriro de la amerikanoj sufiĉe plibonigos la Organizaĵon por savi la doloran kotizon.

En Esperantio la amasoj vizitis Van-kuveron por ĝui la usonan kulturon. La Kanadanoj aranĝis strikon por bonvenigi anĝelajn partoprenantojn. Ili

ankaŭ eldonis novan tradukon de sia Stata Libro "La Eta Princo Edvardo". La Komitato havis belan kvorumon, kaj la Estraro inventis novan regularon por Universalaj Kongresoj, kiu certigu, ke UEA trovi profeton. Ĉar profeto ne estas sen honoro eĉ en la kongresurbo Same kiel en la fama kazo de Markso Twain (tven), la raportoj de la morto de la Monato estis troigitaj! Kiam la jaro finiĝis ĉiu ĝojis pro la fakto, ke ĉiunonate oni havus en la gazeto raportojn, notojn kaj se ne satiriazon almenaŭ satireton!

25th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

4-11 Jan., 1986 — Perth, W.A.

This congress will be held at St. Catherine's College, one of the residential colleges adjacent to the beautiful University of W.A.

Early enrolment will secure your accommodation.

Congress Fee: \$35. Pensioners/Full-time students \$30.

Mail your Congress Fee to the Treasurer, **Mr. O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.** If you wish to stay at the College add \$10 for Room Deposit. Please make cheques payable to "Australian Esperanto Congress" and add 12 cents for bank charges.

Fifth List of Enrolments

55. Kitty The, Melbourne
56. Millie Miljons, Melbourne
57. Vlado Kosef, Cobar, NSW
58. Cynthia Michaelson, Perth
59. Kay McCashney, Perth
60. Dr. Don Broadribb, Perth
61. Norma Broadribb, Perth
62. Bill Clarke, Perth
63. Volo Gueltling, Sydney
64. Arthur Cocking, Manly
65. Joan Green, Coal Point, NSW
66. Rene Smeets, Perth
67. Hugh Malcolm, Perth
68. Sandra Connors, Toowoomba
69. Pattie Anson, Canberra
70. Marge Parkes, Perth
71. Anne Gash, Manly
72. Myrtle Straker, Sydney
73. Irena Timonin, Sydney
74. John Harvey, Perth
75. Olive Larter, Perth

76. Rowland Stephens, Perth
 77. Veronica Egan, Perth
 78. Ottilie Strempel, Perth
 79. Cathy Sullivan, Brisbane
 80. Gordon Gregson, Perth
 81. Max Wearing, Adelaide
 82. Mac LeFevre Launceston, Tas.
 83. Pat LeFevre, Launceston
 84. Gerald Tumman, Melbourne
 85. Ruth Tumman, Melbourne
 86. Adrian Kelly, Melbourne
 87. Stan Kelly, Melbourne
 88. J. Boyce, Sydney
 89. Rafaella Alvaro Perth
 90. Ivy Fallu, Melbourne
- State Distribution: W.A. 32; N.S.W. 29; Q'ld. 11; Vic. 11; A.C.T. 4; Tas. 2; S.A. 1.

DRAMO-KONKURSO: La Brisbana Esperanto-Societo ĵus anoncis, ke ĝi partoprenos en la konkurso kaj ĝi prezentos dramon kun la titolo "HONESTO ESTAS LA PLEJ BONA POLITIKO", daŭro ĉ. 20 minutoj.

Ĉiuj aliaj grupoj, kiuj deziras partopreni NEPRE nun informu la Komisionon (**Herbert Koppel, 41 Byfield St., Reservoir, Vic. 3073**) pri la titolo de la teatraĵo kaj la proksimuma tempo-daŭro.



● **PERTO:** Spite de malbona vetero 12 membroj ĉeestis la kunvenon je la 12-a de junio. Cefe ni rigardis lumbildojn pri Hispanio. Okcidenta Hindujo kaj la insuloj de la Suda Maro. Prezidanto Jack Hawks raportis pri la aranĝoj por la Kongreso.

Du tagojn poste okazis en restoracio kunveno de Esperanto-studentoj de la "Mt. Lawley Kolegio de Supera Edukado". Estis la klaso de estontaj instruistoj, kiun instruas S-ino Vera Payne. Virginia Amena deklamis belstile la poemon "La Verda Standardo" de D-ro Zamenhof. S-ino I. Einihovici organizis muzikprogramon dum kiu junulo John

Oliver lud's la klarineton kaj la akordionon kaj akompanis komunan kantadon.

● **KANBERO:** La 20-an de junio Ralph Harry faris paroladon al la Spirita Asembleo de la Baha'anoj de la Aŭstralia Ĉefurba Teritorio. Post rakonto de la historio de la Esperanto-movado, kun speciala substreko de la vivo de Lidja Zamenhof kaj la Parizaj Paroladoj de 'Abdul'l-Baha. li donis lecionon, kun traduko de peco el la libreto: "A Life Plan" de Peter Esslemont, de kiu ĉiu ĉeestanto ricevis ekzempleron. Artikolo aperos en la Heroldo de la Sudo, la organo de la Baha'anoj en Aŭstralio. Dek Kvin adoltoj kaj kelkaj infanoj ĉeestis.

La 24-an de Junio la Klubo diris "bonan vojaĝon" al Marjorie Ellyard, kiu partoprenos la Universalan Kongreson en Aŭgsburgo. Gail Tregear, Brenda Birkett kaj Katherine Lewis ankaŭ vojaĝas en Eŭropo.

Dum Julio kaj Aŭgusto la Klubo ne kunvenos en la Centro Griffin, sed ĉiun dimanĉon la Prezidanto kondukos "klinikon" en la Biblioteko, Centro Jamison. Membroj ankaŭ helpas pri la katalogado, kaj pri la ekspedo de "Australian Outlook" por la Instituto de Internaciaj Aferoj — la lupaga laboro de la Klubo.

Noto aperis en Canberra Times pri la 25-a Aŭstralia Esperanto Kongreso en Perto.

Willy Firth, studento en A.N.U. pri la germana kaj rusa lingvoj proponis al la Fakultato, ke li studu Esperanton kiel parton de sia kurso. Malgraŭ subteno de A.E.A. la Universitato ne akceptis. Tamen, li studas en la Klubo.

—R.L.H.

● **MANLY:** Je 11-a de junio, 1985 ni ĝuis la viziton al Manly Eduka Centro de S-ro El'aso Jablonski el Tel-Aviv. Post diskutado ni iris al la hejmo de Bess kaj Les Scott por vespermanĝeto.

La kutima vintra elmigrado de Manly-anoj estas iom malpligranda ol en pasintaj jaroj. Nur tri membroj forlasos nin; Les kaj Bess, kiuj ĉeestos la Universalan Kongreson en Augsburg kaj Marjorie Duncan, kiu flugos al Anglio, la 11-an de julio, por pasigi du-monatan ferion tie. Dum tiu tempo ŝi iros

al Barlastono por partopreni en Konferenco pri Internacia Plenaĝula Edukado.

Dum junio, Radio Stacio 2RPH elsendis intervjuon kun Robby Robertson pri Esperanto. Li regule parolas al Rotarianoj, lastatempe al la Warringah, Mosman kaj Northbridge Klubo.

—Eunice GRAHAM

● **GAZET-ABONANTOJ ATENTU:** La Peranto por Eksterlandaj Gazetoj, F-ino Joyce Turner (Rockhampton), forestos de la 25-a de julio ĝis la 5-a de septembro, 1985. Bonvolu, do NE skribu al ŝi dum ŝia foresto.

● **BRISBANO:** Annie Spencer nuntempe mi multe lernis kaj tre ĝuis la deĵoron. klasoj daŭras kiel kutime: progresintoj, tradukantoj kaj diskutgrupanoj. Gaye Phillips vizitas parencojn en Adelajdo, kaj John Paroz eksterlandas en Svisujo, poste en Sud-Afriko. Li vizitos ĉe parencoj en ambaŭ landoj. — Ray Ross.

● **MELBURNO:** "Mia plej ŝatata aŭtoro" kaj "Mia plej ŝatata libro" estis la temoj de la Jar-meza Konkurs-vespero je 24-a de junio, kiun gvidis denove F-ino Margaret Sanders. La premion por la plej bona Esperanto-gajnis Fay Koppel kaj Ruth Tunnan. Fay parolis pri tri elstaraj Esperanto-Libroj, po unu el la tri literaturaj, periodoj Ruth prezentis la libron "La maro ĉirkaŭ ni" ("The sea around us") de Rachel Carson. Errol Chck gajnis la premion por la plej impona libro. Li prezentis kelkajn eldonojn de la Nova Testamento, el sia granda kolekto, kaj priskribis la sintenon de sciencisto al la religio, citante la vortojn de Albert Einstein.

Du komencantoj parolis angle. Geoff Cutter parolis pri la vivo kaj verko de Jules Verne kaj Joe Heard pri Edgar Wallace. Margaret Sanders finis la vesperon per tri kleraj konkursoj pri libroj kaj vort-esprimoj.

—Kara doktoro, mi plurfoje rimarkis, ke mia edzo nokte parolas dum dormo. Kiel kuraci tiun malordon?

—Nenio pl facilas, sinjorino! Permesu al li paroli dumtage! (Hung. Vivo)

LA KORESPOND-KURSA SERVO de la AEA.

Ĝi estas teama afero. Nu, jes, eble ni ankaŭ amas teon; sed vere, ĝi estas afero de multa kunlaborado.

Sian ekziston ĝi ŝuldas al nia karmemora Cecil ("Tajni") Goldsmith, kiu en 1968 enportis du korespondajn kursojn el Britujo (kaj poste aldonis trian). Vigle reklaminte — parte per la tre sukcesaj "verdaj kartoj", kiujn disdonis la membroj — li baldaŭ alvokis helpon kaj varbis kursgvidantojn; kaj ĉar mi mem interesiĝis pri la problemoj de izolitaj lernantoj, mi estis unu el tiuj, kiuj frue aliĝis. Sub lia lerta gvidado, mi multe lernis kaj tre ĝuis la deĵoron

Sed Tajni mortis; kaj dum jaroj la servo, sen komisiito, iĝis nur unu plia devo de la ĉionfaranta Sekretario de AEA. Lernantoj malpliĝis. Do, kiam en 1978 Les Scott sugestis, ke eble mi volos prizorgi la Servon, mi akceptis: far tiu kursgvidado jam iĝis mia plej granda plezuro.

Ĉar la stoko de kurslibroj ktp. tiam preskaŭ tute elĉerpiĝis — unu eĉ ne plu havebla — urĝe necesis reorganizi la kursaron. Feliĉe, ĝuste tiam aperis tri novaj kursetoj, kiuj kune anstataŭis la ne-plu-haveblan "Popular Course": BONAN TAGON de Mabel Wybenga, kun ĝia nova radio-bendo, kiun faris Ron Ritchie ĉe 4NA Nambour kun Stan kaj Audrey Bruton kaj aliaj; JEN NIA MONDO far J. C. WELLS; kaj la "Esperanto Teacher" kurso, kiun mi mem jam kompilis, bazita sur la libro de Mason Stuttard.

La "Progressive" (Step by Step) de BEA, kaj "15 Paŝoj" de W. Auld, iĝis niaj kvara kaj kvina kursoj; kaj ĝuste tiel la serio ankoraŭ estas, kun aldono de "Mia Bildlibro", kiun desegnis Annie Spencer kaj presis Ray Ross al la unua kurso.

Ĝis nun ni vendis: de la unua kurso 217, la dua 101, tria 64, kvara 42, kvina 23; entute 447 kursojn en sep jaroj.

Kompreneble ne ĉiu kiu aĉetas kurson, ĝin finas: en la reala vivo aliaj aferoj sin trudas. Aliflanke, estas tiuj, kiuj diligente studas dum jaroj, eĉ tra la tuta kursaro. Kaj kelkaj, post plurjara foresto, revenas kaj sukcesas — eĉ

aktivas en la movado. Sed ĉiuj, senescepte nun scias pli ol antaŭe pri Esperanto.

Reklamado ĉiam estas problemo. Post provo ĉe diversaj medioj — kaj ni ankoraŭ serĉas kaj provas — ni nun reklamas modeste, en precipe: "New Idea", CWA-gazetoj, kaj "Guiding in Australia" (en kiu jam aperis felietone, Esperanto-kurso).

Tamen la plej bona reklamado estas senkosta (korekto: ĝi kostas ne monon, sed tempon!) — per artikoloj kaj "Leteroj al la Redaktisto" — kiuj nepre inkludu adreson, al kiu interesatoj povos skribi. Fakte, nura reklamo malofte portas rezulton, se ne en la sama gazeto aperas ankaŭ artikolo — prefere mallonga kaj kerna — informante al tiuj, kiuj ne scias, ke la vorto ESPERANTO signifas vivantan, uzeblan lingvon.

Antaŭnelonge aperis tiaj artikoloj en gazetoj de Brisbane, Bathurst Perth kaj "Country Crafts" de la CWA de Vik; kaj mi multe dankas al la verkintoj. Eĉ eksterlande — artikolo de Vera Payne en Hongkonga magazino jam venis 8 informpetojn el Aziaj landoj, kaj almenaŭ unu kursvendon (al Taivano) ĝis nun. Do, skribemuloj — daŭrigu la laboron!

Kiel kursgvidantoj deĵoris sisteme, laŭbezono: S-ro V. J. Timmins, Wre. Chandler, Prof. "Robi" Robertson, Eunice Strawbridge, Bill Wybenga, Jock Campbell, Rene Smets kaj Edith Palmer, Heber Petley kaj Jean Lehan, Arthur Cocking.

Nunaj kursgvidantoj inkludas: Audrey Bruton (CASTLEMAINE, VIK.) Marjorie Duncan, Helen Stone, Myrtle Straker (SYDNEY), Alan Towsey (Tahmoor) Clarence Strochetter (LAUNCESTON), Vera Pavne (PERTH), Kay Anderson (BRISBANE) Joyce Turner (ROCKHAMPTON) kaj mi mem (EMU PARK).

Alan ankaŭ redaktas nian gazeteton "Your Esperanto Bulletin" kaj ĝin presigas Herbert Koppel, al kiu ni ŝuldas la ideon. (Post legado, ĝi finas sian vivon silente reklamante en bibliotekoj kaj lernejoj).

Alia helpo — financa, reklama, konsila, ktp — venis de, notinde: Kathe Schwerin, la Federacio de NSK kaj tiu de Kvinlando; Esp-Ligo de Okcidenta

Aŭstralio; Bob Felby kaj lia grupo en SA; multaj kluboj; individuoj kiel Margaret Chaldecott, Gerald Tumman, kaj Roger Springer (kies afiŝo nun akompanas la "Bulletin" en multaj bibliotekoj) kaj aliaj.

Se unu kunlaboranto elstaras tiu estas sendube nia jam tre aferplena Tom Elliott de la Libroservo, kiu ĉiam per ĉiaj rimedoj klopodas havigi al nia Servo ĉion, kion ĝi bezonas por bone kaj daŭre funkcii.

Dank' al tia kunlaboro (tia teamo!) restas al mi nur: reklami, respondi al informpetoj, vendi volvi enpoŝtigis kursojn komuniki kun kursgvidantoj ktp. kontroli la kason renovigi stokon, serĉi taŭgajn erojn por nia "Bulletin", traduki kaj koncizigi ilin por la redakto ĝustatempe; disdoni la "Bulletin" tra Aŭstralio (-kaj al la Esperanto-Muzeo, Vien:) kaj en mia libera tempo, verki interesajn artikolojn.

Tamen mi ankoraŭ trovas tempon por mia plej granda plezuro, kio estas, pri-trakti la lecionojn de miaj propraj lernantoj, el kiuj multaj iĝas bonaj amikoj. Al ili mi dankas: - kaj ankaŭ al mia pacienca edzino, Nora, kiu ĉion ĉi permesas! John Moore.

LA "A.E."

SUBTEN — FONDUSO 1985

Antaŭe raportita	\$374
F-ino S. Conners, Toowoomba	10
F-ino V. A. Egan, Perth	10
S-ro I. Slavoff, Melbourne	10
	<hr/>
	\$404

"LA RONDO" — N-ro 24 Bezonata

En la Nacia Esperanto-Biblioteko de AEA mankas N-ro 24 (Aŭgusto 1942) de "La Rondo". Ni urĝe bezonas tiun Numeron.

Se vi havas ekzempleron aŭ scias, kie situas kompleto de tiu jaro, bonvole informu Ralph Harry, 8 Tennyson Crescent, Forrest, ACT, 2603.

"KONSULTU LA KONSILANTON"

"La litero "a" je la fino de ŝia nomo evitus tian (konfuzigan) situacion." Citajo de "Serculo" en "A.E." (N-ro 224, p. 325)

Kara Serculo: Denove mi respondas al vi. Via pensiga letero meritis pli longan, pensplenan respondon. Laŭ mia promeso, mi nun provas respondi.

"Por ĉiu afero sub la suno estas sezono", diris Salomono. Nun certe ne estas taŭga sezono emfazi seks-diferencojn. Kial ne nun, speciale? Ĉar nun kelkaj, ne nur "liberemaj" virinoj, postulas, ke ni evitu ĉiujn "seksistajn" vortojn. Iuj eĉ sugestis, ke ni evitu "li'n aŭ "ŝi'n kaj uzu la vorton "ŝli'n anstataŭe.

Mi tute konsentas, ke multaj jurnalaj tro emfazas sekson. Ne gravas ĉu kuracisto aŭ poeto estas viro aŭ virino. Prave, "doktoro, poeto, profesoro, instruisto kasisito" k.t.p., sufiĉas por ambaŭ seksoj. Mi eĉ vidas en oficialaj listoj, ekzemple "Marjorie Smith, domastro" ne "dommastrino". Kial ne? En eble 90% da aferoj, ne gravas ĉu persono estas viro aŭ virino — li aŭ ŝi (ŝli?) agadas kiel homo, ne kiel viro aŭ virino. Kial ŝanĝi la lingvon por 10%? — KONSILANTO.

LA KREDO DE SPIRITA MILITISTO

Mi estas sen gepatroj; mi faras la ĉielon kaj teron miaj gepatroj.

Mi estas sen hejmo; mi faras la konscion mia hejmo.

Mi estas sen vivo aŭ morto; mi faras la tajdojn de spirado mia vivo kaj morto.

Mi estas sen Dia povo; mi faras honestecon mia Dia povo.

Mi estas sen rimedoj; mi faras komprenon mia ĉefa rimedo.

Mi estas sen magiaj sekretoj; mi faras individuecon mia magia sekreto.

Mi estas sen korpo; mi faras persiston mia korpo.

Mi estas sen okuloj; mi faras la ekfulmon miaj okuloj.

Mi estas sen oreloj; mi faras sentemon miaj oreloj.

Mi estas sen membroj; mi faras rapidecon miaj membroj.

Mi estas sen strategio; mi faras intuicion mia strategio.

Mi estas sen intencoj; mi faras la
 ekkapton de okazoj mia intenco.
 Mi estas sen mirakloj; mi faras justan
 faradon miaj mirakloj.
 Mi estas sen principoj; mi faras adapt-
 ĉemon al ĉiuj cirkonstantoj miaj.
 principoj.
 Mi estas sen taktikoj; mi faras mal-
 plenecon kaj plenecon miaj taktikoj.
 Mi estas sen talentoj; mi faras pretan
 spriton mia talento.
 Mi estas sen amikoj; mi faras mian
 menson mia amiko.
 Mi estas sen malamikoj; mi faras
 senatentecon mia malamiko.
 Mi estas sen kiraso; mi faras bon-
 korecon kaj virtecon mia kiraso.
 Mi estas sen kastelo; mi faras
 nemoveblan menson mia kastelo.
 Mi estas sen glavo; mi faras sindonadon
 mia glavo.
 Anonima Samurai, 14-a jarcento.
 Tradukita de Aaron Davey,
 junulo el Perto, en Armidale.
 (Presita laŭ peto de S-ro
 R. L. Harry)

FLUGVOJAĜO AL ĈINIO

Ni planas grup-vojaĝon al Pekino por
 la venontjara Universala Esperanto-
 Kongreso. Se ni flugos kune ni povos
 ricevi konsiderindan rabaton kaj povos
 ankaŭ interrompi nian flugon en Hong-
 kongo aŭ Singapuro.

Se tia grup-vojaĝo interesas v.n.,
 sendu afrankitan respond-koverton al
 S-ino Betty Cleminson, 20 Stirling Ave.,
 HARBORD, NSW, 2096.

RECENZOJ

ĈU VI KONAS LA TERON?

(Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj) Orig-
 inale verkita de D-ro Endre Dudich,
 eldonita de la Scienca Eldona Centro de
 UEA, Budapeŝt. Prezo ĉ. \$8.00. mendu
 de AEA Book Service, P.O. Box 230,
 Matraville, NSW, 2036.

Jen altnivela enkonduko en la geo-
 logion. La aŭtoro traktas en populariga
 maniero la jenajn subbranĉojn de la
 geologio: geonomion, geokemion, min-
 eralogion, dinamikan geologion, petro-
 logion, sedimentologion, paleontologion,
 tektonikon, ter-internon, ter-historion,

stratigrafion, aplikan geofizikon kaj
 geologion, kosmologion kaj planedo-
 logion.

Detalaj desegnoj kaj tabeloj akom-
 panas ĉiun ĉapitron. Fine aperas geo-
 logia lekikoneto kaj listo de Esperanta
 kaj alilingva literaturo.

La verko ampleksas 150 paĝojn plus
 68 paĝojn da scienc-teknikaj anoncoj.
 Bele impresas la aspekto de la libro.

● **DANKESPRIMO** de la familio
 LINTON, responde al kondolencna
 letero de A.E.A. — Prezidanto Mac
 LeFevre:

"Dear Mr. LeFevre,

I would like to thank you, on behalf
 of my mother, for your very nice letter.
 Your kind remarks about my father are
 much appreciated and have helped to
 sustain my mother and all of us.

My father deeply loved the Esperanto
 movement and it is most gratifying to
 know that it was reciprocated.

Thank you indeed,

June D. Leeuwrik."

● **EUROPA TELEVIDO:** Post ĉirkaŭ
 2 jaroj, dank' al pafota satelito, kiu
 nomiĝos "Olympus", la itala Radiotele-
 vido povos elsendi programon, kiu estos
 videbla en preskaŭ tuta Eŭropo. La
 plenumo de la projekto estos ebla dank'
 al kv'njara interkonsento inter la tele-
 vido instanco kaj la Eŭropa Kosma
 Agentejo.

La satelito estos pafita en 1987 el
 Franca Gujano; por kvin jaroj, la itala
 Radiotelevido (RAI) povos uzi solrajte
 unu televidan kanalon. Unuamomente,
 la elsendoj havos teknikan karakteron:
 tio signifas, ke ili celas difini la pro-
 gramadon pli taŭgan rilate kvaliton,
 variecon kaj enhavon; nur poste, estos
 dissendata la eŭropa programo.

La projekto "Olympus" estas sub-
 tenata de ok landoj; el ili, Italio kon-
 tr buas per 250 miliardoj da liroj, kiuj
 egalas al 31% el la kostoj.

(D-ro A. De Salvo en la Esperanto-
 emisio de Radio Roma)

● **PENSIGA DIRO:** "La plej subevol-
 uita teritorio en la mondo troviĝas —
 sub niaj ĉapeloj." (El "Faktoj kaj Fan-
 tazioj")

The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: S-ro Mac LeFevre, 231 St. John Street, Launceston, Tas., 7250.

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 226 (306)

MELBURNO

Septembro, 1985

THE ESPERANTO MOVEMENT AND PEACE

From its inception in 1887 the Esperanto Movement has received much of its impulse from the hope that a neutral, easily learned international language would break down barriers between individuals in different countries and even between the nation states, thus promoting understanding and peace.

Dr. L. L. Zamenhof, the Polish composer of Esperanto, profoundly believed in the philosophy he called "homaranismo", briefly the brotherhood and equality of all mankind. His followers have had various ideas as to the specific means by which the "interna ideo" (the inner idea) of the Esperanto movement should be pursued. Many have been convinced that world peace can only be achieved through the reform, or change, of the social order. They have promoted Esperanto as a means of communication between activists in a "nationless" world. Many others have seen Esperanto as a language through which their particular religion, or the ecumenical movement, can be advanced. Others again see Esperanto as the ideal language for use by international organisations and the formulation of inter-

national law. Some people learn Esperanto purely for travel, or for business contacts, but the majority have at least a general conviction that Esperanto can make a contribution to peace.

With such a variety of objectives and emphases it has never been easy to maintain a united world movement. But large-scale international associations have achieved a remarkable degree of solidarity by insisting on neutrality in relation to specific ideologies and political parties . . . keeping the official organisations, such as the Universal Esperanto Association, which has consultative relations with UNESCO, aloof from controversy, while allowing individual members and non-neutral affiliated organisations to pursue freely their particular roads to peace. The balance has not been easy to maintain, and from time to time there have been groups which have stood apart from the main stream because they have felt that the official organisations have departed from the straight and narrow path of neutrality.

The decision of the Australian Esperanto Association to have at its biennial Congress in Perth next January, a dis-

discussion on the contribution of Esperanto to world peace is an attempt, while adhering to its constitutional neutrality in relation to party politics and social problems to participate actively in the United Nations International Year of Peace program.

The International Language, soon to be a hundred years old has already made a significant contribution to understanding and peace through personal contacts between peoples of different nationalities, races and religions. It helps to eliminate prejudices and to promote positive relationships and co-operation. I hope the Perth Congress will document the achievements of Esperanto and that the discussion will pinpoint new fields and methods of solidarity and international co-operation. A feature of this aspect of peace work is that it does not require universal or even large-scale acceptance of the language before a start can be made. Even a few hundred thousand persons can leaven the lump of international inertia and correct misunderstandings by facilitating inter-people cultural and news exchanges. Discussions of this topic will be led in Perth by VERA PAYNE, who studied Esperanto at the University of Southern California and teaches classes at two levels in Mount Lawley College, the Western Australian College of Advanced Education.

The second level at which Esperanto operates, and could be used more widely, is in inter-country relationships. The Congress will need to examine realistically the reasons why countries whose peoples speak the same language have sometimes been in conflict. But it will also be able to analyse the experience of the British Commonwealth and the testimony of its Secretary-General that having a common language has facilitated agreement and co-operation. The preparatory study for "inter-state relations" is in the hands of TREVOR STEELE, a brilliant historian and linguist, whose novel "SED NUR FRAGMENTC" (Only a Fragment) is being published later this year.

I myself have had some experience of language problems—in bilateral international relations, while serving as an Australian Ambassador. This was recently illustrated by the report in France that Australia had established a "strike-force" for New Caledonia. What

had been set up was a "task-force" to monitor the situation! Similarly an Australian correspondent reported that reaction to French Government proposals was "Deception!". The French word "d^eception" in this context meant "disappointment".

I have given more attention to the role of Esperanto in international organisations. The Congress will be able to study the use, limited but not insignificant, which the secretariats of the United Nations, UNESCO and other organisations have already made of Esperanto in their programmes and for information. It will be relatively easy to analyse how a neutral official language could theoretically be employed to eliminate language discrimination against the smaller countries and to promote equality of opportunity in international forums. But it is clearly not enough to persuade officials of such organisations, by rational argument, that it would be ethical, or economical, to adopt Esperanto. That is a matter for Governments to decide, and Governments by definition represent nations and have vested interests in their own languages. There are different schools of thought as to the type of project which might be sold to a group of sponsoring governments. In Western Europe stress is being laid on Esperanto as a technical bridge, or central language base to simplify computer translation and interpretation between the ten co-equal official languages of the European Communities. Others, and I am of this school, believe Esperanto is equally or more important as a means of communication on a basis of equality so that representatives can discuss problems and negotiate informally outside the conference rooms where the apparatus of interpretation is available. Another aspect to be investigated and quantified is the cost of the present inequitable system, and the savings which could be achieved through use of a neutral language.

The Australian Esperanto Association is precluded by its constitution from entering into organic links with the "Peace Movement". Participation in Palm Sunday marches, or membership of political parties devoted to nuclear disarmament is a question for the individual conscience of members. But it is appropriate that Esperantists should,

in the International Year of Peace, proclaim the practical contribution which the International Language has made to the cause of peace. The Universal Esperanto Association has more than once been nominated by objective parliamentary groups for a Nobel Peace Prize. If the Perth Congress can demonstrate the relevance of the International Language for the replacement of war by structures of international toleration and co-operation, more people will learn Esperanto and many more will give it their support.

—RALPH HARRY.



D-ro Arthur Baur en SVISA RADIO INTERNACIA

A E R P O Ŝ T O

Sur la teritorio de la flughaveno de Zuerich oni estas konstruanta novan poŝtoŝtationon, kiu ne servas al la ĝenerala publiko — tia oficejo jam ekzistas tie — sed ĝi servas al la prilaborado de la poŝtajoj, kiuj alvenas aŭ foriras per la aviadiloj. Pro tio ĝi oficiale nomiĝas "Interŝanĝejo". Okaze de tiu konstruado la direkcio de la flughaveno organizis gazetaran konferencon, en kiu mi partoprenis.

La poŝta interŝanĝejo estas domego en industria stilo, kie laboras 40 ĝis 60 poŝtistoj. Apude troviĝas la rentgenlaboratorio kie oni per X-radioj tralumas suspektatajn pakojn kaj povas en sekurigita loko apude eksplodigi danĝerajn trovajn. La konstruado de tiu interŝanĝejo fariĝis necesa, pro la nekredibla kresko de la aerpoŝto. Antaŭ 30 jaroj ĝi ampleksis trimil tunojn en la jaro, hodiaŭ estas kvinfoje pli, nome 15.000 tunoj. Oni povas imagi kia laboro estas la prilaborado de tiuj kvantoj.

Por komprenigi al la publiko la signifon de la aerpoŝto estas organizita en la flughaveno mem, tie kie pasas la pasaĝeroj, ekspozicio pri la evoluo de la aerpoŝto sub la slogano "Kiel la poŝto ricevis flugilojn". La unuajn flugilojn evidente havigis al ĝi la kolomboj kaj pro tio ricevis lokon en la ekspozicio granda kaĉo kun vivantaj kolomboj. La unua poŝta flugo en Svislando

*Mr. R. L. Harry, A.C., C.B.E., was Australian Ambassador in Brussels, Saigon, and Bonn and (from 1975 to 1978) Australian Permanent Representative to the United Nations in New York. After his retirement he became a visiting Fellow at the University of Tasmania Director of the Australian Institute of International Affairs and President of the Australian Esperanto Association.

okazis la 30-an de marto 1913 kaj ĝi kovris la enorman distancon inter Burgdorf kaj Bern, por kiu la trajno bezonas kvaronan horon.

Interesa dokumento estas la unua kontrakto farita inter la svisa poŝto kaj la nacia flugsocieto "Swissair" de la jaro 1932. La unuaj poŝtaj linioj tie nomitaj estas al Amsterdam, Berlino, Vieno kaj Parizo, kaj oni flugis nur somere kaj oni transportis maksimume 133 kilogramojn da poŝtajoj. Estas tamen notinde, ke en tiu epoko oni jam konsideris la aerpoŝton tiel serioze, ke en diversaj landoj oni instalas flugliniojn nur por la poŝto kaj pasaĝerojn oni tute ne akceptis aŭ nur kunflugis, se la pezo permesis tion.

Nu do, hodiaŭ la poŝto ne plu havas la prioritaton antaŭ la pasaĝeroj, sed antaŭ alia frajto. Tiu devas atendi, se la aviadilo fariĝas tro plena aŭ tro peza. Por eviti, ke poŝto kaj frajto kunpuŝiĝas estas necesa zorga planado surbaze de la spertitaj ciferoj sur la kampo sed plej grava estas la rapideco, ne la rapideco de la aviadiloj, ĉar ili jam flugas sufiĉe rapide, sed la rapideco sur la tero. Ni ĉiuj kelkfoje koleriĝas aŭ enuas, se ni kiel pasaĝeroj devas atendi en la flughavenoj inter la "check-in" kaj la forflugo, sed la samo ankaŭ okazas al la poŝto, kaj la plej malbona afero estas, se ĝi devas kuŝi en la flug-

haveno antaŭ la forflugo aŭ post la alveno.

En Svislando la poŝto havas la principon ke ĉiu letero devas esti ĉe la ricevanto la morgaŭan tagon. Tio okazas tute regule. Laŭ la sama principo, se la poŝtajo alvenas en la flughaveno el eksterlando, en la sekvanta tago la ricevanto havas ĝin en sia mano. Bedaŭrinde oni devas konстати ke tiu regulo en konsiderinde granda nombro de landoj ne ekzistas. Tion mi jam observis feriante en certaj landoj, kiu mi pro ĝentileco nun ne volas nomi. Sendinte kartojn al amikoj miaj, mi mem ofte pli frue revenis ol mia karto kaj pasis ne nur tagoj sed ĉe semajnoj, ĝis subite iu telefonis al mi dirante "nun via karto alvenis, mi dankas". Pri tiaj aferoj oni okupiĝas en internaciaj poŝtaj konferencoj, sed evidente oni ne havas influon al taskoj apartentantaj al la nacia suvereneco.

Nun oni serĉis la solvon kreante novajn specojn de poŝto, kiu enhavas finanĉan instigon, ĉar ili estas pli profitonaj kaj tiel pli interesas la poŝtajn administraciojn. Ekzistas nun sistemo SAL, t.e. "surface-air-lifted", en kiu la poŝtajo veturas transaere, se tio konvenas sed la kliento ne havas garantion. Tamen tiu sistemo rapidigas la iron de poŝtajo ekzemple de Svislando al Pekino aŭ Ĉilio al 1-3 semajnoj anstataŭ 3 monatoj. Ankoraŭ pli rapida estas la EMS, t.e. "express mail service". Tie la poŝtajo estas transportata eksprese ĝis kaj de la flughaveno kaj venturas nepre tra la aero. Tiu servo kompreneble vere kaj maksimume eluzas la rapidecon tra la aero, sed ĝi estas sufiĉe multekosta, ĉar en Eŭropo oni devas pagi 30 frankojn por unu kilogramo, 60 ĝis Suda Ameriko kaj 80 ĝis Aŭstralio. La enkonduko estis necesa i.a. pro la privata konkurenco. Privataj entreprenoj utiligante privatajn aviadilojn en la lasta tempo ofertis rapidegan servon kompreneble je altaj tarifoj. Estas malnova vero, ke privata entrepreno estas ĉiam pli efika ol ŝtata, do ne estas kaŭzo por miri pri tio kaj pri la neefikeco de certaj ŝtataj poŝtaj administracioj. La tuta poŝta sistemo evidente tamen profitas de la aviado koncerne rapidecon, sed ĝi fariĝis pli komplika.

En la bona malnova tempo, kiel oni

ŝatas diri kelkfoje, ekzistis du tarifoj por leteroj, unu en la lando, kaj la alia por la tuta mondo. Kiam la aerpoŝto estis enkondukita, oni devis pagi surtakson. Nuntempe en Eŭropo sen surtakso ĉiuj leteroj kaj kartoj — ne presaj — estas transportataj tra la aero, sed por la transmaraj landoj ekzistas diversaj taksoj, kiujn oni devas studi antaŭ ol afranki leteron. Ili ĉiam kostas pli ol antaŭe, sed garantias flugtransporton. La malnova tutmonda universal-unueca tarifoj ne plu ekzistas. Por la flugsocietoj la aerpoŝto estas fonto de profito ekzemple Swissair ĉerpis el ĝi lastan jaron 50 milionojn da frankoj. Evidente ĉiuj flugsocietoj tre emas transpreni aerpoŝton.

ZIGZAGE TRA LA 70-a UNIVERSALA KONGRESO

"La Strobilo": Kiel kutime ĉe Universalaj Kongresoj aperis ĉiutaga Kongresa Kuriero. Ĉi-jare ĝi nomiĝis "La Strobilo" kaj estis redaktita sub la aŭspicio de "MONATO". Redaktis ĝin Stefan Maul, Thomas Bormann kaj Paul Peeraerts.

Sed kion signifas "Strobilo"? Strobilo estas la konus-forma frukto de diversaj arboj, ekzemple de l' cembro La cembra strobilo estis antikva simbolo de fekundeco kaj signo de la romia legio. Augsburg, kiu estis fondita de la romianoj antaŭ dumil jaroj, ankaŭ heredis ĉi tiun simbolon, kiu fariĝis urba blazono.

BURKINA FASO: Inter la salutintaj diplomatoj dum la Solena Inaŭguro troviĝis ankaŭ Profesoro Walter Heubl, ĉef-konsulo de Burkina Faso. Kiom el niaj legantoj scias kie troviĝas "Burkina Faso"? Via redaktoro tute ne scias, sed felice nia diplomato (Ralph Harry) povis helpi. Burkina Faso estas la nomo por la iama "Alta Voltao", iama franca kolonio en nord-okcidenta Afriko. Kaj la nomo de la lando signifas: "Lando de nekorupteblaj viroj".

La oficiala lingvo estas la franca. Ĝi ne estas reprezentita en Aŭstralio kaj se iu el niaj legantoj deziros viziti tiun "misteran" landon, vi devas akiri vizon en Londono aŭ Vasingtono. Sed ni dubas ĉu vi trovos esperantistojn tie.

Aliĝoj: Entute aliĝis 2311 esperantistoj al la kongreso.

"Muz'ko internacia" nomiĝis raporto kun bildo en la loka ĵurnalo "Augsburger Allgemeine". Ĝi priskribis prezentadon de internacia horo sur la urbdoma placo. Oni speciale laŭdis la anglan kantistinon Sally Philipps, kiu venis el Madagaskaro kaj baldaŭ konkeris la korojn de la aŭskultantoj. Tiu muzika prezentado estis bonega reklamo por Esperanto.

Signo de nia stranga tempo: Dudek kvar anoj de la Ligo de Samsksamaj Ge-esperantistoj, el 12 landoj, renkontiĝis por interkona vespermanĝo en restoracio "Arena" kaj poste por dancado en geja disko-dancejo "Adonis". La sekvintan tagon (dimanĉe) ili denove renkontiĝis por sia oficiala iarkunveno en la Evangelia Studenta Komunumo Augsburg, invitive de la loka geja grupo.

Pacfesto: La 7-an kaj 8-an de aŭgusto kelkaj reprezentantoj de la kongreso ĉeestis la solenaĵojn aranĝitajn okaze de la Pacfestado de Augsburg, en la Ora Salono de la urbdomo. La 7-an de aŭgusto la urbestro Ludwig Kötter bonvenigis la altrangulojn, inter ili la UEA-Prezidanton. La festparoladon faris D-ro Kurt Waldheim, antaŭa ĝenerala sekretario de UNO. Post la programo S-ro Maertens havis la eblecon interparoli kun D-ro Waldheim, kiu esprimis sian bedaŭron, ke Esperanto ankoraŭ ne disvastiĝis pli multe.

Sukcesaj IKU-prelegoj: Okazis 9 prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato. La 120 sidlokoj de salono Wingen estis preskaŭ ĉiam okupitaj kaj la prelegoj estis ĉiam altnivelaj. Estus malfacile elstarigi du aŭ tri prelegojn, tamen estas menciinda aparte vigla prelego de la plei juna preleginto, D-ro Amri Wandel, kiu pritraktis la Universiton ekde ties praeksplodo. Prof. H. Tonkin konfrontis la antikvon kaj la modernon en la literaturo kaj Prof. Eichner prilumigis la lingvajn fontojn de Esperanto.

Urba Akcepto: Ĉefurbestro Hans Breuer akceptis pli ol 200 kongresanojn en la urba domo, inter ili ankaŭ Les kaj Bess Scott el Manly. La ĉefurbestro emfazis la harmonian etoson ĉe la Universala Kongreso, kie homoj el 58 landoj kunvenas sen interpretistoj. Tiel la UK estas unu el la elstaraj eroj de la

ĉi-jara celebrado de la augsburga pacfestado kaj valora pliriĝo de la programo de la granda jubileo de Augsburg UEA-Prezidanto Gregoire Maertens dankis la urbestron pro ties saĝaj vortoj.

Blinduloj: 148 Blinduloj el 17 landoj kunvenis por sia 53-a kongreso kaj ĉefurbestro Hans Breuer salutis la partoprenantojn. La kongreso aprobis rezolucion sendotan al diversaj blindulorganizoj cele al disvastigo de Esperanto inter la blinduloj.

TEJO: Proksimume 420 junuloj el 32 landoj partoprenis, de la 22-a ĝis 29-a de julio, 1985, en la 41-a Internacia Junula Kongreso, kiu okazis en Kastelo Eringerfeld, inter Dortmund kaj Paderborn. La temo de la kongreso estis "Junuloj inter revo, ribelo kaj rezignacio". Oni elektis novan Estraron: Prezidanto fariĝis Ian Jackson (brito loĝanta en Hongkongo), Ĝenerala Sekretario: Jan Koszmaluk (Pollando), Kasiisto: Alex Humet (kataluno loĝanta en Belgio) Oni decidis, ke la venontjara kongreso okazos en Neŭrim (Israelo) kaj la 43-a IJK okazos dum la Jubilea Jaro en Krakovo, laŭ invito de la Pola Esperanto-Junularo

AŬSTRALIA = =KRONIKO

● **PERTO:** Dek ok membroj ĉeestis nian kunvenon je 26-a de junio. S-ro Chris Dean organizis sukcesan "remizvendadon" kaj enprezis \$200 por la kongresa fonduso. S-ro Harvey cerbumigis nin per nekutimaj vortoj kaj ĉino Ruth McGrath legis leteron de la Ĉina Esperanto-Ligo. Ni finis la vesperon per kantado laŭ muziko per sonbendoj. Je 10-a de julio S-ro Hawks demandis nin pri birdoj. Li ankaŭ prezentis diapozitivojn de lokoj, kiujn li vizitis dum vojaĝoj.

● **MELBURNO:** Plej elstara kunveno dum julio estis lumbild-prelego de S-ro Marcelo Leereveld (29/7), kiu ĵus revenis post vizito al la Filipina Insularo. Tiu kunveno altiris pli grandan ĉeestantaron ol kutime, inklude la ĉi-jaran grupon da omencantoj kaj gesinjorojn G. Tumman el fora Croydon. Ni bon-

venigis ankaŭ Isabel Gale kaj Val Fotheringham de la "Waverley"-grupo.

Krom montri multajn kolor-plenajn diapozitivojn, S-ro Leereveld menciis la diversajn religiajn grupojn, kiuj konsistigas la popolon kaj montris kie ili geografie situas. Liaj bildoj montris la diferencojn en la konstruaĵoj de la diversaj grupoj Unikaj ankaŭ estis liaj bildoj pri la teras-agrikulturo alte en la montaro. — F.K.

Ekspozicioj: Gratulon al Ges-roj Tumman, kiuj konsekvence daŭrigas sian propagandan laboron, je ĉiu kvenna okazo.

Je 26-a de junio, 1985, ili denove starigis tre efikan ekspozicion en la kadro de "Open Day" (Tago por Vizitantoj) ĉe la Asocio por Plenaŭla Edukado. Kiel kutime ili parolis al multaj interesatoj kaj disdonis informfoliojn.

Je la 22-a de aŭgusto, 1985, en la kadro de la "Festivalo de Scienco", organizita de ANZAAS (la Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Asocio por la Antaŭenigo de Scienco) en la Centra Urba Placo, ili prezentis tre taŭgan elmontraĵon, ĉi-foje kun emfazo pri la neceso de Internacia Lingvo por tutmonda komunikado kaj aludo al la "Jaro de la Junularo", kaj ties graveco por la estonteco. Malfeliĉe ili devis batali kontraŭ pluvo kaj ventego.

En ambaŭ okazoj, kompreneble, membroj de la Melburna Esperanto-Societo, asistis ĉe la deĵorado kaj informo al interesatoj.

● **SIDNEJO:** Je 1-a de julio Tom Elliott parolis pri sia "biblioteko iom disa". Fakte, mi dubas ĉu la vorto "biblioteko" estas ĝusta, ĉar liaj intereso inkludas librojn, sonbendojn, videokasedojn kaj komputilaĵojn. Semajnon poste Margaret Chaldecott parolis pri "Etaj Vortoj". Si diris, ke al ĉiu radikoj, aŭ al simplaj vortoj oni povas aldoni gramatikajn finaĵojn. Si citis vorton kiun ŝi vidis en la gramatiko "Nelson" — **ANIGEMULINO** — kiu per 11 literoj prezentas frazon de 9 vortoj.

Joan Green, kiu gardas nian kreskantan "Muzeon", parolis (15/7) pri la historio de la Esperanto-movado en Aŭstralio Semajnon poste, James Harwood prezentis lumbildojn pri ferio sur domboato kun siaj gefratoj kaj ties geedzoj, kaj li certe ĝuis la belecon de la rivero Murray de Morgan ĝis Waiakerie.

Je 5-a de aŭgusto David Gould pri-kribis la faman "Sydney to Surf" piedkonkurson, kiu okazis dum la hieraŭa tago, en kiu li kaj lia filo partoprenis.

Je 12/8 Joan Green parolis pri la efikoj de koloroj en nia vivo. Se la lumo en manĝoĉambro ne estas taŭga, kaj la viando havas strangan koloron, ĝi estas nemanĝinda, sed kiam oni uzas la ĝustan lumon, la manĝantoj ja ĝuas la saman viandon! Aliaj uzoj de koloroj temas pri la laborloko, pri malsanejo, kaj pri niaj vestaĵoj.

M. CHALDECOTT.

● **BRISBANO:** Estis plezuro, la 8-an de julio, bonvenigi Arthur Cocking (Manly) je la okazo de vizito al nia klubvespero. Pro la fakto, ke pluvegi nur malmultaj ĉeestis. Ni esperas, ke Arthur kaj edzino tre ĝuis la sunbrilon, kiu poste benis nian terenon, dum ili feris. Post la reveno de Gave Phillips, kiu vizitis al Adelajdo, la kant/dramogrupoj renkontiĝas ĉiun sabaton.

NEKROLOGO

Norman A. Collier forpasis la 11-an de majo 1985. Li naskiĝis en Anglujo en 1895 kaj aliĝis al la "Ludgate Circus" Esperanto-Klubo en 1912, kie instruis lin Montague Butler. Li alvenis en Aŭstralio kaj tuj aliĝis al A.E.A. Li estis delegito de UEA, unue ĉe Bowen, poste ĉe Buderim en Kvinlando. Li estis fond-membro de Sunbrila Marborda Esperanto-Societo kaj ankaŭ de la Federacio de Kvinlando. Li estis fervora esperantisto dum 73 jaroj; li ĉeestis la malfermon de la Esperanto-Muzeo de Kvinlando en oktobro, 1981. Dum multaj jaroj li donacis al la Brisbana Societo eksterlandajn revuojn, kiujn li abonis. Alia pioniro forpasis! Sincerajn kondolencojn al edzino kaj familio.

—RAY ROSS.

● **KVINSLANDO:** La Federacio kondolencas al Dawn Degen kaj Mary Stevenson pro la morto deedzoj. La estraro prizorgas detalojn pri la venonta konferenco ĉe la Ormarbordo en oktobro: samtempe la sekretario Decia Shonhan, aranĝas loĝadon pri la venontjara kunveno ĉe Monto Tamborine.

—RAY ROSS.

—Rigardu, kiel arde amas tiu viro la edzinon! — atentigas iom dezireme edzinon, montranta al la televidilo.

—Sed ĉu vi scias, kiom li ricevas pro tio? — murmuris mediteme ŝia edzo. (Hung. Vivo)

**Poemo dediĉita al la memoro de
Ken Linton**

LA PLUGISTO

Kampo malglata vasta, aĉa
Stipoj sur ŝtonoza mar'
Suno ŝvitiga seka spaco
Strebeganta ĉevalpar'.

Tire tra tirana grundo
Siblas sulko al la cel'
Plugate, kvankam malprofunde
Kreskas polva paralel'.

Al junuloj la plugisto
Montras per instiga vok'
Kiel la rimeno estu
Kiel rekte staru sok'.

Plugi, plugi sen ripozi
Ripeta, teda la labor'
Knaboj nun ne emas lerni
Plugas iom, iras for.

En vespero daŭre plugas
Sulkoj nur tre eta sum'.
Se ni konstante semi devas,
Do plugadu ni en mallum'.

R. L. Harry.

LA VERA POEZIO

Kio estas vera poezio?
Ĉu ne bele vortumita tem'?"
En ĝi estu eble emocio,
Rime ritme polurita gem'.

Sen la ritmo ĉu ne nura prozo
Kun aspekto de la vera od'?
Sen la ritmo ĉu ne nur supozo?
Sed sen temo vana la klopod'.

Vera poezio kun naturo
Triobleca en la bela vest',
Rima ritma tema garnituro;
Kun la tri ĝi soras al la krest'.

Ken G Linton.

**25th AUSTRALIAN
ESPERANTO CONGRESS**

4-11 Jan., 1986 — Perth, W.A.

This congress will be held at St. Catherine's College, one of the residential colleges adjacent to the beautiful University of W.A.

Early enrolment will secure your accommodation.

Congress Fee \$35. Pensioners/Full-time students \$30.

Mail your Congress Fee to the Treasurer Mr. O Longergan 16 Deverell Way, South Bentley, W.A. 6102. If you wish to stay at the College add \$10 for Room Deposit. Please make cheques payable to "Australian Esperanto Congress and add 12 cents for bank charges.

Sixth List of Enrolments.

91. Jean Lehane, Toowoomba
92. Dr. I. F. Somogyi, Port Hedland, W.A.
93. Jack Blockley, Perth
94. Sue Blockley, Perth
95. Stephen Chew, Perth
96. Jim Mazza, Perth
State Distribution: W.A. 37; N.S.W. 29; Q'ld. 12; Vic. 11; A.C.T. 4; Tas. 2; S.A. 1.

**LA "A.E."
SUBTEN — FONDUSO
1985**

Antaŭe raportita	\$404
S-ino G. Stanway, Creswick, Vic.	5
S-ro Henry Rosengren, Melbourne	5
	\$414

KIU SEKVO ?

RECENZOJ

● **FACILA SKEĈ-ALBUMO:** de Bertram Potts; Eldonejo Fonto, Brazilo; 1984; 112 paĝoj; alloga kovrilo kun taŭga desegno, bela preso. Pliajn detalojn petu de A.E.A.-Libro-Servo, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036.

La nomo de novzelanda Bertram Potts ne plu estas nova por niaj legantoj. Jam aperis recenzoj pri liaj novelaroj, NOKTO DA TIMO kaj LA NOVA BUTIKISTO DE NUKUGAIA, lia traduko de la novzelandana romano, INFANOJ DE LA MALRIĈULOJ, kaj

lia ĉarma POEZIA BUKEDO (origin-alaj poemoj por infanoj). Per FACILA SKEĈ-ALBUMO prezentiĝas ankoraŭ unu speco de verko, pri kiu Mariorie Boulton, en sia "Enkonduko", skribis, ". . . granda ja estas ĝia pedagoga valoro. Ĝi liveras al la esperanta instruistaro amason da legmaterialo, kiu estas varia kaj amuza; kiu uzas nur simplajn frazojn kaj ordinaran vortprovizon; . . . kaj kiu ekzercas la laŭlegantojn pri la kutimaj, ofte bezonataj frazoj de ordinaraj konversacioj".

Ĉiu skeĉo limiĝas al nur unu paŝo —do ne tro streĉa tasko ilin legi, eĉ parkerigi necesan tekston por eventuale ludi por klubaj programoj Tiurilate, mi ne povas ne citi denove el la "Enkonduko": "Ĉar ĉiu skeĉo estas por nur du rolantoj, eĉ instruisto de du lernantoj aŭ izolulo povos utiligi ilin, kaj pli grandaj grupoj povos eĉ konkursi per etaj prezentoj . . . la dialogoj evoluas rapide sen malplenaj frazoj; kaj ĉiu skeĉo havas etan klimakson".

Instruistoj, jen 100 eblecoj amuzi kaj paroligi viajn studentojn.
Lernantoj, jen 100 eblecoj testi vian kapablon aktori kaj samtempe distri viajn sam- kaj najbar-klubanojn.

—FAY KOPPEL.

NOVAĴOJ EL JAPANUJO

Bildo de D-ro Zamenhof aperis en du japanaj gazetoj en tutpaĝa reklamo pri la aŭtomata traduksistemo de NEC (la Nippon Electric Co.). "Yomiuri Sinbun", tutlande legata ĵurnalo (eldonkvanto 5,300.000 ekzempleroj aperigis ĝin unue kaj poste "Nihon Keizai Sinbun", tutlanda ekonomia ĵurnalo (eldonkvanto 1,200.000 ekz).

Supre de la zamenhofa portreto estis presitaj la esperantlingvaj vortoj "Ni deziras interkomunikiĝi ĉiam, ĉie, kun ĉiuj kaj japanlingve "al nia kamarado Zamenhof". Kelklinia klarigo pri Esperanto, kun la fonto (Japana E-Instituto) ankaŭ vidiĝis en la reklamo. Aliaj frazoj diris: "ni NEC provas realigi tiun revon (de Zamenhof) per nova tekniko . . ."

Laŭ konfidenca informo tia tutpaĝa reklamo kostis por la unua ĵurnalo 15.000.000 japanajn enojn (proks. \$88.200) kaj por la dua 12.000.000 proks. \$70.500)

La 34-a kongreso de Kanto-Ligo (de la tokia regiono) okazis de 19-a ĝis 21-a de julio en la urbo Mito. Sesdek ses personoj aliĝis. La ĉefa temo estis rimedoj kiel disvastigi Esperanton en la tokia regiono.

Prof. Y. Mizuno raportis pri sia "Vojaĝo tra Eŭropo", dum kiu li, en 330 tagoj vizitis 28 landojn kaj ĉeestis en proks. 50 kunvenoj. Esperanto ebligis al li sperti multon, kio per la angla lingvo restus nekonsata al li. "Astronomio en malgrandaj landoj" estis la temo de S-ro T. Hirayama. Nuntempe por astronomiaj observadoj oni bezonas grandegajn aparatojn (teleskopojn, raketojn, satelitojn), kaj oni bezonas grandajn financajn subtenojn. Riĉaj landoj, kiel Usono, akiras la plej grandajn rikoltojn. Sed malgrandaj landoj ankaŭ havas siajn astronomiajn tradiciojn kaj kontribuadas per unikaj studoj, kiel ekzemple la observatorio de Krakovo.

Eldoniĝis "Fundamenta Vortaro Naŭlingva" vivverko de 72-jara veterano S-ro M. Hukuta. Temas pri granda leksikono, kiu enhavas ĉ. dekmil esperantajn kapvortojn kaj iliajn tradukojn en 8 naciaj lingvoj.

Pri la eldoniĝo de la vortaro raportis la plej granda ĵurnalo "Asahi Sinbun" (kun la telefonnumero de la eldoninto). La aŭtoro estis vere surprizita kiam li ricevis post kelkaj tagoj plurajn mendojn por sia verko.

La Tokai E-Ligo havis sian 34-an kongreson en la urbo Toyohasi. Oni preparolis la neceson revigligi la movadon en la regiono.

S-ro Z. Takenaka raportis pri sia vojaĝo al Ĉinio laŭ invito de "El Popola Ĉinio". S-ro Y. Nagase, kune kun s-ro Takenaka, prelegis pri la ĉina Esperanto-movado en komparo kun la japana kaj emfazis la neceson utiligi la unuan ciel instigilon por plifortigi la lastan.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: S-ro Mac LeFevre, 231 St. John Street, Launceston, Tas., 7250.

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 228 (308)

MELBURNO

Novembro, 1985

INTERNACIA JARO DE PACO

Registara Deklaro en Esperanto

Por la unua fojo la Departemento pri Eksterlandaj Aferoj eldonis Registarajn Deklaron en la Internacia Lingvo Esperanto "Atomoj por Paco", parolado de la Ministro Bill Hayden.

Kiam la Aŭstralia Esperanto-Asocio sendis al la Ministro pri Eksterlandaj Aferoj kopiojn de la rezolucioj akceptitaj de la Universala Kongreso de Esperanto en Augsburg, kaj raporton pri la preparoj por la 25-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, okazonta en Perto en januaro, 1986, ĝi sugestis, ke la Departemento publikigu unu aŭ pli da deklaroj de la Aŭstralia Registaro pri internaciaj aferoj, malarmado kaj paco. Ni atentigis, ke aliaj registaroj sendis siajn deklarojn al la Aŭstralia Esperanto-Asocio en la internacia lingvo dum multaj jaroj.



R. L. HARRY,
A.C., C.B.E.

La Departemento proponis por tradukado la paroladon de la Ministro pri Eksterlandaj Aferoj, S-ro Bill Hayden, je 29-a de aŭgusto ĉe la Konferenco por la Revizio de la Traktato pri dismultigo (de nukleaj armiloj) en Genevo.

La traduko estis senprokraste farita de S-ro Ralph Harry, A.C., C.B.E., antaŭa Aŭstralia Ambasadoro, kiu gvidis la Aŭstralian Delegitaron al la 1-a Speciala Sesio pri Malarmado de la Ĝenerala Asembleo de la Unuigintaj Nacioj en 1978.

La Departemento presis 200 ekzemplerojn de la parolado en formo de libreto sub la titolo "Atomoj por Paco". Ĉiu partoprenonto en la 25-a Kongreso ricevos ekzempleron, same kiel ĉiuj naciaj Esperanto-Asocioj.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio petis la Departementon provizi por la Kongreso, kiel parton de la Internacia Jaro por la Paco, ekzemplerojn de la Ĉarto de la Unuigintaj Nacioj, unue publikigita en Esperanto fare de la Asocio por la Unuigintaj Nacioj en Kanbero, kaj de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj, ankaŭ unue tradukita de S-ro Harry. La kontribuo de la U.N.A.A. por la disvastigo de la Ĉarto en Esperanto estis rememorigita ĉe bankedo en Kanbero je la okazo de la 40-a datreveno.

La elekto de la dek plej belaj vortoj en Esperanto per la asociado de ideoj

Bernard Golden

Enketo organizita de Jorge Camacho (Madrid) per cirkuler-leteroj senditaj al eminentaj esperantistoj celis malkovri la dek plej belajn vortojn en Esperanto. En sia cirkulero, S-ro Camacho mencias esploron entreprenitan de gazeto en Ĉilio por trovi la dek plej belajn vortojn en la hispana lingvo. Laŭ mia scio almenaŭ unu alia esperantisto jam kompilis similan liston. En artikolo aperinta en **Hungara Vivo** (1970/1, p.21) Kolomano Kalocsay elektis jenajn vortojn:

balzamo, ĉarma, lamento, lampro, larmo, luli, mielo, svelta veluro, vualo.

Li aldonis ankoraŭ unu liston konstantan nur el neologismoj, por montri, ke ankaŭ ili povas esti belaj:

delico, filandro, friska, kantileno, lanta, linda, lirli lontana, suspiro, svaga.

Kalocsay ne profunde analizis sian elekton de ĝuste tiuj du aroj da dek vortoj, sed konfesis, ke vortsenco influis lin.

Por plenumi la peton de S-ro Camacho, mi faris jenan liston de dek vortoj:

revi, aŭroro, krepusko, lumo, lazura, kalma, mola, tenera, lariko, alko.

Miaj kriterioj baziĝas sur tri faktoroj: la sono, la signifo kaj la asociado de ideoj. Por eviti influon de vortoj en aliaj kompilaĵoj, mi ne havis antaŭ la okuloj la jam publikigitajn dekojn da vortop. Plej gravis, do, la libera asociado de ideoj, kiuj sekvis en natura maniero dum tempodaŭro de malpli ol kvaronhoro.

Tiu procedo ne estas cerbume objektiva, sed sugeste subjektiva. Eĉ dum reviziado de la vortlisto post kelkaj tagoj, mi ne havis emon modifi ĝin.

Okulfrape laŭ fonetika vidpunkto estas la abundo de la likvidaj konsonantoj "l" kaj "r"; unu el ili troviĝas en ĉiu vorto kaj po du en tri vortoj. Kontribuas al la eŭfonio de la vortoj ankaŭ la oftaj sonoraj nazalaj konsonantoj "m" kaj "n" kaj la vokalo "a". Oni povas rimarki la samajn trajtojn en la vortlistoj de Kalocsay. Alia fonetika fenomeno, kiu faras la vortojn agrable oreliklaj, estas la sinsekva alternado de konsonantoj kaj vokaloj, formante t.n. malfermajn silabojn. En mia deko da vortoj troviĝas nur kvar konsonant-grupiĝoj, dum en la du listoj de Kalocsay enestas sep kaj dek grupiĝoj respektive, kaj tio malpligrandigas la muzikan efekton.

La asociado de ideoj en miaj dek vortoj jen estas evidenta, jen efikas subtile, sed ĝi ĉiuokaze estas sentebla al mi. Ĉiu vorto elvokas semantike agrablajn konceptojn aŭ plaĉajn bildojn, kiuj harmonias kun la belsoneco de la vortoj mem. Jen mia provo asocii en unu kunliga ĉeno ĉiujn dek vortojn:

Revi . . . revado dum aŭroro kaj
krepusko . . . lumo el la ĉielo . . .
ĉielo lazura . . . lazura maro . . .
maro kalma . . . kalma akvo . . .
akvo . . . mola . . . mola sento . . .
sento tenera . . . al Lariko kaj Alko.

(la lastaj 2 vortoj estas la Esperantaj vokonomoj de miaj du filetoj).

Mi ne opinias, ke tiuj dek vortoj estas **absolute** la plej belaj en Esperanto. Aliokaze, estante en alia humoro, mi certe elektus malsamajn dek vortojn surbaze de tute alia asociado de ideoj. Tamen, mi opinias, ke superreganta estas la fonetika fenomeno karakterizita per ofteco de likvidaj kaj nazalaj konsonantoj kaj la vokalo "a".

Post verkado de la unua versio de tiu ĉi artikolo, estis publikigita mallonga informo pri la rezultoj de la enketo de s-ro Camacho (Heroldo de Esperanto, 1983, n-ro 14, p. 3). El la 65 personoj, kiuj ricevis la enketilon, 22 respondis per malsimilaj listoj kaj diversaj kialoj pravigantaj sian elekton. Laŭ ofteco la dek plej belaj vortoj estas:

amo, amiko, espero, esperanto, bela, laboro, paco, lazura sopiro, patrino.

Likvidoj, nazaloj kaj la vokalo "a" karakterizas ankaŭ tiun ĉi liston, kaj tio konfirmas mian hipotezon pri eŭfoniaj sonoj. Cetere, troviĝas nur kvar konsonantgrupigoj. Laŭ semantika vidpunkto ĉiu vorto havas pozitivan aŭ favoran signifon.

La 2-a Internacia Metodika Seminario de Esperanto

Okazis de la 10a ĝis 14a de aprilo, 1985, en Varsovio, Pollando, La temoj de la seminario organizita de la pedagogia komisiono de Po'la E-Asocio, kunlaboro kun U.E.A. kaj I.L.E.I., estis variaj, sed ĉiuj rilatis al la instruado de Esperanto.

De **D-ro Szerdahelyi** (kiu ne ĉeestis sed sendis referaron) kaj **S-ino Zsuzsa Barcsay** (Hungario), ni eksciis pri la spertoj en hungaraj lernejoj dum la pasintaj 10 jaroj. Tre interesa prelego de **D-ro Jerzy Leyk**, prezidanto de P.E.A., pri la statuso de la Esperantaj didaktiko kaj edukado, vokis al realisma takso de tio, kion ni povas oferti al homoj, kiujn ni provas persvadi al lernado de Esperanto kaj al realisma konstato de la celoj de Esperanto-instruado. El siaj esploroj li venis al la konkludo, ke Esperanto N.E. estas devige instruebla, kaj avertis tre serioze, ke ni devas N.E.

promesi nenulumeblaĵojn nur por kapti la intereson de la homoj.

D-ro Ejsmont (Pollando) parolis pri la rolo de lernado de fremdaj lingvoj, inkluzive de Esperanto, ĉe la disvolvigo de la homa personeco. S-ro Rokicki (Pollando) parolis pri lingvo-instruado kaj lingvo-planado, kaj D-ro Til Dahlenburg (G.D.R.) parolis pri "La konsidero de la gepatra lingvo dum la instruado de Esperanto" kun speciala rilato al la germana kaj rusa lingvoj. El siaj esploroj D-ro Dahlenburg konkludis, ke, ĉar ĉiu etna lingvo havas propran gramatikon, konceptan, semantikan metodon, internacia lernolibro ne povas ekzisti sen aldonaj klarigoj en la nacia lingvo. Li plue konkludis, ke Esperanto estu instruata en lernejoj ne propedeŭtike, sed nur post kiam la lernejanaj jam studis etnan lingvon.

Mia sinteno, detaligita en mia prelego pri "Problemoj de internacilingva lernolibro por meminstruantaj komen-cantoj", tute kontraŭas tiun de D-ro Dahlenburg, sed ĉar nek li nek mi emas devigi aliajn sekvi sole niajn respektivajn vojojn, ni restas geamikoj.

Krom prelegi, aŭskulti prelegojn kaj partopreni en diskutoj, kelkaj el ni serioze ekzamenis projekton de **mag. Irena Szanser**, faritan en ŝia rolo de membro de la pedagogia komisiono de U.E.A., por programo por pedagogia-metodika kurso por kandidataj Esperanto-geinstruistoj. Esperindas, ke U.E.A. iam publikigos kaj rekomendos por la trejnado de E-geinstruistoj, plenan programon bazitan sur ĉi tiu projekto de mag. Szanser. Estas tamen konate, ke la mueliloj de U.E.A. muelas eksterordinare malrapide. Laŭ mia ĵusa sperto, esperantistoj de la t.n. "orienta bloko" estas tre iniciatemaj kaj agemaj. Se ni t.n. "okcidentanoj" ne dekomence kunlaboras per aktiva kontribuado de ideoj, k.s., la fina produkto riskas esti tre intime ligita kun la edukaj sistemoj de unu speco de landoj. Pedagogiaj seminarioj, laŭ la projektita programo de Irena Szanser jam okazadas en Pollando kaj rikoltas rimarkindan sukceson. Dum la Metodika Seminario unu el la pedagogiaj lernantinoj prezentis, kiel eron de ŝia ekzameno, demonstracian lecionon. Profesie ŝi estas ne pedagogo, sed ekonomiisto, sed ŝia leciono, rezulte

de ŝiaj studoj en la pedagogia kurso, estis tute profesinivela.

La 3-a en la serio de Int. Metodikaj Seminarioj okazos decembre en Bad Sarow (G.D.R.). La tekstoj de la prelegoj donitaj dum la unua I.M.S. jam e'donigis libroforme, kaj same estas planite por la prelegoj de la 2-a seminario.

—AUDREY CHILDS-MEE,
Rotterdam

LA 58-a SAT — KONGRESO

Okazis inter la 27-a de julio kaj la 3-a de aŭgusto en la nederlanda urbo Amersfoort.

La ĉ. 200 partoprenantoj el 15 landoj ĝuis restadon en moderna hotelo ekster la urbo, en bela natura ĉirkaŭajo.

Ĉe la malfermo reprezentanto de la Socialista Partio de Nederlando salutis la kongreson kaj esprimis la bedaŭron, ke Esperanto ne estas sufiĉe agnoskata en la partio. S-ro Gregoire Maertens, U.E.A.-prezidanto, salutis la kongreson, kune kun S-ro Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de la Ĉina E-Ligo. Ceestis ankaŭ D-rino Flora Szabo-Felso, ĝenerala sekretario de U.E.A.

La ĉeftemo de la kongreso estis "Laboro — ĉu puno aŭ beno?". Okazis 6 diversaj prezentoj de la temo, post kiuj sekvis la "Forumo" pri la sama temo. La kongreso estis bone organizita kaj la programo tiel densa, ke eĉ mankis tempo por libere promeni aŭ skribi poŝtkartojn.

Oni decidis organizi la 59-an kongreson en Sant Cugat des Valles (apud Barcelono, Hispanio), kaj la 60-an principe en Krakovo (Pollando) okaze de la centjariĝo de Esperanto en 1987.

Lola rakontas al sia amikino: "Ho, kiel mi devis kuri hieraŭ, kiam knabo volis min kisi!".

"Nu, kaj ĉu vi fine sukcesis atingi lin?"

(Hung. Vivo)



• **PERTO:** Je 9-a de oktobro D-ro Einihovici prelegis pri Leo Tolstoj, rusa verkisto (1828-1910), kiu subtenis Esperanton kaj el kies verkaro oni plej multe tradukis dum la unuaj tempoj.

En la junulara gastejo en Mundaring okazis, 12-an kaj 13-an de oktobro, semajnfina renkontiĝo. Ma'feliĉe nur 12 membroj partoprenis, sed tiuj kiuj venis ĝuis bonan programon, estritan de Gordon Gregson. Olive Russell faris interesan lumbildprelegon pri Ĉinio. Ni havis la oportunojn vagi tra la belega arbaro, kaj Shirley Gradussov patrinece zorgis pri niaj kulinarij bezonoj.

• **ADELAJDO:** Post longa paŭzo okazis, 17-an de septembro, denove kunveno, en la hejmo de Ges-roj Felby, por revivigi la Esperanto-movadon en Suda Aŭstralio. Estis decidite ke okazu minimume 6 vesperaj kunvenoj jare. Krome okazu ankaŭ 6 tagaj kunvenoj.

Je 22-a de oktobro okazis kunveno en la hejmo de George Clarke. Ni provis solvi krucvortenigmon el numero O de la nova "Gazeto".

Je 12-a de novembro okazis la Ĝenerala Kunveno, en la hejmo de la Kvakeroj en Norda Adelajdo. Oni elektis novan estraron: Prezidanto Petro Ellyard, Vic-Prezidanto Bob Felby, Sekretario Lloyd Noble, Kasisto George Clarke, Libro-peranto Audrey Felby, Kunordiganto Max Wearing, Bibliotekisto Charles Stevenson, Komitatanoj Jo Mountwinter, Harry Elven kaj Clotilde Clarke.

La 14-an de novembro ni estis invititaj paroli pri Esperanto al grupo "Pensiuloj por Internacia Paco". Ni sukcesis konvinki la grupon pri la neceso uzi Esperanton por la paco.

—BOB FELBY.

◦ **MELBURNO:** Speciala kunveno okazis en la Esperanto-Domo je la 4-a de novembro. Post la kutimaj klasoj okazis, inter la 7-a kaj 8-a, vendado de libroj alportitaj de Harry Beechey, kiu ankaŭ deĵoris kiel vendisto. Poste, je la 8.15-a, Marcelo Leereveld parolis pri lastatempa vizito al Javo (Indonezio) kaj montris interesajn diapozitivajn, ĉefe eksterurbajn, pri la popolo, la farmbienoj, agrikulturaj metodoj, kampoj kaj kreskaĵoj. Inter la lastaj tre atentokantaj estis diversaj tropikaj plantoj kun gigantaj floroj. Sekvis abunda vespermanĝeto. Inter la ĉeestantoj troviĝis gastoj el la Oakleigh-kaj Waverley-grupoj, kiuj kuraĝe spitis la pezan pluvon kaj fulmotondron.

◦ **SIDNEJO:** Laŭ la programo de la 21-a de oktobro, J. Harwood anoncis prezenton de "T.B.A.". Ni, kiuj parolas angle, ja konas la mallongigon, kiu signifas "To Be Advised" (avizota). Laŭ J. Harwood, kiam oni nomas ion "arangota", kaj fakte prezentas ĝin, ĉu ĝi tuj igas "arangata" aŭ eĉ "arangita"? Vere, lia parolado estis vortludo tre lerte elpensita.

Je 28/10 okazis la kutima legado el eksterlandaj gazetoj. Semajnon poste Kitty Gassner parolis pri sia vizito al Germanio antaŭ kaj post la Augsburga kongreso, kaj ŝi montris belajn lumbildojn.

Je 11-a de novembro Tom Elliott demandis "Esperantujo, kien vi vagas?". Lia intereso pri Esperanto komenciĝis kiam li estis 18 jara, sed li povis viziti E-klubon nur post pliaj 18 jaroj. Tiam la grupo estis multe pli granda ol nun. Dum la sekvintaj jaroj, li rimarkis, ke grupoj venas, burĝonas kaj preskaŭ malaperas tra la tuta lando, kaj kiam unu forvelkas, alia aperas.

—M. CHALDECOTT.

◦ **BRISBANO:** La Jarkunveno okazis la 28-an de oktobro kaj la jena estraro elektigis: Prezidanto: T. Steele; Vic-Prezidantoj: R. Ross, T. O'Grady; Sekretario: Cathy Sullivan; Kasisto: J. Carroll; Libro-Peranto: S-ino L. Newman; Bibliotekistoj: S-inoj A. Spencer, R. Morrison; Publikaj Rilatoj: M. Schramm. Bondezirojn al samideanoj por Kristnasko kaj Novjaro.

—RAY ROSS.

◦ **MANLY:** La 12-an de oktobro Les kaj Bess Scott denove gastigis nin en sia hejmo por montri al ni lumbildojn pri sia ĉi-jara vizito al la Universala Kongreso.

Ĉi tiun fojon Les gvidis nin per belaj bildoj kaj ege interesa komentario tra la kongreso kaj vidindaĵoj de Augsburg, la antaŭ kaj post-kongresaj ekskursoj en Orienta kaj Okcidenta Germanio kaj vizito survoje hejmen al Hong Kong. Dudek ses personoj ĉe-estis.

Ni ĝojis denove havi inter ni nian sekretarion Betty Cleminson, kiu resaniĝis post operacio je la genuo. Poste Marjorie Duncan dankis la gastigantojn kaj gratulis Les pro lia nova posteno kiel U.E.A.-Komitatano por Aŭstralio. Sekvis vespermanĝeto kaj vigla babilado, dum kiu nia "ĉiamverda" Peg Ford-Lewis informis nin, ke ŝi planas viziton al Bathurst la venontan jaron por vidi por la dua fojo la Kometon 'Halley'.

—EUNICE GRAHAM.

EL LA FEDERACIOJ

◦ **KVINSLANDO:** Plensukcesa konferenco okazis ĉe "Broadbeach International", sur la Ormarbordo, la 5-6an de oktobro. Entute 36 ĉeestis, plejparte el Brisbano, St. Lucia kaj Toowoomba, tamen estis plezuro bonvenigi Ann Gash, Cliff Tronerud, Kevin O'Brien kaj Jeff Bell, el aliaj lokoj.

Dum la ĝenerala kunveno, anoj silente staris, memore al tri anoj kiuj forpasis de post la lasta konferenco: Yvonne Rayner, Norman Collier kaj Edna Mathers. Estis decidite, ke la 31-a konferenco okazu en Toowoomba kaj ke alia pikniko okazu ĉe Lowood. Klubraportis: St. Lucia (Annie Spencer), Brisbano (Tom O'Grady), Toowoomba (Jean Lehane), Rockhampton/Emu Park (Joyce Turner, per telefono).

Elektigis nova estraro por 1986: Prez. R. Ross; Vic-Prez. T. O'Grady; Sekretario. Kay Andersen; 2-a Sekr. Gaye Phillips Kasisto Nan McGuckin; Helpkas. Jack Carroll; Publikaj Rilatoj P. Keates; Komitatanoj: Joyce Turner, J. Moore, Jim Dimo, Annie Spencer, Doris Sinclair, Sybil Martin, K. O'Brien, Sandra Connors; Redaktoro "La Voĉo" R. Ross.

Prezidanto Ray Ross raportis pri la jara agado kaj dankis al ĉiuj, kiuj iel helpis dum la jaro, kun specialaj dankoj al sekretario Decia Shonhan kaj kasisto Nan McGuckin. Estas nuntempe 120 anoj en la Federacio, el ĉiuj grupoj en la ŝtato. La kasista raporto montras kontentigan saldon.

Kunveno, vespermanĝo kaj distraĵo okazis sabate en speciala aparta kun-

venejo en la hotelo kaj dimanĉe anoj kune piknikis en belega parko "Cascades". Inter la multaj kontribuantoj elstaris Ges-roj C. Bailey, kiuj prelegis per lumbildoj pri vizito al Ĉinio.

Propagandon gajnis la konferenco kiam raportisto/fotisto de la tagjurnalo "Bulletin" intervjuis Ray Ross. Oni atendas plenraporton pri la konferenco kun artikolo pri la celoj de Esperanto.

—RAY ROSS.

• **NOVA SUD-KIMRUJO:** La Federacio havis tre sukcesan jaron. Ĝi enspezis \$10381 kaj elspezis \$5917, do la profito estis \$4464. Oni elektis 8 direktorojn, ili estas: Betty Cleminson, Eve Matasin (Kasistino), Margaret Chaldecott (Sekretariino), Sylvia Burkitt, Volo Gueltling Harry Peddie, Roger Springer, Rene Asselin. Redaktoro de "Telopeo": Joan Green.

• **VIKTORIO:** La ĉiujara, tuttaga Seminario de la Federacio okazis la 7-an de septembro en la domo de la Kvakeroj. Ĉeestis 22 Melburnanoj kaj S-ro Ted O'Brien de la Geelong-Grupo.

La varia programo inkludis 2 lingvajn sesiojn, gviditajn de Fay Koppel, kaj aron da paroladetoj. S-ino Ruth Tумman priskribis la italan urbon San Gimignano, Ann Hearn "Miss Pink, Enigmo", Val Fotheringham pri "Artefarita Lingvo", Margaret Miller "La nokto kiam pluvigis", Gerald Tумman raportis pri Esperanto-Ekspozicio en la kadro de la "Festiva'lo de Scienco". Isabel Gale priskribis sian partoprenon en Esperanto-kunveno en Londono kaj Tel-Aviv. Aliaj eroj estas kantado kaj poemoj de la Waverley-Grupo kaj amuzaj skeĉoj de ses-roj Pescod.

25th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

4-11 Jan., 1986 — Perth, W.A.

This congress will be held at St. Catherine's College, one of the residential colleges adjacent to the beautiful University of W.A.

Early enrolment will secure your accommodation.

Congress Fee: \$35. Pensioners/Full-time student \$30.

Mail your Congress Fee to the Treasurer, **Mr. O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6012.** If you wish to stay at the College add \$10 for Room Deposit. Please make cheques payable to "Australian Esperanto Congress" and add 12 cents for bank charges.

Eighth List of Enrolments:

108. Ruth Morrison, Brisbane
109. Graham Bell, Perth
110. Bob Felby, Adelaide
111. Eileen Oliver, Orelia, W.A.
112. Arthur Oliver, Orelia, W.A.
113. Kitty Gassner, Sydney
State Distribution: W.A. 45; N.S.W. 33; Q'ld. 15; Vic. 12; A.C.T. 4; S.A. 2; Tas. 2.

LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1985

Antaŭe raportita	\$604
Dr. J. L. F. Somogyi, Port Hedland, W.A. — 2-a Donaco	50
Joyce Turner, Rockhampton, Q. ...	20
S-ino M. Eden, Ravenshoe, Q.	5
"Amanto"	10
S-ro T. Steele, Brisbane	5
S-ro C. Dean, Perth (2-a Donaco) ...	10
	<hr/>
	\$704

Peto al Esperantistoj, kiuj estas Adventistoj: Post la 70-a Kongreso en Augsburg, S-roj K. P. Hoff (Norvegio) kaj P. Sikora (Germanio) interparolis kaj eksciis, ke ili ambaŭ estas Adventistoj. K. P. Hoff antaŭe skribis al mi por eltrovi ĉu estas Adventistoj en Aŭstralio. Ĉu estas? Se jes, bv. skribu al S-ino M. Chaldecott, 16 Grosvenor Rd., Lindfield, 2070. K. P. Hoff volas eldoni adventistan revuon.

LETEROJ AL LA REDAKCIO

Mi estas nova esperantisto kaj ŝatas la lingvon, kaj la geamikojn, kiujn mi renkontis, do mi iomete hezitas esti kritikema. Tamen, estas afero, pri kiu mi sentas, ke mi devas skribi.

En la septembra eldono de "A.E." estas longa artikolo skribita angle. Mi ne kritikis la artikolon; male, mi pensas ke Ralph Harry verkis tre pripensindan artikolon. Sed mi estas kritikema, ke la artikolo eldoniĝis angle. Ni pretendas esti parto de la internacia Esperanto-komunumo, kiu inkludas multe da homoj, kiuj N.E. parolas angle. Plue, mi asertas, ke per Esperanto la tuta mondo povas interkomuniki. Ni neniam konvinkos aliajn, se ili rimarkas, ke ni devas rizi alian lingvon en niaj **propraj gazetoj.**

Do, mi petas, ke ni uzu la anglan nur kiam ni devos, pro legaj aŭ aliaj fortaj kialoj.

D-ro JOHN MILLS,
Brentwood, Okc. Aŭstr.

Eldoni Esperanto-gazeton en lando kie oni parolas angle, neniam estis facile, sed malgraŭ la malfacilo vi sukcesis eldoni tre bonan gazeton. Mi deziras al vi sukceson dum la venontaj jaroj.

D-ro J. L. F. SOMOGYI,
Port Hedland.

Mi volas fari kelkajn komentojn pri artikolo de Ralph Harry en la septembra n-ro de "A.E.", kie ni legas, ke la Perta kongreso, kiu traktos la kontribuon de Esperanto al mondpaco, konformos al la neŭtraleca regulo de nia statuto. Ankaŭ ni legas, ke A.E.A. ne rajtas sin ligi kun la pacmovado. Partopreni en marŝoj je Palmo-Dimancoj estas afero de individuaj membroj.

Mi opinias, ke la neŭtralec-klaŭzo en la A.E.A.-statuto fakte ne kovras laboradon por paco en senpolitika maniero, ekzemple marŝi en pac-marŝo kun afiŝoj, kiuj deklaras, ke 'Esperanto laboras por Paco'. Tia pac-agado N.E. estas parti-politika. Aliflanke, se ĉe nia kongreso ni diskutos "La Liberala Partio kaj Paco", aŭ marŝos kun afiŝoj, kiuj diras "For la Usonaj bazoj", tiuj agadoj ne estas neŭtralaj politike.

Pacaj afiŝoj povas esti neŭtralaj. Se niaj afiŝoj en pac-marŝoj estos neŭtralaj, ni N.E. rompos la A.E.A.-Statuton.

La Statuto ankaŭ diras, ke A.E.A. estas neŭtrala rilate al sociaj problemoj. Ĉu mondpaco estas socia problemoj? Mi opinias ke ne. Mondpaco estas tiel grava, ke ĝi transpasas specifajn sociajn problemojn. Mondpaco similas al mondmaltrato, al mondkatastrofoj ktp. Ĉu ni devas resti neŭtralaj ankaŭ en tiuj aferoj? Mi diras ke N.E.

Mi opinias, ke se la A.E.A.-Statuto malpermesas al ni labori por paco senpolitike, tiam ni devos ŝanĝi la Statuton.

—BILL CLARKE, Nedlands, W.A.

PACIFIKA MOZAIKO

La 72-a Japana Esperanto-Kongreso okazis en Yokohama de la 23-a ĝis la 24-a de aŭgusto, 1985, kaj estis vere memorda pro la fakto, ke la prefekto de la Kanagawa-distrikto, al kiu apart-

enas Yokohama, alparolis la kongresanojn per vere entuziasmaj vortoj.

Je 23/8 kongresanoj surŝipigis en la turisma ŝipo "Marine Shuttle" kaj ĝuis 90-minutan veturadon tra la mondfama haveno dum bela somera nokto.

Dum la solena malfermo la sekvontan tagon, Prefekto NAGASU Kazuzi salutis mallonge en sufiĉe bona Esperanto. Dairigante japanlingve li diris, ke oni ne devas lasi diplomation nur al ŝtatoj. Ankaŭ gravas rekta kontakto ĝis inter ordinaraĵ civitanoj. Li esprimis sian respekton al esperantistoj, kiuj fakte estas 'pioniroj' de tiu "interpola diplomatio". Li atentigis pri la minaco al la homaro per nukleaj armiloj kaj ke ĉiuj homoj estas sub la komuna sorto kaj ke nuklea malarmado kaj toleremo estas nun plej gravaj.

Inter la multaj salutantoj estis ankaŭ sonbenda mesaĝo de Radio Pekino. Okazis simpozio por la centjara jubileo, en kiu reprezentantoj de U.E.A., Japana E-Instituto kaj aliaj organizoj prezentis siajn jubileajn agadplanojn. Okazis dek fakkunsidoj, i.a. tiuj de komputistoj, sciencistoj, radio-amatoroj kaj S.A.T.-membroj.

Al la kongreso aliĝis 551 personoj, inter kiuj estis ankaŭ 24 Koreanoj kaj s-ro Ian Jackson, Prezidanto de T.E.J.O., kiu nuntempe loĝas en Honkongo.

Korea-Japana Seminario por Junuloj okazis en la urbo Iruma. La ĉeftemo estis: "Kiel koreanoj kaj japanoj scias, duonscias, ne scias aŭ misciĝas unuj la la aliajn". 103 junuloj partoprenis el kiuj 26 estis el Koreio.

En la **Nagoja E-Centro** nun okazas kurso pri la ĉina lingvo por tiuj Esperantistoj, kiuj deziras partopreni la venontjaran Universalan Kongreson en Pekino.

Novajoj el Nov-Zelando

● **AUCKLAND:** Troviĝas en nia urbo du apartaj grupoj — "La Auckland-Esperanto-Societo" kaj la "Internacilingva Societo". La Auckland-Societo kunvenas ĉiun mardon en la halo de la Societo de Amikoj. Audrey Wood estas la nuna prezidanto kaj mi mem la sekretario. Ni havas 26 membrojn kaj kutime ĉeestas la kunvenojn proks. 15, inkluzive de 2 junuloj. Ni aranĝis Libro-Vesperon en majo, kiam ni invitis gastojn kaj vendis librojn je la valoro de pli ol \$200.

La Internacilingva Societo estas grupo por tiuj, kiuj volas ekzerci sin en

la parolado. Estas 14 membroj kaj la grupo kunvenas je la unua jaŭdo de ĉiu monato en la hejmoj de la membroj, kiuj loĝas trans la haveno. Mi estas la prezidanto kaj Fred Wood la sekretario. La plimulto de la membroj estas ankaŭ membroj de la Aŭklanda Societo, sed aldone estas aliaj samideanoj, kiuj regule ĉeestas. Ĉiam estas programo, kiun membroj aranĝas laŭvice.

Regiona renkontiĝo okazis la 14-an de septembro. Estis belega tago kaj dudek ĉeestis, malpli ol kutime, sed la gripo grandparte respondedis. Vizitantoj venis el Hamilton, Te Avamutu kaj New Lynn. Interesa kaj ĝuinda programo de kantado, paroladoj teatraĵoj, humuraĵoj okazis kaj prezentado far Aŭkland-membroj de dramo "Patrino Amo", tradukita de nia prezidanto Audrey Wood.

En la posttagmezo, Fred Wood legis leteron ĵus alvenintan de la Fukuoka E-Societo, Japanio. Aŭkland lastatempe "ĝemeliĝis" kun tiu japana urbo. Post ĉefmanĝo en apuda restoracio, la esperantistoj revenis por spekti diapozitivon kaj aŭskulti paroladon pri Norfolk Insulo, kie Rita Aagaard antaŭ nelonge feris.

—RITA AAGAARD.

• **CHRISTCHURCH:** S-ro Des Langman prelegis pri Esperanto al la loka klubo de la societo "N.Z. Tecorians" en Hornby. Tiu societo, kiu havas 30 grupojn tra la lando, celas stimuli memfidon en parola komunikado kaj sociaj interrilatoj. La 20 ĉeestantoj aŭskultis la paroladon kun intereso. Probable aliaj lokaj grupoj de ĉi tiu societo bonvenigus parolanton.

• **WELLINGTON:** La Esperanto-Rondo de Wellington kunvenas ĉiun duan merkredon de la monato en la Kolegio de la Instruistoj. En septembro ĉiu ĉeestanto devis paroli pri temo kiu al li aŭ ŝi plej valoras. Don Rogers, la prezidanto de la N.Z. E-Asocio, parolis pri fonduso por aboni "Monato" por la loka biblioteko. Stephen Jones parolis pri la evoluo de la mondo, David Ryan "Mia E-vortaro", Gwenda Sutton pri "Kosto de vojaĝado", John Adcock pri "Komputoroj".

RECENZOJ

LA TAGO DE SENAERIĜO: Verkis IŬAKURA, Masaji. El la japana trad. NOMRA, Seĵro. Eldonita de Biblioteko Kolombo ĉe Tanaka Takajuki, 24 Simogawara Numazu 410, Japanio. Frezo 5 internaciaj respondkuponoj ĉe Seĵro Nomra, JOHANA 416, Tojama-ken. 86p. Ilustraĵoj de Joŝiko Ueda.

Ĉi tiuj ĉarmaj rakontoj pri la vivo de japana vilaĝo devas plaĉi al junuloj same kiel plenkreskuloj.

La aŭtoro aktive partoprenas en la movado kontraŭ nuklea armado. En siaj "vortoj" li substrekas, ke la grava danĝero, por kiu ni riskas la vivojn de la terглоbo kaj la homaro estas kaŭzita ne de natura fenomeno — ekzemple alproksimiĝo de la kometo Halley — sed de la volo de homoj mem.

La traduko de Seĵro NOMRA estas farita kun amo en bona simpla Esperanto.

—RALPH HARRY.

58-jara pensiulino el Ĉeĥoslovakio havas intereson trovi amikon en Aŭstralio. Ŝi povas korespondi en Esperanto, ĉeĥe aŭ iomete germane. Skribu al:

Ilona VENTUROVA
poŝt. prihr. 11 — Vitava
370 11 Ĉ. BUDEJOVICE
Ĉeĥoslovakia.

EL POPOLA ĈINIO: La 1986-a abonvarba kampanjo de EL POPOLA ĈINIO jam komenciĝas. Ek de la 1-a de nov. ĝis la 28-a de feb., 1986, tiu, kiu abonas aŭ reabonas en tiu periodo, senpage ricevos koloran Esperantan kalendaron por 1986.

Abontarifo: 1 jaro \$14.00, 2 jaroj \$24.00, 3 jaroj \$34.00. Sendu al J. M. Turner, 19 Wandal Road, Rockhampton, Q., 4700. Tiu, kiu varbas novan abanton ricevos ĉinstilan memorajon.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20
(Individual, Club & Federation)
Additional Family Member \$5
Pensioners & Full-time Students
pay a minimum of \$10.



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: S-ro Mac LeFevre, 231 St. John Street, Launceston, Tas., 7250.

Sekretario: S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

Kasisto: F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 229 (309)

MELBURNO

Decembro, 1985

NEW UNESCO RESOLUTION ON ESPERANTO

On 1 November the UNESCO General Conference meeting in Sofia adopted a resolution inviting member states to mark the centenary of the International Language Esperanto in 1987 by declarations, special-stamp issues or similar suitable arrangements. The Conference also invited member states to promote study programs on Esperanto in their schools and higher educational institutions.

The resolution, which was introduced by Yugoslavia and co-sponsored by Bulgaria, China, Hungary, Costa Rica, Poland and San Marino, was adopted by consensus.

In 1954 UNESCO General Conference meeting in Montevideo recognized that the achievements of Esperanto in the field of international intellectual exchange and mutual understanding of the peoples of the world coincided with the aims and ideals of UNESCO.

The General Conference noted that Esperanto had made considerable progress in the past thirty years as a means for the advancement of mutual understanding of peoples and cultures, penetrating into most regions of the world and most human activities.

The Conference recommended to non-governmental international organizations

that they join the celebration of the centenary of Esperanto.

The Australian Esperanto Association, and its affiliated societies in all states, have already begun preparations for the Centenary, including exhibitions, a national Congress and Summer School in the University of New England in January, 1987, and publications including a History of Esperanto in Australia and an Anthology of Australian Literature in the International Language.

La 23-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, Sofio, la 8-an de oktobro ĝis la 12-a de novembro 1985.

REZOLUCIPRONO

La Ĝenerala Konferenco.

Konsiderante, ke per rezolucio 1V-1-4-22 de sia 8-a sesio, adoptita la 10-an de decembro 1954 en Montevideo, la Ĝenerala Konferenco rekonis la kontribuon de la Internacia Lingvo Esperanto al la inernacia interkompreniĝo kaj ĝian kongruon kun la celoj kaj idealoj de UNESKO;

Agnoskante, ke depost tiam Esperanto faris konsiderindan progreson kiel rimedo por alproksimigi kaj interkomprenigi la popolojn kaj kulturojn de la diversaj landoj, enpenetrante preskaŭ ĉiujn lan-

dojn de la mondo kaj ĉiujn sferojn de la homa aktivado;

Atentigante pri la granda potencialo de Esperanto por edukado al internacia interkompreniĝo, edukado pri homaj rajtoj, kaj alproksimigo de homoj el ĉiuj landoj;

Notante la konsiderindan jaman kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de la Universala Esperanto-Asocio, al la disvastigo de informoj pri la laboro de UNESKO kaj al partopreno en tiu laboro;

Rekonante, ke en 1987 Esperanto festos la centjarigon de sia ekzisto,

1—**Gratulas** la Esperanto-movadon okaze de ties jubileo;

2—**Petas** la Ĝeneralan Direktoron plue sekvi la evoluon de la Lingvo Esperanto kiel interkomprenilo inter kulturoj kaj instrutemo en la lernejoj;

3—**Alvokas** la ŝtatoj-membrojn, ke ili marku la jubileon de Esperanto per taŭgaj enlandaj kaj eksterlandaj aranĝoj (deklaracioj, eldonado de poŝtmarkoj, ktp.), kaj ke ili antaŭenigu kaj ebligu la enkondukon de Esperanto kiel instrutemo en siaj lernejoj kaj institucioj de supera edukado;

4—**Rekomendas** al la neregistaraj organizoj ke ili kunlaboru en la festado de la jubileo de Esperanto, kaj ke ili konsideru la utiligon de Esperanto kiel ilo por disvastigi inter siaj membroj informojn pri UN-organizoj kaj precipe pri UNESKO.

ooOoo
ooOoo

KELKAJ ESPERANTAJ FONTOJ DE FLUGILAJ VORTOJ

Bernard Golden

Ralph Harry kaj Aŭstralia Esperanto-Asocio meritas gratulon pro la publikigo de unika kaj pionira speco de konsultlibro en Esperanto. **Vortoj kun Flugiloj (citaĵoj el la tuta mondo)**, eldonita en 1984, celas doni al la esperantistaro kolekton da citindaĵoj tradukitaj en Esperanton el diversaj etnolingvoj, kaj ankaŭ verkitaj originale en nia lingvo.

En la unua eldono de tiu ĉi verko troviĝas plejparte eldiroj de ne-esperantistoj, kiuj jam famiĝis tra la mondo aŭ en la originala formo aŭ en traduko. La kompilinto, Ralph Harry, prave substrekas en la "Enkonduko", ke estas bezonata ankaŭ citaĵaro el la originala literaturo de Esperanto. Enestas en la libro kelkaj tiaj citaĵoj: proverboj, kiujn esperantigis Zamenhof, Kalocsay, Waringhien kaj Stojan, kaj ankaŭ frazoj ĉerpitaj el verkoj de Zamenhof.

"Rilate aliajn esperantajn aŭtorojn", skribas Harry, "mi preferis atendi la planatan duan eldonon." Espereble tiu atendo ne estos tro longa. La inkludo de multaj originalaj Esperantaj flugilaj vortoj certe plivalorigos la kompilaĵon, ĉar ne ekzistas alia maniero rapide trovi ilin. Ekzemple, longe kaj vane mi serĉis la precizan formon kaj fonton de eldiro atribuita al Kabe, kiu konsilis al la esperantistoj lerni Esperanton! Mi listigu

kelkajn fontojn de sentencoj, aforismoj kaj epigramoj, kelkaj el kiuj estas originalaĵoj en la Esperanta literaturo, kvankam pli profunda esplorado eble malkovros, ke ili havas etnolingvajn ekvivalentojn.

En Lingvo kaj Vivo (1959) Gaston Waringhien verkis "Postludo", kiu konsistas el modela prezentado de etnolingvaj flugilaj vortoj, cititaj de li en la verko, kun traduko en Esperanton kaj ankaŭ tre utila klarigo pri ilia estigo kaj uzado. Ankaŭ originalaj eldiroj troviĝas en tiu libro. Mi neniam forgesos jenan frazon aperantan en kunteksto temanta pri la neeblo akordigi kontraŭajn opiniojn de planlingvistoj: "Lingvistojn, teologojn kaj krabojn neniam enmetu en la saman korbon (p. 361).

Riĉa minejo de spicaj parolturnoj estas la aŭtobiografia romano **Kredu min, Sinjorino (1950, 1974)** de Cezaro Rossetti. Preskaŭ ĉiu ĉapitro-titolo estas konata proverbo (Kiu sin enjungis, devas tiri) aŭ citaĵo el verko de Zamenhof (Konstante frapante . . .), sed jena plej verŝajne estis elpensita de la aŭtoro: "Vorto amema en buŝo blasfema." (p. 146).

Miaopinie trakribrado de la verkoj de Raymond Schwartz donos rikolton de

multenombraj flugantaj vortoj kaj esprimoj. La sekva filozofiaĵo venas el la romano **Kiel Akvo de P Rivero** (1963, 1977): "Ne estas la kulpo de ilia popolo, same kiel ne estas nia merito, se ni havas alian vidpunkton. Kio ni estas entute? Nur guteto da akvo en granda riverego. Neniu povas iri kontraŭ la fluado. Ni estas kuntirataj." (p. 340).

Du Esperantaj frazeologioj povas liveri multe da valora materialo en la formo de proverboj kaj familiaraĵoj, kvankam bedaŭrinde, la fontoj ne estas indikitaj. Unu estas **Kiel diri . . . ? — praktika Esperanta frazeologio** (1980), kompilita de Lentaigne. Tri ekzemploj de originalaĵoj estas jenaj:

- (a) Malsaĝa amiko estas pli danĝera ol malamiko (1:6)
- (b) Kiu min ne tuŝas, kuŝu kiel kuŝas (2:5)
- (c) Pli facile estas ordoni, ol oron doni (38:21).

Ralph Harry esperas, ke la dua eldono de **Vortoj kun Flugiloj** (mi preferas **Flugilaj Vortoj** kiel titolon) estos pli riĉa ankaŭ je citaĵoj el eksterŭropaj kulturoj. Kelkfoje oni povas trovi tiajn parolturnojn kaj proverbojn en originalaj verkoj en Esperanto, kies temoj estas ekzotaj. Mi pensas pri **Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud** (1963) de Jean Ribillard. El tiu biografio de nordafrika azeno mi ĉerpis jenajn saĝaĵojn pri la milito: ". . . la milito estas kronika malsano, kiu putrigas nian mondon . . . Kiu hieraŭ perdis, enspezos morgaŭ, same kiel en loterio. Pri tio la imperioj ne pli valoras ol la sablokasteloj, kiujn infanoj konstruas sur plaĝo: ili teniĝas firmaj nur inter du fuŝoj." (p. 87-88).

Mi esperas, ke per tiu ĉi modesta kontribuado de kelkaj citaĵoj, mi montris manieron trovi materialon por pliampleksigi la Esperantan enhavon de **Vortoj kun Flugiloj**.

ESPERANTO EN LA SOVET-UNIO

Nur malofte oni aŭdas ion pri la Esperanto-movado en la Sovet-Unio. Pro tio estis interese legi detalojn en la broŝuro "Kio estas USSR?". En la jaro 1979 fondiĝis la "Asocio de Sovetiaj Esperantistoj" (ASE). Dum 5 jaroj de la ekzisto de ASE aliĝintaj kluboj grandiĝis kelkoble. La plej grandaj kaj plej aktivaj troviĝas en Krasnodar, Krasnojarsk, Kujbiŝev, Leningrad, Moskvo, Samarkand kaj Vladivostok. Filioj de ASE ekzistas en Armenio, Estonio, Kartvelio, Latvio, Litovio kaj Ukraino. Ĉiujare okazas dekoj da tutlandaj kaj regionaj kunvenoj.

Sovetiaj esperantistoj, de tempo al tempo, partoprenis Universalajn Kongresojn kaj eksterlandaj esperantistoj vizitis la Sovet-Union. I.a. Gregoire Maertens, la UEA-prezidanto, vizitis en aprilo 1984 Moskvon. Surprizas eble la fakto, ke oni eldonis sufiĉe multe en kaj pri Esperanto. Oni reprenis, en endonkvanto de centm^l ekzempleroj, la Esperanto-Rusan vortaron, de D-ro Bokarev. La eldonejo "Nauka" publikigis la libron "Jazik Esperanto", verkita de M. I. Isajev, prezidanto de ASE. La Presaĝejo Novosti komencis eldoni soci-politikajn literaturaĵojn en Esperanto.

POUL THORSEN RAKONTAS

La redaktoro afable petis al mi rakonti, kiel mi fariĝis esperantisto kaj pri mia verkado.

Unue mi legis la vorton ESPERANTO en miniatura enciklopedio, kies felietonajn oktavojn mi tranĉis el semajna revuo por glui kiel primitiva libreto. Mi vivis en dana vilaĝo, kaj en la jaro 1930, tiam 15-jara, laŭ anonceto en junulgazeto mi komencis korespondkurson. La malfacilajn korelativojn kaj la plej fremdajn radikojn el la **Čeřeč-slosilo** mi parkerigis promene aŭ labore kun slipoj en poŝo por kontrolo.

Unuan fojon mi parolis — aŭ pli ĝuste ba:butis la lingvon nur post du jaroj, kiam en mia urbeto du t.n. "migradbirdoj" demandis al mi germane pri vojo al la stacidomo. Mi diris ĉu eble ili parolas Esperanton, kaj surprize unu flue respondis! Poste en Laborista Klubo Esperantista de Kopenhago, mi rapide evoluis en la buŝa praktikado.

El inter la Esperanto-libroj unue legitaj memore revenas Welzl: "30 Jarojn en la Ora Nordo" kaj Privat: "Esprimo de sentoj en Esperanto", du karakterizaj kategorioj por mia vivo entute.

Krom konstanta legado por izolulo kaj

aŭtodidakto ja korespondado fariĝas ĉio. Unua postkarto estas datita 24/2/1931 de japano. Poste sekvis plum-amikoj multnaciaj, kaj — nekredinde tiam — kelkajn mi vizitis dum 4-monata vagado tra dek landoj jam en 1936, kiam senlabora kaj sen difinita vivcelo.

Post instruista diploma 1942 mi profesii en Kopenhago pri dana lingvo, literaturo, geografio — krom pri Esperanto eksperimente kun oficiala permeso dum du jaroj en mezlernejo.

Organizis Geografian Semajnon en Odense 1962. Prelegis en Someraj Universitatoj dum UK en Zagerbo (1953) kaj en Kopenhago (1956). Gvidis Eldonejon KOKO 1954-62. Kunredaktis "Nordan Prismon" de 1957 ĝis ĝia ĉeso 1974. Deko da radioprelegoj dane kaj en Esperanto. Multvariaj kontribuoj — proze kaj poezie — en Esperanto-revuoj.

Mi vojaĝis krom en ĉiuj eŭropaj landoj, senescepte, tra ĉiuj kontinentoj. Deko da vojaĝoj estis stipendie subvencitaj. Unu (Italio 1951) celis studi lernejojn kun instruo de Esperanto. Ekzistas raportoj pri ĉiuj stipendiaj vojaĝoj kaj cetere en dana lingvo kvar suplementaj lernolibroj miaj por geografio kaj historio.

Verkoi:

Kun aliaj: Tra densa mallumo, 1943. Eta Krestomatio, 1944, Faktoj pri Danlando, 1948, kaj sola: Bibliografio pri dana literaturo, tradukita en Esperanton, 1952. Rozoj kaj Urtikoj, 1954. Kumbel Gruk (traduko), 1956. Pluk, miniaturoj, 1960. Sen Paraŝuto, 1963. DU EL (kun Marjorie Boulton), originala poemaro.

—POUL THORSEN.

ESPERANTO KAJ SCIENCO

La Kuratora Konsilistaro de Spiritisma Fondumo de Edukado Parano-Sankta Katarino starigis Centron por Scienca Kunlaborado pri Lingvistikaj Problemoj en la Sciencoj. Ĝi funkcias ĉe Fakultato de Homaj kaj Sociaj Sciencoj en Kuritibo, tio estas, en la Universitata Kampo Dr. Bezerra de Menezes. (Rua Tobias de Macedo Junior 333, 82000 Curitiba, PR, Brazilo.)

Prof. Wilson Ferreira Martins estis nomita direktoro de la Centro. Li klarigis: "La ĉefa celo de la Centro estas la enplanto de programo por praktika apliko de Esperanto, kiel scienca lingvo ankaŭ por la Kursoj de Socia Servo, kaj

ĉiel faciligi ĝian uzadon en la novaj kursoj de aliaj fakultatoj.

Inter aliaj iniciatoj jam programitaj els'aras la interŝango kun naciaj kaj allandaj institutoj, ĉiam en Esperanto.

(Laŭ "Spiritisma Esperanto-Infornilo", R'oo de Janeiro, Brazilo.)

25-a AŬSTRALIA ESPERANTO — KONGRESO 4-11 Jan., 1986 — Perto

Sendu lastmomentajn aliĝojn TUJ al **S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A. 6012.**

Kongres-kotizo \$35 (Pensiuloj \$30). Aldonu \$10 por rezervi ĉambrom.

Notu bone, ke la Bonveniga Vespero jam okazos je la **3-a de januaro**, do alvenu je tiu tago en Perto.

9-a Listo de Kongresanoj:

114. Andrew Goldie, Orange, N.S.K.
115. May Eatt, Perth
116. Patricia Somogyi, Port Hedland, O.A.
117. S-ro Holding, Perth
118. Stefanie Franconi, Perth
119. Glenda Farrell, Perth
120. David Youlson, Perth
121. Gladys Burmeister, Melbourne

Laŭŝtata statistiko: Okcidenta Aŭstralio 51, Nova Sud-Kimrujo 34, Kvinslando 15, Viktorio 13, Aŭstralia Ĉefurba Teritorio 4, Suda Aŭstralio 2, Tasmanio 2.

Dramo-konkurso: La Kanbera Esperanto-Klubo prezentos unuaktan dramon "La Vivo kun Olivia" aŭ "Modernaj Modoj". Ĉefrolas Ralph Harry kaj Marj Ellyard. Laŭ lastaj informoj, la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio, la nuna tenanto de la Dramo-Sildo, prezentos la teatraĵon "Do!ĉa Emilino". La Brisbana Esperanto-Societo prezentos dudek-minutan dramon "Honesteco estas la plej bona politiko". Sidnejanaj intencas prezenti la dramon "Kristnaska Donaco" de la aŭstria verkisto Arturo Schnitzler kaj tradukita de Prof. R. G. Robertson. Estas dupersona teatraĵo, kiu daŭras proksimume 20 minutojn. Aktoros Sylvia Burkitt kaj Prof. R. Robertson. Ni ankoraŭ esperas, ke Dr. Humphrey Tonkin, UEA-Vicprezidanto, partoprenos nian kongreson. Se li fakte venos, li estos unu el la juĝantoj de la Dramo-Konkurso.

Kant-Konkurso: Laŭ ĝisnune ricevitaj raportoj partoprenos kantgrupoj de la Brisbana Esperanto-Societo kaj de la Okcident-Aŭstralia Esperanto-Ligo. F-ino Isabel Gale (Melburno) konsentis agi kiel Ĉef-Juĝanto.

Sugestoj de A.E.A.-Prezidanto

Mac LeFevre

Mi deziras sugesti la sekvantajn tagordojn kaj samtempe petas fari komentojn por plibonigi tiujn sesiojn:

Inaŭguro (sabate): La parolontoj estu: La Prezidanto de la Okcident-Aŭstralia E-Ligo (s-ro Jack Hawks), la Prezidanto de A.E.A. (M. LeFevre), Konsilanto Stone, kiu oficiale malfermos la Kongreson. Salutoj de reprezentantoj el ĉiuj ŝtato kaj teritorio. Sekvos D-ro Humphrey Tonkin, UEA-Vicprezidanto, se li fakte povos veni.

Plena Kunveno pri la Pac-Temo (marde): S-ino Vera Payne, S-roj Ralph Harry kaj Trevor Steele raportos pri siaj respektivaj grup-kunvenoj. Sekvos diskuto inter la ĉeestantoj kun ebla provizora rezolucio.

A.E.A. Kunsido (merkredo): (1) Raportoj de la oficistoj, komisiitoj kaj de ŝtataj reprezentantoj; sekvos diskuto.

(2) Generalaj rezolucioj. Se eble informu la prezidanton aŭ sekretarion (S-inon M. Ellyard) pri viaj sugestoj.

A.E.A. Kunsido (ĵaŭde): Elekto de oficistoj kaj komisiitoj (bonvole rigardu paĝojn 4 kaj 5 en via Adresaro). Oni ne rajtas proponi kandidaton, kiu ne ĉeestas, sen ties skribita konsento. Elekto pri loko kaj dato de venonta kongreso. Formulo de rezolucio pri la Pactemo. Specialaj rezolucioj por la Registaro ktp.

Oficiala Fermo (sabate): Parolontoj: S-roj M. LeFevre, Ralph Harry, Ray Ross. Prezitado de la novaj oficistoj kaj komisiitoj. Transdono de la flago al la organizontoj de la venonta Kongreso. Oficiala Fermo.

Mi deziras emfazi, ke viaj opinioj kaj sugestoj estos ne nur bonvenaj, sed ege helpaj por plibonigi la devojn de nia Kongreso. Nome de la Estraro mi salutas vin kaj bonvenigas vian partoprenon en niaj konsideroj pri AEA-aferoj dum la kongreso.

—MAC LEFEVRE, Prezidanto.

ĈU VI DEZIRAS HELPI?

Aŭstraliaj Esperanto-Kongresoj jam fariĝis tiel ampleksaj, ke unu sola raportisto tute ne kapablas registri kaj

priskribi ĉiun kongreseventon kaj prelegon. Ni devas do trovi solvon al tiu problemo.

Kiu kongresano ŝatus helpi? Ni bezonas **raportistojn**, kiuj estas pretaj kroniki 2 aŭ 3 kongresarangojn en telegram-stilo. **Prelegontojn** ni petas doni al la Redaktoro aŭ resuman enhavon aŭ kopiojn de la prelego. **Estroj de fakkunsidoj** bonvolu transdoni raporteton pri viaj decidoj.

Ni scrĉas ankaŭ **fotografiston**, kiu estas preta fari 3-4 blanke-nigrajn fotografiajn poŝkart-formatajn, kaj transdoni ilin proksimume je la **10-a de januaro** al la Redaktoro. Tiujn fotografiojn ni uzos por "Australian Esperantist" kaj por raporto al "Heroldo de Esperanto".

Se vi deziras helpi, bonvole kontaktu min en la kongresejo je la **4-a de januaro**.

—HERBERT KOPPEL, Redaktoro.

Karaj Legantoj,

Mi petas vian pardonon, sed en la Prezlisto de Gazetabonoj kaj en la oktobra reklamo por 'El Popola Ĉinio' mi citis malĝustajn abonprezojn.

La ĝustaj abonprezoj ĝis 28-a de februaro, 1986 por 'El Popola Ĉinio' estas: **1 jaro \$14, 2 jaroj \$24, 3 jaroj \$34.** Sincere, Joyce Turner.



• **PERTO:** La 23-an de oktobro ĉeestis 15 membroj. D-ro Einihovici prelegis pri la verkstilo de Marjorie Boulton. D-ro Ellis gvidis demandaron pri diversaj temoj kaj Jack Hawke rakontis pri vizito al urbeto Esperance.

• **ADELAJDO:** Nia malgranda, sed fervora grupo kunvenis en la hejmo de ges-roj Felby, la 28-an de novembro. Estis konversacia vespero, dum kiu ni ankaŭ planis nian Zamenhofan Vesperon.

Nia membro Jo Mountwinter ĵus komencis Esperanto-kurson por Pensiulinioj. Ĝi okazas ĉiun duan ĵaŭdon en la t.n. "Box Factory".

• **KANBERO:** Dum la lastaj du monatoj Raipn Harry instruis grupon de Baha'ianoj, kiuj deziras lerni la lingvon laŭ rekomendo de liaj religiaj gvidantoj. Kvar el la grupo nun aliĝis al nia klubo kaj partoprenos la Zamenhofan Vesperon.

La klubo nun, sub la gvidado de Willie Firth, kaj per interkonsento kun Radio-Stacio 2XX, preparas serion de programoj por disaŭdigo en la nova jaro.

Willie Firth kaj Marj. Ellyard havis budon en la Komunuma Foiro trifoje en la lastaj monatoj, ĉe kiuj sufiĉe multaj personoj interesiĝis pri Esperanto.

M. ELLYARD.

• **SIDNEJO:** Je 18-a de novembro, David Gould prezentis tradukojn, kiujn li faris de la epigramoj, kiuj kutime aperas sur kalendaroj. Uni, tamen, estis malfacila — kiel traduki "Holidays put you in the pink and your bank account in the red." Tom Elliott sugestis: "Ferioj rugigas vin kaj vian sparkonton." (?)

Semajnon poste ni legis denove el eksterlandaj gazetoj. Margaret Chaldecott trovis interesan artikolon en "Monato" pri la fajrego ĉe la futbalejo en Bradford, kiu ne aperis en niaj ĵurnaloj — multaj hejpantoj de la viktimoj estis la ofte malamataj enmigrintoj al Azio.

La 2-an de decembro ni bonvenigis gastinon el Svedujo. S-ino Kristina Fossevall, el Malmoe, estis s-o esperantistino en grupo de 40 personoj, kiuj flugis tra Usono, Nov-Zelando al Melburno kaj de tie per aŭtobuso al Sidnejo. Ili daŭrigis sian vojaĝon hejmen tra Figio.

—M. CHALDECOTT.

• **MANLY:** La 19-an de novembro finiĝis la tria trimestro en la Eduka Centro. Je la 8-a horo la diversaj grupoj kunvenis kaj ĉiuj partoprenis en amuzaj skeĉoj, verkitaj de Helen Stone. La vespero finiĝis per kantado de popularaj kantoj.

La 26-an de novembro okazis aferkunveno en la hejmo de Marjorie Duncan. Oni voĉdonis sumon por reklamado por la venontjaraj kursoj, tagaj kaj vesperaj, en Manly kaj la ĉirkaŭaĵo.

—EUNICE GRAHAM.

• **EMU PARK:** La Esperanto-Klubo de la Kaprikorna Marbordo kunvenas ĉiusabate por konversacio kaj ofte por "Scrabble-ludo" en Esperanto. Kutime ĉeestas 8 personoj, el kiuj du venas el Rockhamptono. Ni kunvenas laŭvice en ĉies domo ĉe la marbordo.

Nia membro Merle Packham, kiu ĵus revenis de la 70-a Universala Kongreso en Augsburg, sukcesis pri ampleksa artikolo en la loka gazeto. Ŝi speciale menciis la paroladon de Humphrey Tonkin, kiu aperis en "Australian Esperantist" en oktobro, 1985.

• **ORA MARBORDO:** Tutpaĝa artikolo pri Esperanto aperis en "Gold Coast Bulletin", kiu estis la rezulto de intervjuo dum la federacia konferenco ĉe Broadbeach.

• **MELBURNO:** Ĉe la kunveno de la 2-a de decembro, la parolanto estis S-ro Marcelo Leereveld, kiu antaŭ ne longe vizitis Indonezion por partopreni seminarion pri lingvan. Tiun ĉeestis ĉefe instruistoj el Aŭstralio kaj Nov-Zelando. La titolo de la prelego estis: "Vojaĝo tra Centra Javo". Enkonduke s-ro Leereveld informis pri la popolo kaj ties religia sinteno. Ĉar necesas agnoski iun religion, la piumito priskribas sin islamanoj, kvankam nur partu vere vivas tiel. Minoriato estas hinduanoj. La plimulto el la junuloj parolas angle, la pli maljuna generacio komprenas la nederlandan.

Fine Marcel montris diapozitivon pri multaj islamaj tempoj kun gravuritaĵoj muroj, kaj verdaj pejzaĝoj kaj kelkaj strangaj bestoj, kiujn li vidis dum sia vagado antaŭ ol reveni hejmen. Sekvis luksa manĝeto, al kiu pluraj ĉeestantoj kontribuis. Dankon al ĉiuj.

La Zamenhofa Festo okazis je la 7-a de decembro en la halo de la Skoltinoj. Tridek personoj el ĉiuj 4 kluboj ĉeestis. La anoncisto de la vespero, s-ro Gerald Tumman, bonvenige salutis la ĉeestantojn. Rava muziko de Isabel Gale kaj kantoj de la Waverley-grupo sekvis. S-ino Ivy Fallu legis el la libro "Faktoj kaj Fantazioj" de Marjorie Boulton kaj F-ino Eva Trainor tradukis la tekston anglan por la vizitantoj kaj komencantoj. Tri komencantoj kaj ties instruisto (s-ro H. Koppel) legis poemojn.

Informplanan "Revuon 1985" donis Jack Fallu, pri la stato de la movado en Aŭstralio kaj transmare. Festparolis Marcel Leereveld, kiu post difino de du terminoj "Genio" kaj "Elito", kun emfazo pri la graveco de ambaŭ, aludis al la genieco de D-ro Zamenhof, kies geniaĵo Esperanto daŭre vivas kaj progresas pro la penado de la Esperantistoj, la fidela elito, kiu laboras por tiu idealo, tiel grava por la homaro. Sekvis la "Espero" kaj la kutima luksa manĝeto.

**Ĉi tiu NAŬA NUMERO por 1985 venas al vi pro
la malavaraj donacoj de 63 esperantistoj,
kiuj kontribuis al la
"Subten-Fonduso" de nia gazeto.**

• **BRISBANO:** Okazis la 7-an de decembro ĉe la halo St. Albans, Wilston, la 1985-a Zamenhofa Festo; entute 33 anoj partoprenis la feston kaj tre ĝuis ne nur la vespermanĝon sed ankaŭ la distraĵon, inkluzive de kantoj de la forgrupo, komunkantado, kaj dramo prezentita de la drama grupo. Klasoj en 1986 komenciĝos la 2-an de februaro, post la unua kunveno tiujare. Feliĉan Kristnaskon kaj bondezirojn por Novjaro al ĉiuj.

—RAY ROSS.

Interesiĝantoj pri sciencaj aspektoj de la Kooperativa Movado estas invitatoj skribi al "Central Cooperative Union", str. "G. Rakovski" 103, Sofia, Bulgario.

"The Australian Esperantist" estas unu el la Esperanto-revuoj, kiujn oni povas senhonte legi en trajno aŭ aviadilo — alogaspekta kaj interesenhava. Ĝi restu tia.

—AUDREY CHILDS-MEE,
Rotterdam.

**LA "A.E."
SUBTEN — FONDUSO
1985**

Antaŭe raportita	\$704
Dr. J. L. F. Somogyi, Port Hedland W.A. — 4-a Donaco	19
S-ino V. King, Melbourne	10
S-ro E. Sobolotzky, Melbourne	5
F-ino M. Warr, Melbourne	2
S-ino W. Greenhalgh, Brisbane	10
S-ro E. Bantick, Hobart	2
S-ro J. Moore, Emu Park, Q'ld.	5
S-ino G. Stower, Toowoomba	10

\$767

ERARETO

En la plej novan Librokatalogon (1986) de la A.E.A. Libroservo ensteliĝis malgranda eraro. Sur paĝo du ni povas legi: "The Australian Esperantist is published 8 times annually" . . . Fakte, jam deponat la pasintaj sep jaroj, nia organo aperis NAŬOJE jare. Tion ankaŭ raportas la 1984-a UEA-Jarlibro (paĝo 90).

RECENZOJ

EL POPOLA ĈINIO: La 1986-a abonvarba kampanjo de EL POPOLA ĈINIO jam komenciĝas. Ek de la 1-a de novembro la 28-a de februaro, 1986, tiu, kiu abonas aŭ reabonas en tiu periodo, senpage ricevos koloran Esperantan kalendaron por 1986.

Abontarifo: 1 jaro \$14.00, 2 jaroj \$24.00, 3 jaroj \$34.00. Sendu al **J. M. Turner, 19 Wandal Road, Rockhampton, Q., 4700.** Tiu, kiu verbas novan abonanton ricevos ĉinstilan memorajon.

S-ro Helmut Bein, Block 147-2, DDR 4090 HALLE-NEUSTADT (Germana Demokratia Respubliko), dez. interŝanĝi aŭstraliajn poŝtmarkojn (post 1980).

• **ESPERANTA ANTOLOGIO (POEMOJ 1887-1981)** Jubilea Kolekto "Jarcento de Esperanto" — N-ro 1, eldonita de Universala E-Asocio, 1984. 887 paĝoj, Formato 22 x 16 cm, Presita en Ĉina Popola Respubliko; fortike bindita kun ora surpriso. Prezo: A\$23.70, plus afranko de A.E.A. Book Service, P.O. Box 230, Matraville, NSW, 2036.

Jen monumenta verko, dua eldono, komplete reviziita kaj renovigita de William Auld, redaktoro ankaŭ de la unua eldono, kiu aperis en 1958 sub la fama libromarko STAFETO.

William Auld elektis pli ol 850 poemojn de 163 poetoj, ofte el revuoj

kaj libroj ne plu haveblaj kaj donas laŭtempe aranĝitan superrigardon pri la plej valora originala poezio en Esperanto ĝis 1981. William Auld mem verkis specialan postparolon pri la Esperanta poezia kulturo kaj aldonis biografiajn notojn pri la poetoj, kiuj kovras 36 paĝojn.

zEn sia enkonduko, William Auld i.a. diras:

Poetoj de l'futuro, feliĉaj heredontoj de hela versivero, jen estas viaj fontoj. Kiam adoro venos al via kor' jubili, memoru ĉi praulojn. Adoris ankaŭ ili.

Ĉi tiu prestiĝa verko estas la unua volumo en Jubilea Kolekto JARCENTO DE ESPERANTO. Tiu librokolekto, kiun U.E.A. eldonas, konsistas el verkoj, kiuj formas kulturalan fundamenton de la Internacia Lingvo. Verkoj aperontaj en tiu prestiĝa Kolekto estas "Nova Esperanta Krestomatio" (kun notaro reviziita de Gaston Waringhien), ĝisdatigita eldono de "Enciklopedio de Esperanto" (nun redaktata de Ulrich Lins) kaj Antologio de originala Esperanta prozo, redaktata de Reto Rossetti.

● **SENNACIECA REVUO:** Aperis la 1985-a jarkajero, kiu, same kiel ĝiaj antaŭuloj, enhavas tre multajn interesajn kontribuojn pri diversaj temoj.

Henk **Beijne** prezentas informriĉan artikolon pri la diversaj flankoj de la nederlanda vivo, kune kun 5 fotografaĵoj. Lilio **Grandiere** donas klarigojn pri rasismo. S. **Aarse** esploras la "Efikon de la Vorto". Bernard **Golden** prezentas la filozofion de Lewis Henry Morgan pri ties ideoj pri materialisma socialismo el usona vidpunkto. Ĉina laboristo priskribas sian mizeran vivon en ĉina malliberejo.

Interesa legaĵo sur 57 bele presitaj paĝoj. Havebla de la aŭstralia SAT-Peranto Volo Guelting, 9/45 Alt Street, Ashfield, NSW, 2131. Prezo: \$5.00 (plus afranko).

(La Pariza S.A.T.-oficejo sendis ĉi tiun libreton nur per mara poŝto kaj krome

la livero prokrastiĝis pro striko de havenlaboristoj.)

PARFUMA JAGUARO: Verkita de Teofilo Tortolero. El la hispana trad. Reynaldo Perez So, Adhely Rivero, antologisto. Direccion de Cultura, Gubernacion del Estado Carabobo, Venezuela. 45p. kun indekso.

La poemoj de Tortolero, 50-jaraĝa venezuelano, estas interesaj, kaj la traduko kompetenta. La originala hispana versio aperas paralele.

Nur bedaŭrinda estas la manko de esperantaj supersignoj en la presejo (Las Prensas Venezolanas de Editorial Arte, Caracas). Esperantisto, kiu legas poemojn, ne kutimas decifri esprimojn kiajn: "mi estas la shaumo kiu shvebas"! Ni esperu, ke post sukceso de ĉi tiu verko, eldoniĝos en Venezuelo aliaj libroj, kiujn ni povos senrezerve ĝui.

—RALPH HARRY.

ESPERANTO — KALENDARO

En 1935 B.E.A. eldonis Esperanto-Kalendaron kun citaĵo por ĉiu tago de la jaro. Se iu membro aŭ grupo posedas ekzempleron bonvolu informi: Ralph Harry, 8 Tennyson Cres., Forrest, A.C.T., 2603.

Du amikoj renkontiĝas ĉe tramhaltejo.

"Olda fraŭlo! Delonge mi ne vidis vin! Ĉu vi jam edziĝis?"

"Ankorau ne."

"Sed kion vi atendas?"

"La tramon!"

(Hung. Vivo)

—Joĉjo! Vespere miaj gepatroj foriros, neniu alia estos en mia hejmo. Do vi povos veni al mi, karulo. Mi loĝas sur la unua etaĝo.

—Ho, Karulino! Finfine! Sed diru: ĉu lifto estas?

—Ne.

—Tiam mi rezignas.

(Hung. Vivo)